

Stefan Maul



El verva vivo
jurnalista

FEL

El verva vivo jornalista

El verva vivo jornalista

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono kaj rajtas esti libere kopiata.

Dediĉo

Al fidela Hilde, kies amo kaj indulgo ĉiam denove konsolis kaj savis min.

Mi dankas al Gilbert Ledon, Paŭl Gubbins kaj Marc Gassion pro valoraj konsiloj.

Enkonduko

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, -
Ni semas kaj semas konstante.

L. L. Zamenhof, „La Vojo”

Estas konata fenomeno, ke multaj homoj lernas la lingvon internacian, tamen nur malmultaj iĝas kaj restas fidelaj adeptoj de Esperanto. Laŭ mia opinio (kaj ne nur la mia) oni ne fariĝas esperantisto nur pro pli-malpli hazarda konatiĝo kun la lingvo. Por percepti esperantisman kun la tiel nomata interna ideo necesas probable certa karaktero kaj pluraj faktoroj kiel travivaĵoj, spertoj kaj kondiĉoj, tiel ke homo eble pro sia antaŭa sorto estas latentata esperantisto ĝis la momento, kiam la lingvo internacia kaptas lian atenton. Simile, por resti fidela al la interna ideo, necesas certaj spertoj kaj kongrua karaktero, ĉar la tiel nomata Esperanto-movado facile povas fornaŭzi homojn, kiuj sekve kabeas.

Pri tiu ĉi fenomeno oni povas verki sociologiajn kaj psikologiajn analizojn. Mi elektas alian metodon, priskribante mian vojon al kaj tra la esperantisma kultur-socio. Kompreneble estas nur unu ekzemplo de unu homo, sed eble per tiu ĉi ekzemplo ni povas iomete percepti la fenomenon. Tamen povas esti, ke tiun ĉi ekzemplon oni devas ne ĝeneraligi, ĉar ĉe mi aldoniĝas speciala faktoro: la skeptiko de „denaska” ĵurnalisto. Ĝi probable detenis min, unuflanke, fariĝi „ĝisosta” verdulo, aliflanke malhelpis ke mi kabeu, ĉar ĉiam kun distancemo mi moviĝis en la movado.

La estimata leganto do ne atendu membiografion – tiom grava mi ne estas. El mia vivo mi plukis nur faktojn kaj spertojn, kiuj ŝajnas al mi esti gravaj por klarigi, kial mi estas kaj restas konvinkita adepto de l' ideo de L. L. Zamenhof.

Neeviteble mi mencias homojn konatajn en Esperantujo; laŭ mia ĵurnalista etiko mi klopodas skribi pri ili laŭeble objekte kaj precipe respekti intim-sferon. Se tamen mi ĉagrenas aŭ eĉ ofendas iun, kore mi petas pardonon kaj memorigas pri grava problemo de ĵurnalismo: perfekta objektiveco ne eblas, ĉar ĉiu homa verko iel tiel estas subjektiva.

Stefan Maul

Augsburg, en decembro 2004

Impresoj infanaĝaj

El infana aĝo oni kutime memoras nur plej drastajn, ĉu ĝojigajn ĉu malfeliĉajn eventojn, ofte nur mallongajn epizodojn aŭ eĉ nur kelkminutajn scenojn. Plurajn el ili, kiuj gravuriĝis en mia memoro, mi vidas tiom plastike kvazaŭ nur ĵus ili estus okazintaj. Probable do tiuj epizodoj estis tre gravaj por evoluo de mia vivo.

Partizano afabla

Estas malluma nokto. Mi vekigis pro obtuzaj frapoj ĉe la persienoj kaj laŭtaj vokoj. Timigite mi tiras la litkovrilon super mian kapon. Avino venas kun petrola lampo, rapide trairas la kuirejon – en kiu mi dormas – eksteren. Mallonge poste ŝi revenas kun viro, kian mi neniam antaŭe vidis: verdgriza vestaĵo tute stranga, kun multaj poŝoj plenŝtopitaj, larĝa zono kun etaj stangetoj, en unu mano li tenas kuriozforman bastonon el fero, en la alia grandan sakon. Li alpaŝas min, ridetas, afable parolas, sed mi terurigite ekkaŭras en la angulo. Mi ne komprenas lin, kvankam kiel kvarjarulo bone scias la kroatan. Li prenas ion el la sako kaj volas donaci al mi: manplenon da bonbonoj kaj ĉokolado. Kun grandaj okuloj mi fiksrigardas la fantomon sed skuas la kapeton, diras nenion. Li metas la frandaĵojn sur la kuirejan tablon kaj kun avino eniras la apudan deponejon, plenŝtopas sian sakon per ŝinkoj kaj kolbasoj, ovoj kaj pano freŝbakita, sukero kaj sekigitaj fruktoj. Kun peza sako afable li adiaŭas min, kiu senmove restas en sekura angulo.

Avino akompanas lin ĝis la kortpordo, ŝlosas kaj reveninte provas trankviligi min: „Estis nur partizano, kiu petis ion por manĝi.”

Hundo ĉagrena

El la du hundoj de miaj geavoj, vertago kaj miksrasulo Bundaŝ, mi amas precipe la duan. Ĝi estas granda, nigra, kaj havas la taskon gardi la bieneton. Mi povas tiri ĝian voston aŭ la orelojn, rajdi sur ĝi, petoli kiel ajn – Bundaŝ senproteste toleras ĉion, preskaŭ ĉion.

Avino donas al mi maizokukon, kiun ŝi ĉiam bakas speciale por ĝi, kiu

devas esti forta por plenumi sian taskon. (Ofte, kiam ŝi ne rimarkas, mi mem manĝas parton, ĉar estas bongusta kuko.) Nun mi portu ĝin al Bundaŝ, kiu avide atendas sian frandaĵon. Sed mi lude provokas ĝin, jen montras la pelveton kun kuko, jen fortiras de ĝia nazo, kuras tien kaj reen ... Bundaŝ haltas momenton, cerbumas, subite ŝovas sian buŝegon kontraŭ mian ventron kaj per milda puŝeto renversas min – mi falas rekte en la sterkejon, la kukopelveton perdas. Dum mi plore kriegas, baraktante surdorse en fetora sterkejo, Bundaŝ trankvile manĝas la kuketon kaj poste per sia granda lango amike lekas min, afable kaj senkulpe svingante la dikan voston. Alkurinta avino liberigas min el la sterko; ŝi devas komplete lavi kaj la plene ŝmiritan bubeton kaj la vestaĵojn.

Kadavroj ĉevalaj

Kun geavoj mi veturas al la urbo por viziti gepatrojn. Sidante sur la benko de la alta ĉevalĉaro, bonege mi povas observi ĉion, la belan pejzaĝon, kampojn de sunfloroj, homojn kaj domojn en vilaĝoj. Sed ho ve, kio estas pri la ponto ĉe la rivero, kie ĉiam staras viroj por kapti fiŝojn? La dekstra parto estas bruligita, barilo ne plu estas; avo tre malrapide transveturas la ponton apude de nigraj traborestoj. Neniu hodiaŭ kaptas fiŝojn. „Kio estas pri la ponto?” mi demandas. Avĉjo diras, ke estas milito.

Ni veturas en la urbon – nova ŝoko: ni preterpasas strangan, platan ĉaron, sur kiu kuŝas tute torditaj kadavroj de ĉevaloj. Abomeninda vidaĵo. Kiu mortigas ĉevalojn, tiujn ĉarmajn bestojn? Al mia demando avĉjo denove respondas, ke estas milito. „Kio estas milito?” Nek avo nek avino respondas. Probable do milito estas alia vorto por bruligita ponto kaj kadavroj ĉevalaj.

Aŭteto kaŝata

Fiere paĉjo starigas antaŭ mi brile ruĝan aŭtomobilon: estas la via! Mi eksidas, komencas movi la pedalojn – estas plezure veturi per tiu ĉi ‘aŭtomovilo’ sur trotuaro. Tuj kolektiĝas aro da infanoj ĉirkaŭ ni. Envie ili sekvas min kaj la miraklan veturilon. Neniam antaŭe ni vidis aŭtomobilon por infano, ja eĉ normalaj aŭtoj estas maloftaj, kutime nur soldatoj uzas tiajn rapidajn veturilojn. Kiam la hordo da bubetoj kreskas pli kaj pli kaj kelkaj postulas, mem stiri la belegan aŭteton, paĉjo prenas

ĝin kaj remetas en la remizon, zorgeme ŝlosas la pordegon.

„Saltu, avinjo!”

La alarmsirenoj hurlegas terure laŭte kaj minace. „Damne, denove aviadiloj!” blasfemas paĉjo. „Tuj venu, ni devas fuĝi al onklino Bogner.” La parencoj havas draŝejon kaj muelejon periferie de l' urbo. Gepatroj, geavoj kaj mi ekrapidas, kuras malantaŭ la lasta vico de urbaj domoj kaj baldaŭ atingas kampojn, kiam ni aŭdas la motorojn de aviadiloj kaj unuajn pafkrakojn. Sed avinjo ne kapablas kuri tiel rapide. Ni venas al tranĉeo; por ni ne estas problemo transsalti aŭ – kiel mi – grimpi suben kaj supren. Sed avino kun siaj malsanaj kruroj ne sukcesas. „Avinjo, saltu!” mi krias angore, „saltu!” Sed salti ŝi kapablas, kompreneble, eĉ malpli ol kuri per ne normale funkciantaj kruroj. La aliaj helpas ŝin. Denove proksimiĝas motorbruaĉo, ni kaŝas nin inter maizoplantoj, poste daŭrigas fuĝi. Denove tranĉeo. „Avinjo, saltu!” Mi timas, tiras ŝian brakon. La fosaĵo estas tre larĝa, la aliaj devas treni ŝin laŭ la kavaĵo. Fine ni atingas la muelejon, pafojn kaj motorojn ni aŭdas nur en fora mallaŭto.

Bubeto babilema

En la korta pordego ĉe la vilaĝa vojo estas klapo, tra kiu povas eliri niaj katoj, vertago kaj kokoj – kaj mi. Tiun eskapoklapon mi uzas, kiam mi enuas kaj tial volas viziti nian vidalavidan najbaron, maljunulon Djuriĉ [ĝuriĉ], kiu posedas gigantan bienon. Li estas unu el la plej riĉaj kroatoj de l' vilaĝo, kun simpatia ronda vizaĝo kaj simile ronda ventro. Li fieras pri impona liphararo, same blanka kiel liaj kapharoj. Djuriĉ ĉiam ĝojas pri mia vizito; li mem ne havas nepon. Mi rajtas admiri ĉiujn liajn multajn bestojn: porkojn, ĉevalojn, ŝafojn, kaprojn, bovojn en grandaj staloj kaj sur vasta tereno. Krome li havas subtegmente gigantan sekigejon de fruktoj; tie mi ĉiam rajtas plenigi miajn poŝojn per bongustaj sekfruktoj, precipe pomoj, piroj kaj prunoj.

En sia salono li havas komfortan brakseĝon kaj por mi same komfortan remburitan seĝeton. Tie ni ofte sidas; li ĝuas glaseton da slivovico (prunobrando) kaj mi ricevas limonadon, nuksojn kaj kompreneble la ŝatatajn sekfruktojn. Kaj ni konversacias serioze. Li admiras, kiel bone la germandevena bubeto parolas la kroatan. Vespere li akompanas min hejmen. „Najbarino”, li diras ridetante al avino, „bone atentu, kion vi

parolas antaŭ la oreloj de Steĉjo, li perfidas ĉiujn viajn sekretojn al mi.”

Vojaĝo kun avĉjo

Avĉjo ne povas rezisti. Tiom ofte mi jam petis, ke mi rajtu kunveturi. Tiun tagon do okazos la granda aventuro. Fiere mi sidas apud li sur la granda ĉaro kun multaj kestoj por ovoj, kokoj, anasoj kaj anseroj, kun sakoj por semoj. Avĉjo, kun la kutima leda ĉapo sur griza kapo kaj leda kasonsako pendanta ĉe la kokso, knalas per longa vipo kaj la du ĉevaloj obeeme ektiras la – ankoraŭ malpezan – ĉaron. Baldaŭ ni atingas najbaran vilaĝeton kaj avĉjo komencas voki: „Jaja! Jaja!” (kroate „ovoj”) Homoj venas el siaj bienetoj, jen kun ovoj, jen kun aliaj varoj – ili ja konas la komerciston. Ĉiam denove li haltas por transpreni kaj pagi, iomete babili – kaj ek, ni daŭrigas: „Jaja! Jaja!” Li ne devas voki ion alian, ĉar ĉiuj scias ke li aĉetas ne nur ovojn, sed preskaŭ ĉion kion ili produktas kaj bredas. Kiam vespere ni revenas hejmen, ne nur la ĉevaloj lacas pro intertempe peza ĉaro, sed ankaŭ mi. Tute feliĉe post manĝo mi tuj ekdormas. Kia belega ekskurso!

Tanko paneas

Paĉjo donacis al mi, kiel decas dum milito por infanoj, tankon. Ĝi estas farita el lado, belkolora lakita, kun raŭpoj el gumo kaj, kompreneble, kanono. Streĉinte la risorton, mi metas ĝin sur la plankon kaj ĝi ekveturas, pafante fajrerojn. Grandioza ludilo! Sed ho ve! Kiam hodiaŭ mi denove volas militludi, mi ne trovas la streĉilon. Kiel venki en milito, se oni ne povas startigi tankon? Avino ĉagreniĝas, ĉar mi perdis la streĉilon; paĉjo terure insultos ŝin, ke ŝi ne atentis pli bone. Pro furiozo ŝi batas min sur postaĵo. Nu ja, estas milito, ĉu ne? La postan tagon ŝi intencas lavi mian pantaloneton kaj – kontrolante la poŝojn – trovas la perditan streĉilon. Avinjo ploras, ĉar maljuste ŝi batis min.

Avo en fojnamaso

Avĉjo foje agas strange. Hodiaŭ li malaperis, posttagmeze, en subtegmenta fojnamaso. Mi staras sube kaj observas. Kion li faras tie? Kial li ne respondas al miaj demandoj kaj vokoj? Ankaŭ avinjo ne klarigas. Venas tri viroj, partizanoj evidente, ĉar ili aspektas simile kiel tiu nokta vizitinto. Ili demandas pri avĉjo, sed avino klarigas ke li ne estas

hejme. Kial ŝi mensogas? La viroj trovas min sub la fojn-deponejo kaj demandas ankaŭ min pri avĉjo, sed mi same timas kaj mutas kiel dum la nokta vizito de ilia kamarado. Bonŝance, ĉar mi ne povis scii ke ili serĉis avon por devigi lin kuniri; ili bezonis helpantojn, kiuj fosu tranĉeojn, kaj por tia laboro precipe rekrutis la malamikajn germanojn. La postan tagon avĉjo reaperas. Ho, kiom mi ĝojas revidi lin!

Aviadiloj ĉasantaj

La bruaĉo kaj hurlado iĝas pli kaj pli laŭta, pli kaj pli proksima. Denove tiuj teruraj ĉasaviadiloj! Mi provas kaŝi min sub la vastaj jupoj de avinjo. Krioj de ĉiuj flankoj: „Tuj en la fosaĵojn!” Avĉjo haltigas la ĉevalojn, prenas min kaj avinon – ni devas salti el la ĉaro, li tiras min en apudvojan fosaĵon. La ĉevaloj nerveze saltetas, henas timeme. Ni kaŭras sur la tero. Jen alflugas, fulmrapide, malmultajn metrojn super la longa vico de ĉaroj, tiuj terorigaj aviadiloj, tondras motoroj, kaj jen – ili pafas en ritmo terure rapida, pafas, pafas! Unu, du, tri aviadiloj. Virinoj kaj infanoj ploregas, iu kriegas kiel porko, kiam avĉjo buĉas ĝin. La bruaĉo mallaŭtiĝas, subite regas absoluta silento, nur ie tie aŭdiĝas lamentoj.

Ĉu ili revenos? Post duona horo hezite ni ekstaras; avino provas purigi min de koto kaj polvo kaj herboj, konsole karesas mian kapeton. Mi preskaŭ rigidas pro angoro. Ŝi kuŝigas min interne de la ĉaro sur dika kuseno. Tre, tre malproksime mi perceptas voĉojn; ie oni fosas, aŭdiĝas kelkaj pafoj – oni komplete mortigas vunditajn ĉevalojn. Unu horon poste la karavano de rifuĝintoj daŭrigas sian turmentovojon.

Kaĉo varma

Tiom gigantan halon neniam antaŭe mi vidis. Sed multe pli impone estas, ke en ĝi ni ricevas varman kaĉon el grio. Ho kiom bongustas tiu kuirita manĝaĵo! Dum semajnoj mi ricevis nur iom da pano kun graso el la granda ujo, kiu staras sur nia ĉaro, jen kaj jen sekigitajn fruktojn, kiujn antaŭ nia ekveturo donacis najbaro Djuriĉ. La virinoj en uniformoj kun ĉapoj ornamitaj per ruĝaj krucetoj devas esti anĝeloj. Krome ni ĉiuj rajtas lavi nin kaj dormi en tiu grandega halo, ne plu devas frostetante tranokti sur la ĉaro. Ĉu ni alvenis en paradizo? Ne, estis nur Germana Regno.

Duŝo pulvora

En longa vico mi staras kun la tuta familio antaŭ barako. Atinginte la internon, ĉiuj devas formeti suprajn vestaĵojn, mi restas nur kun kalsoneto kaj subĉemizeto. Kiom komike aspektas la homoj! Ni ekstaras sub strangaj duŝiloj, el kiuj tuj poste falas intensodora blanka pulvoro. „Tio estas bona por forigi pulojn kaj pedikojn!” klarigas panjo al mi. Mi devas terni, sed nu ja, se ne plu jukos, bone. Post la desinfektado ni rajtas revesti nin kaj iri al nia loĝbarako. Mi bone dormas spite al la agaca odoro – sen puloj estas tre agrable.

Vagono bruta

Ĉiuj estas ekscititaj, kuras tien kaj reen, oni tiras ĉevalojn kaj ĉarojn sur kargoramplon antaŭ brutvagono, ŝovas unue niajn du ĉarojn, poste niajn ses ĉevalojn kaj fine nin mem en la malpuran, malkomfortan, odoraĉantan vagonon. Ĝi nun estas plenŝtopita, sed varma pro la bestoj, ni ne bezonas hejti, kvankam estas malvarma germana oktobro. Daŭras preskaŭ tutan tagon, ĝis fine ĉiuj vagonoj estas plenaj. La lokomotivo fajfas – pene ĝemante ektiras la vagonaron. Kien ni veturos? Neniu scias precize; eble al sekura, senmilita regiono?

Malsato dumnokta

Kiu vekigis unue, la frato aŭ mi? Ni dormas en unu lito en granda fremda domo. Kiel ajn, mia stomako ribelas meze dum malluma nokto. Sepp ŝajnas suferi same. „Panjo hieraŭ kuiris terpomojn”, li flustras al mi, „kaj kaŝis la restintajn en pelvo sur la ŝranko.” „Mi malsatas”, mi plendas. „Venu”, diras Joĉjo, „mi tenas vin per miaj brakoj supren, tiel ke vi atingos la pelvon sur la ŝranko.” Lerta ŝtelista duopo! Kiom bongustas malvarmaj terpomoj.

Kristnasko senarba

Kristnasko, la unua post la rifuĝo, en sekura germana urbo, kie milito ne aŭdeblas. Sed ni ne povas, kiel hejme, dekori kristnaskan arbon per bonbonoj kaj ruĝaj pomoj. Eĉ arbeton ni ne havas. Malgaje ni infanoj sidas en nia ĉambreto en tiu ĉi fremda domo, kies mastroj devas toleri nian ĉeeston, ĉar oni ordonis al ili loĝigi nin. Sed jen – kio estas tio? Mi aŭdas kantadon kaj flutmuzikon el la mastra loĝejo. Nun ili silentas. Iu frapetas ĉe la pordo; paĉjo malfermas, tie staras la filino de l' gemastroj.

„Venu!”, ŝi diras. Heziteme mi sekvas, firme tenante la manon de panjo. Ho, kia miraklo! En ilia salono staras granda kristnaska arbo, kun brulantaj kandeloj. La kompatema mastrino donacas al Jozefo kaj mi kelkajn nuksojn kaj po unu pomon. Kaj ankoraŭfoje la filino flutas, la aliaj familianoj kantas pri la naskiĝo de Jesuo. Tiun nokton mi bone dormas.

Nigruloj sur tankoj

Ĉiuj infanoj kuras en la sama direkto. Mi sekvas la hordon. Ni venas al centra placo de la urbeto kaj jen – kia stranga vidaĵo! Tie staras tankoj multe pli gigantaj ol mia ludotanketo, sed – eĉ pli mirige – sur ili rajdas soldatoj en uniformoj tute aliaj ol havas germanaj soldatoj, kaj – kulmino de mirigo – pluraj estas nigruloj! Neniam antaŭe mi vidis homojn nigrajn. Krome ili konstante maĉas kiel nia bovino hejme, ridas larĝe, montras blankajn dentarojn en tute nigra vizaĝo. Ili babilas kun ni, sed ni komprenas nenion. Ili ĵetas ĉokoladon kaj bonbonojn kaj maĉgumojn (poste ni komprenas, kial ili daŭre movas siajn makzelojn) kaj fine eĉ pilkon tute strangan: ĝi havas formon de ovego. La nigruloj tre amuziĝas, kiam ni provas ludi per tiu ĉi pilko, kiu saltas tute netaŭge, ĉiam en alia direkto ol supozite. Iu diras: „Estas usonanoj. La milito finiĝis!” Mi komprenas nenion. Sed ja estas amuze.

Interjekcio

Kiam komence de la 1990-a jardeko denove eksplodis milito en Jugoslavio, mi estis politika redaktoro de ĵurnalo en Germanio, specialisto pri eksterlandaj aferoj. Estas rutino por redaktoro, prilabori informojn pri militoj, tio malmulte tuŝas nin, ĉiam ie okazas militoj. Sed ĉi-foje la afero estas alia por mi, emocias min forte. La milito inter kroatoj kaj serboj komenciĝas ĝuste en „mia” hejmregiono Slavonio, tie oni la unuan fojon plenumas „etnan purigadon”. Antaŭ miaj memoraj okuloj revuas tiuj bildoj el infanaĝo. Kiom da geknaboj denove devas vidi kaj sperti similajn, eble multe pli terurajn militajn scenojn kaj teruraĵojn, kiom ilin timigas partizanoj, pafoj, kadavroj, fuĝo? Mi estis savita, sed miloj da infanoj nun orfiĝos, estos vunditaj, kripligitaj, murditaj. Senkulpaj infanoj ĉiam estas plej kompatindaj viktimoj de milito. Rutino forlasas, abomeno kaptas la redaktoron.

Zamenhof mia

Estis sunbrila dimanĉo de la jaro 1948. Manfred, Hans-Jürgen [jirgen] kaj mi ekmarŝis frumatene, por je invito de nia instruistino Ingeborg Haydn [hajdn] viziti ŝin en la vilaĝo, kie ĉe la gepatroj ŝi pasigis siajn semajnfinojn. Dum labortagoj Inge (karesnomo) loĝis en modesta mansardo en urbeto Wunsiedel [vunsidl], kie ŝi gvidis nian klason, adorate precipe de knaboj. Ankaŭ mi freneze amis ŝin, inverse ŝi evidente ŝatis min.

Hodiaŭ infano tiuaĝa posedas jam sian duan aŭ trian biciklon; pri tio en detruita postmilita Germanio ni povis nur revii. Por la dekkilometra vojo ni disponis nur pri niaj piedoj, sed estis bela migrado laŭ montetoj kaj valoj, tra kampoj kaj arbaroj. Kiam ni alvenis, oni varme salutis la knaban triopon kaj Inge regalis nin per kuko kaj limonado. Min imponis la unuafoja konscia renkontiĝo kun ŝia patro, kiu estis instruisto en la sama lernejo, sed gvidis alian klason.

Inge foje rakontis al ni, ke li scias lingvon, kiun oni nomas Esperanto, kaj kiu estas tiel facila ke ĉiuj povas lerni ĝin kaj se ĝi estos parolata tutmonde, oni povos pacigi la homaron. La patro havis belan barbon kaj pro tio kaj la fizionomio similis al Ludoviko Lazaro Zamenhof – sed tion mi malkovris nur multajn jarojn poste.

Fazo unua

La 25-an de septembro 1940 Elisabeth naskis min kiel trian infanon. Mi estis ordinara bebo – aŭ tamen ne? Avino poste ĉiam rakontis, kion diris kuracisto kiam ŝi vizitis kun la bebo mian fraton en malsanulejo. Li palpis la kranieton de l' etulo kaj diris al panjo: „Estas inteligenta knabo.” Ĉu estas vere aŭ nur aserto de fiera avino, mi ne scias, sed certe ŝi rakontis tion al ĉiuj, ĉu ili volis aŭdi aŭ ne.

Mi naskiĝis en la domo de l' geavoj en vilaĝego Gundinci, sude de urbo Djakovo [ĝakovo], en Slavonio, kvankam miaj gepatroj loĝis en Djakovo. Sed en 1940 furoris la dua mondmilito kaj jam minacis Jugoslavion. Ĉar urboj kiel Djakovo estis en pli granda militdanĝero ol kamparo, miaj fratino Maria, je 12 jaroj pli aĝa ol mi, kaj mia frato Jozefo (karesnomo Sepp), je sep jaroj pli aĝa, vivis ĉe la gepatroj de panjo, Katharina kaj Johann Konrad, en granda bieno en Velika Kopanica, kaj mi restis ĉe la gepatroj de paĉjo, Theresia kaj Jozef Maul [maŭl], en Gundinci.

Ekskurso prahistoria

Germanoj plurfoje dum la historio ekspansiis al orienta Eŭropo, ofte okupis perforte teritoriojn en tiu parto de l' kontinento, kiuj estis malpli dense loĝataj ol okcidentaj landoj. Sed parte oni ankaŭ vokis kaj logis ilin al koloniado. Tiel okazis ankaŭ, kiam imperiestrino Maria Theresia regis en Aŭstrio-Hungario. Ŝian alvokon sekvis precipe agrikulturistoj kaj metiistoj el Nigra Arbaro, sudgermana montaro loĝata de badenanoj kaj ŝvaboj. Danubo, dua plej longa riverego de Eŭropo, fontas en Nigra Arbaro. Ŝvaboj do havis trafikan avantaĝon: ili povis ŝipi laŭlonge de Danubo al promesitaj paradizoj apud pli suda parto de l' riverego.

Elirpunkto estis Ulm; en tiu urbo tamen Danubo estas ankoraŭ iom mallarĝa, do oni konstruis konvenajn, ne tro larĝajn ŝipojn, kiujn pro la formo moke oni nomis Ulmer Schachteln (= ulmaj skatoloj, do kestoj). Ili transportis homojn, havaĵojn kaj ilarojn ĝis fekunda Danubo-ebenaĵo en Hungario kaj Jugoslavio. Tial oni nomis ilin Danubo-ŝvaboj – por la indiĝenoj poste ĉiuj germanoj estis „ŝvaboj”. Ili fondis multajn novajn vilaĝojn kaj urbetojn kun germanaj nomoj, sed iuj ankaŭ ekloĝis inter

hungaroj kaj slavoĵoj. La diligentaj danubaj ŝvaboj kutime prosperis kaj bonfartis, fariĝis riĉaj, sed plimulte restis inter si; ili ja lernis la lokajn lingvojn, sed en la familio parolis sian dialekton. La danubŝvaba iom post iom fariĝis aparta lingvaĵo, kun pruntoj el regionaj lingvoj. Pitoreska ekzemplo por tio estas la vorto Leischi-Latschi [lajŝilaĉi], kiun infanetoj uzis por la germana vorto Fleischküchle: Fleisch [flajŝ] = viando / küchle [kiĥle] = kuketo / laĉi el kroata vorto kolaĉ por kuketo. (Hodiaŭ tutmonde *kids* nomas ilin *Hamburger...*)

Laŭ miaj esploroj, por kiuj mi tamen ne havas konfirmon, ankaŭ miaj prauloj probable venis – vokite de Maria Theresia – el la Nigra Arbaro al Slavonio, tiu parto de Kroatio, kiu situas sude de Hungario inter riveroj Danubo, Dravo kaj Savo. Mia familio povis savi neniujn dokumentojn, se entute oni havis iujn antaŭ la elpelo dum la dua mondmilito. Kiam fine mi klopodis kompili genealogian skemon de mia familio, nur mia patrino ankoraŭ vivis – kaj ŝi jam ne bone memoris detalojn. Sed, laŭ la nomoj de l' tuta parenkaro, ŝajnas ke mia familio estis pure germandevena.

Oni baptis min Stefan laŭ mia patro; se ni estus nobla familio, mi do devus diri kaj skribi „Stefan Maul la juna”. Strange, tamen, mia baptonkino ne estis germana sed kroata virino en Gundinci – la kialon mi ekscios nur multajn jarojn poste.

Ekskurseto etimologia

Kiel infano mi ofte suferis pro mokoj de aliaj infanoj pri mia familia nomo. Maul en germana lingvo signifas „buŝego” kaj „buŝaĉo”; buŝegon havas bestoj, buŝaĉo estas insulta vorto aplikata por homoj, en parolturnoj kiaj estas „Halt 's Maul!” (fermu vian buŝaĉon) aŭ „er mault schon wieder” (li denove grumblaĉas).

Nur longe poste, en gimnazio, mi eksciis ke nia nomo tute ne kongruas kun „buŝego”, sed devenas de aliaj vortoj: multe, mul(t), mulle kaj mawl (prononcita maŭl) en diversaj pragermanaj dialektoj signifis „tero” kaj „polvo”. Tiu ĉi signifo en moderna germana lingvo estas konservata, krom en kelkaj loknomoj, nur en la vorto Maulwurf (talpo). Mulwurf aŭ mawlwurf (wurf = ĵeto) la besteto ne estas nomata, ĉar ĝi ĵetas buŝon aŭ

per buŝo, sed fosas kaj ĵetas teron supren per siaj konforme formitaj piedetoj – iel logika afero en nelogika lingvo. Supozeble do la nomo Maul por homo signifis: tiu, kiu vivas en tero (= kaverno, groto); tion konfirmas i. a. ke la nomo oftas en Nigra Arbaro, kie abundas kavernoj kaj grotoj – kaj el tiu sudgermana montaro ja laŭ mia scio venis miaj prauloj.

Sed klarigu tion al mokemaj bubetoj!

Avo Maul estis grandkomercisto; li traveturis la distrikton, aĉetis de kroataj kaj serbaj agrikulturistoj kaj farmistoj precipe ovojn, kortbirdojn kaj ĉiuspecajn semojn kaj spicojn, kiujn li parte vendis en Djakovo, sed pli multe eksportis al Germana Regno. Por esti meze inter siaj liverantoj, li venis el Djakovo, kie lia edzino krome mastris la gastejon de l' foirejo, al Gundinci, kiu estis pure slava vilaĝo. Probable ili translokiĝis ankaŭ ĉar avino suferis je ingvena hernio kaj ne plu kapablis plenumi la pezajn laborojn en gastejo. Gundinci situas inter Djakovo kun foirejo kaj Vinkovci kun stacidomo por envagonigi eksportvarojn. Filo Stefan restis en Djakovo kiel memstara grandkomercisto, kunlaboranta kun la patro. Ambaŭ, patro kaj filo, evidente estis diligentaj kaj lertaj, ĉar ili gajnis multan monon – nu, ili estis riĉuloj kompare al la ordinara loĝantaro. Bonkora avĉjo estis baldaŭ tre populara en Gundinci, certe ankaŭ ĉar li funkciis kiel bankisto, kiu volonte donis kreditojn.

Hejmo idilia

Edukis min do avino. Mia unua hejmo konsistis el bieneto kun ĉarma domo, en kies antaŭa parto ni loĝis; en la malantaŭa troviĝis stalo por la kvar ĉevaloj kaj bovino, kiu liveris lakton, remizo por ĉaroj kaj malvarmeta deponejo por varoj, krome subtegmento por stoki fojnon. Malantaŭ la konstruaĵoj estis parcelo kun legomĝardeno, aparta korto por kokinoj kaj anseroj kaj ejo por kelkaj porkoj. Pluraj katoj kaj du hundoj kompletigis mian privatan bestĝardenon. La korto estis pavimita per ruĝaj kaheloj ĝis la sterkejo antaŭ la stalo. Flanke staris blanka ligna dometo, somerkuirejo, apud ĝi puto kun bona, ĉiam freŝa akvo, kiun oni elprenis per vinĉo provizita per longa ĉeno kun sitelo. Ombron provizis cidoni-arbo kaj granda tegmento, kiu protektis la korton en tuta larĝo, antaŭ la remizo. Tie oni povis jungi kaj maljungi ĉevalojn kaj malŝarĝi ĉarojn sen malsekiĝi

dum pluvado.

La infano estis bone protektita sur la korto, ĉar ĉe la strata flanko granda, netrasidebla pordego malhelpis eliron. Nu ja, strato? Estis ne asfaltita, kompreneble, tiutempe, kaj post pluvo la vojo estis tute kota – do ĝi neniel invitis al ludado, kvankam manke de trafiko ne estus problemo. Mi tute ne memoras ke kun kamaradoj mi ludis surstrate.

Pri la domo de gepatroj en Djakovo mi havas nur nebulan memoron, nur scias ke la strato antaŭ ĝi estis pavimita kaj havis trotuaron, kiel decas al episkopa urbo. (Djakovo havas interesan katedralon kun belaj mozaikoj. En 19-a jarcento ĝi fariĝis iom konata en kristana mondo, ĉar la tiama episkopo Strossmayer [strosmajer] dum la Dua Vatikana Koncilio forte kontraŭis la dogmon pri neeraripovo de l' papo. Por ke li ne devu voĉdoni pri tiu dogmo, li reveturis al Djakovo antaŭ fino de l' koncilio.)

Iom pli bone mi memoras la gigantan bienon de l' aliaj geavoj, kiujn okaze ni vizitis – la distanco inter Gundinci kaj Velika Kopanica ne estis granda. La familio de panjo supozeble venis el Hungario al tiu germana vilaĝo en Slavonio; tion mi ne scias sed supozas pro la fakto, ke panjo naskiĝis en hungara Baĉka Palanko. Impona estis ilia bieno en Velika Kopanica pro grandega korto kaj L-forme aranĝitaj konstruaĵoj: loĝdomo, staloj kaj garbejoj, ampleksa remizo kun multaj maŝinoj kaj vastaj kampoj malantaŭ la konstruaĵoj. Tiel danubŝvabaj vilaĝoj ofte estis aranĝitaj; avantaĝo estis ke oni ne havis longajn vojojn al agroj, herbejoj kaj aliaj uzataj terenoj.

Konflikto interparenca

Jozefo Maul havis fraton, kiun mi tamen neniam vidis. Franz [franc] Maul estis frizisto kaj loĝis kun sia familio en Ŝiroko Polje, vilaĝo kiun avĉjo ofte trapasis. Sed ŝajnas ke li tie ne rajtis halti pro konflikto inter lia edzino kaj parencoj; la edzino de Franz Maul estis kuzino de Theresia. Tion mi tamen eksciis nur, kiam mi jam estis plenkreskulo, post la morto de mia avino. Kaŭzo kaj fono de l' kvereloj do ne plu estis exploreblaj.

Danub-ŝvaboj kutime sciis la kroatan lingvon; infanoj jen frekventis kroatajn, jen germanajn lernejojn, depende de la politika situacio. Gepatroj kaj geavoj relative bone sciis legi kaj skribi altgermanan lingvon,

sed hejme ni parolis la ŝvaban dialekton. Mi do tute nature lernis ambaŭ lingvojn, kroatan kaj varianton de l' germana.

La vivo en Gundinci evoluis agrable kaj trankvile, ankaŭ kiam printempe 1941 Hitler sendis sian armeon por okupacii Jugoslavion. En Gundinci oni ne sciis multe pri la eventoj, ankaŭ ne pri konfliktoj inter faŝistaj kroatoj (Ustaŝa) kaj serboj; gazeton ni ne havis nek radiofonion. Mi bonfartis kaj kreskis, neniam estis malsana. Avino ja bone nutris min, ekzemple per lakto: ĉiun matenon kaj vesperon, kiam ŝi melkis la bovinon, ŝi unue plenigis mian ladan kruĉeton per la unuaj laktoŝprucoj.

„Ni pafmortigos vin!”

En 1944 tamen la situacio en Slavonio ŝanĝiĝis. Pli kaj pli ofte oni aŭdis pri bataloj en Djakovo kaj Osijek, kie estis germanaj garnizonoj. Dum vizitoj ĉe gepatroj mi mem spertis atakojn de aviadiloj. Pli kaj pli ofte en Gundinci nokte venis partizanoj por preni furaĝon, foje ankaŭ ĉevalojn. Geavoj tamen, tre ŝatataj en la vilaĝo, ne multe devis timi persekutojn.

En aŭtuno 1944 venis grupo da germanaj soldatoj al Gundinci. La oficiro klarigis, ke proksimiĝas la Ruĝa Armeo kaj tial oni devas forkonduki ĉiujn germanojn por protekti ilin kontraŭ kruelaj rusoj, kiuj buĉas ĉiujn malamikojn. Kiam la germana armeo estos venkinta kaj forpelinta Ruĝan Armeon, ni rajtos reveni hejmen. Sed nun li ordonis: „Post unu semajno ĉio devos esti preta! Ĉiu familio rajtas uzi nur unu ĉaron kaj kunporti nur plej necesajn havaĵojn kaj nur tiom, kiom eblas paki sur la ĉaro.” Post paŭzo severvoĉe li aldonas: „Se vi rifuzas kuniri, *ni* pafmortigos vin! Ni ne toleros, ke rusoj aŭ partizanoj torturos kaj buĉos vin!”

Avino ploris senhalte. Forlasi la hejmon? Kiu zorgos pri bestoj kaj ĝardenoj? Kiu gardos la domon? Najbaroj provis konsoli, amiko Djuriĉ promesis nutri la bestojn. Ĉiuj estis malgajaj. Avino bakis multajn panojn, kolektis provianton, precipe ŝinkojn kaj porkan grason, kiuj ne rapide putriĝos. Kiom longa estos la vojaĝo, kiom da tempo ni estos for? Nu, certe nur unu, du semajnojn, kiel promesis la oficiro. Kion ni nepre bezonos? Kompreneble dikajn kovrilojn kaj kusenojn, vestaĵojn. Oni pakis, denove forprenis, trovis aliajn pli necesajn objektojn.

Por la etulo estis ekscite; ankaŭ mi alportis, kion mi nepre volis havi kun

mi, ekzemple miajn amatajn tricikleton kaj remburlitan seĝeton, mian manĝilaron kaj precipe la buntan ladoteleron. Baldaŭ la ĉaro estis plenŝtopita. Avĉjo fine muntis super ĉio la pluvrezistan ŝirmtolon. Preta! Por kia aventuro?

Karavano sufera

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Hejmurbo provizora

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Mizero kaj espero

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Fazo dua

La ekloĝo en la bieno en Wunsiedel por mi signis novan fazon de l' vivo, relative agrablan, ja grandparte feliĉan. Por sesjarulo la nova hejmo disponigis variajn eblojn de ludado kaj distrado, en kaj ĉirkaŭ la bieno.

Antaŭ la remizo estis kortego de ĉ. 30 oble 20 metroj, kie ni povis libere petoli. Malantaŭ la loĝdomo estis granda herbejo, kiu limis al rokminejo. Kiam laboristoj iris hejmen, ni infanoj uzis ĝin por ekzerci grimpadon kiel en kruta montaro aŭ veturis en la vagonetoj, per kiuj oni transportis ŝtonojn al muelejo. Iom pli malproksime troviĝis eĉ pli interesa ĉar eksa ŝtonminejo, pleniĝinta per akvo. Tie vivis multaj bestospecoj, en absolute klara akvo naĝis fiŝoj kaj serpentoj, vivis salamandroj kaj ranoj. Ranoj kaj kankroj abundis ankaŭ en rivereto proksime de la bieno. Najbaraj infanoj multis; ni ĉiuj vivis plejparte en kaj kun la naturo, rande de l' urbeto.

Paĉjo kaj la aliaj plenkreskulaj familianoj fervore komencis agrikulturi. Parton de l' herbejo malantaŭ la domo oni uzis por legomĝardeno; en aparta areo paĉjo plantis tabakon. Ĉar tio estis kontraŭleĝa, li kaŝis la tabakajn per aliaj grandaj plantoj, sunfloroj kaj maizo. Niaj ĉevaloj tamen montriĝis tro malfortaj por tiri plugojn kaj aliajn maŝinojn; en Jugoslavio, kie ili devis tiri ĉarojn nur sur ebenaj vojoj, ili taŭgis, sed ne tie ĉi – escepte de Zveta, kiu estis ne tre granda sed tre fortika stepdevena ĉevalino. Paĉjo sukcesis „vendi” (nu ja, interŝanĝi) la aliajn ĉevalojn kontraŭ forta agroĉevalo kaj bovino. Krome tiel li povis akiri kokinojn, semojn, fojnon, pajlon kaj alian furaĝon por la vintro. Kaj aron da kunikloj, kiujn bredos avĉjo.

La afero evoluis do sufiĉe bone, ankaŭ ĉar paĉjo daŭre laboris kiel transportisto. Intertempe li kaj avĉjo ne plu devis fiakri por kuracistoj, ĉar tiuj kiel unuaj post la milito ricevis aŭtomobilojn kaj do pli rapide povis atingi pacientojn ol per kaleŝoj. Sed ankoraŭ mankis kamionoj. Paĉjo do per ĉevalĉaroj transportis meblojn kaj aliajn varojn, dum vintro – parte per sledoj – trunkojn el arbaroj. Ni fine povis nutri nin relative bone, eĉ havis ĉiudimanĉe viandon, kutime kuniklon, kiun mi tre ŝatis.

Intertempe refunkciis ankaŭ infanĝardenoj kaj lernejoj. Sepp – intertempe

12-jara – devis eniri la unuan klason, ĉar hejme pro milito li lernis malmulte kaj eĉ tion jam forgesis. Sed imagu: 12-jarulo inter infanoj kun ses, sep aŭ maksimume ok jaroj, fortulo inter gnomoj! Malice li ĉikanis kaj perturbis, foje turmentis ilin, sed ofte vagabondis ie anstataŭ iri al lernejo. La instruisto post kelkaj semajnoj klarigis al gepatroj, ke ne havas sencon – do la lerneja kariero de Sepp finiĝis abrupte. Li sciis nur legi malrapide, iom skribi kaj kalkuli. Ekde nun li laboros kun patro kaj avo en la bieno.

Infanĝardeno ĥaosa

Infanĝardenon mi vizitis nur duonan tagon. En ĝi troviĝis amaso da infanoj, edukistinoj povis nur iumaniere okupi ilin, ĉar ludilojn oni preskaŭ ne havis. Al mi tute ne plaĉis tia ĥaoso, krome apuda porkejo fetoris abomene. Do en la tagmeza paŭzo kun najbara kamarado mi fuĝis al sablo-monteto antaŭ konstruata domo de liaj gepatroj, kie ni bele kaj trankvile povis ludi. Kiam mi venis hejmen, mi firme deklaris, ke neniam plu mi iros al tiu stulta infanĝardeno – panjo komprenis kaj toleris.

Lerneja jaro komenciĝis en septembro. En 1946 mi ankoraŭ ne havis la preskribitajn ses jarojn por frekventi elementan lernejon, sed ĉar mi naskiĝis fine de septembro kaj jam sciis iom legi kaj nombri ĝis cent, oni provizore akceptis min en la lernejo. Ni skribis sur ardezaj tabuletoj kaj matematikis per fingroj. Agrable estis, ke ĉiuj infanoj, suferantaj pro sekvoj de l' milito, ricevis ĉiun tagon dum la paŭzo varman manĝaĵon en la lernejo.

Problemo estis vestaĵoj por frekventi lernejon; tien infanoj ne povis aŭ volis iri en ĉifonaj kaj eluzitaj vestaĵoj portataj hejme. Mi memoras pri dika jaketo, kiun panjo kudris el ŝtofo de iama soldata uniformo – vera modelo de tajlora arto! Somere ni iris nudpiede aŭ en sandaloj, kiujn oni faris el uzitaj pneŭmatikoj; ili estis agrablaj ĉar molaj.

Ekskurseto pedagogia

Lerneja edukado en Germanio okazas laŭ tri ŝtupoj: 1. Elementan lernejon oni eniras en aĝo de ses jaroj; ĝi ampleksas ok jarojn, post kiuj oni povas eklerni metion. Dum metilernado (ĝenerale trijara) oni devas viziti unu tagon semajne specialan meti-lernejon. 2. Real-lernejo, kiun oni povas eniri kun 10 – 12 jaroj por la daŭro de 4 – 6 jaroj (tio varias laŭ

federaciaj landoj, krome oni plurfoje ŝanĝis la daŭron). Poste oni povas aŭ eniri praktikajn profesiojn en industrio, komerco, administrado k. s. aŭ frekventi faklernejojn. 3. Gimnazio, kiun oni eniras plej frue kun 10 jaroj por 8 aŭ 9 jaroj; ĝi finiĝas per abiturienta ekzameno, kiu permesas studi en altlernejoj kaj universitatoj.

Deviga por ĉiuj estas nur elementa lernejo aŭ frekventado de aliaj lernejoj dum ties ok jaroj. Do, ekzemple, gimnazion oni povas fini (pli ĝuste interrompi) post la kvara klaso; se oni havas bonajn notojn, tiel oni akiris „mezan maturecon”, kiu jure ekvivalentas al sukceso en real-lernejo.

Estis malfacile en postmilita Germanio refunkciigi lernejojn, pro pluraj obstakloj. Precipe mankis instruistoj. Multaj mortis ĉe frontoj, aliaj estis militkaptitoj. Tiuj, kiuj revenis, ofte estis malsanaj aŭ invalidoj. Krome ĉiuj instruistoj dum la antaŭaj jardekoj devis propagandi al lernantoj la nazian ideologion, sed nun devus instrui demokratiajn principojn. Oni ĝenerale ne permesis al membroj de l' nazia partio plu aŭ denove praktiki instruistan profesion. Por do havi sufiĉe da instruistoj, junaj homoj rajtis studi en rapidkursoj pedagogion.

En Bavario ekzistis kroma obstaklo: la elementaj estis tiel nomitaj „konfesiaj” lernejoj. Katolikaj kaj protestantaj infanoj devis ne frekventi samajn sed apartajn klasojn, do ankaŭ instruistoj devis havi koncernan konfesion. Sekvo de ĉi ĉio estis i. a. ke en unu klaso ofte sidis pli ol 40 infanoj, en alia eble nur 10, kaj ke mankis ĉambroj. Tial ofte en sama ĉambro oni instruis antaŭtagmeze unu kaj posttagmeze alian klason.

Pri nia instruisto en la unua klaso mi memoras nur, ke li havis unu laman kruron kaj pro tio uzis bastonon, krome montrofigro (per kiu li ofte admonis kaj minacis) estis kurba. Li estis tre severa kaj punbatis neobeemajn kaj misfarintajn lernantojn; ili devis etendi ambaŭ manojn kaj li batis sur la fingrojn per maldika bastoneto, kio kaŭzis akran doloron. Laŭ mia memoro mi ne kaptis tian punon. Sen problemoj mi majstris la unuan klason kaj en aŭtuno 1947 eniris la duan, kun sama malagraba instruisto. Sed nur por kelkaj semajnoj ...

Malsanoj danĝeraj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Obsedo religia

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Problemoj financaj

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Malliberejo dua

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Fazo prospera

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Fazo verda

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Krizaro familia

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Katastrofo persona

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Studento libera

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Spertiĝo ĵurnalista

Kun granda elano mi eniras profesion fazon de mia vivo, unue tamen devas instaliĝi en loĝejo tute senmebla. En ĝi troviĝas nur kuirforno kaj telefono senpaga (ĉar redaktoro devas esti konektebla ĉiumomente!). Mi aĉetas liton, sofon (kiu taŭgas ankaŭ kiel lito por gasto) kun du foteloj, tablon kun du seĝoj por kuirejo kaj, plej grave, grandan skribtablon. Librojn mi povas deponi en simpla bretaro aĉetita jam en Munkeno. Por kuirejo mi mem ĉarpentas kelkajn primitivajn mebletojn. Krome mi aĉetas radioricevilon (ĝis nun mi uzis nur poŝaparaton).

La loĝejo havas relative grandajn dormĉambron kaj salonon kun eta balkono, kie mi povas vidi la panoramon de l' urbo en valo de rivero Lahn (kiu enfluas Rejnnon), ĉar la domo situas sur unu el sep montetoj de Limburgo. Ke nur kelkcent metrojn sube de mia balkono vidiĝas la granda konstruaĵo de l' dioceza seminario, estas kurioza koincido; sed tio ne ĝenas min nun, kiam mi havas firman pozicion. Kaj, kia beno!, por la unua fojo mi disponas pri propra banĉambro kun varmega akvo. Ideala (kaj ne tre kosta) loĝejo por fraŭlo. En la domo, kiu apartenas al la diocezo, loĝas precipe ekleziaj dungitoj; dommastro estas, ekzemple, ŝoforo de l' episkopo. Tio tamen signifas, ke konstante mi estas observata de „piaj” homoj – do devas esti gardema. Malgraŭ tio mi estas feliĉa pri tiuj agrablaj personaj kondiĉoj.

Nura malavantaĝo estas, ke la domo situas periferie de l' urbo, en longa distanco al la redaktejo ĉe alia urboflanko; ankaŭ pro tio mi bezonas aŭtomobilon, ĉar publikaj trafikiloj ne ekzistas, bicikladi estus tro pene pro deklivoj, piede mi bezonus pli ol duonan horon inter loĝejo kaj redaktejo (kvankam estas bela promenado trans riveron kaj tra pitoreska mezepoka urbocentro). Dum aŭtunaj kaj vintraj monatoj aŭtotrafikadon tamen ege ĝenas densa matena nebulo en rivervalo.

Liberala etoso

En la redakcio deĵoras nur du plenprofesiaj redaktistoj, ĉefredaktoro kaj mi; krome estas la menciita teologia konsilanto, prelato Hans Pabst, kies ĉefprofesio (kaj pasio) tamen estas muziko: li estas katedrala korus-

direktisto. Li tre ĝojas, ke – kontraste al mia antaŭulo – mi estas teologo, tiel ke nun li devas malpli rigore kontroli teologiajn kaj religiajn manuskriptojn, lasante tiun ĉi taskon al mi.

Al la skipo krome apartenas redaktoro en Frankfurto, kiu kompilas apartajn paĝojn por la urbego, pluraj eksteraj kunlaborantoj kaj, precipe, helpepiskopo Kampe, kiu loĝas rekte apud la redaktejo. Li estas unika persono, nepo de juda avino; tiu fakto malhelpas, ke li rajtas fariĝi dioceza episkopo, kvankam li estas brila teologo, animzorganto kaj publicisto. Dum la koncilio en Romo li instalis – kia unikaĵo! – regulajn gazetarajn konferencojn por ĵurnalistoj. Tre konata estas ankaŭ la episkopo de Limburg, Wilhelm Kempf [vilhelm kemf], same „liberala” kiel Kampe, sed malpli intelektula. Li estas ideala animzorganto, kiun interesas precipe problemoj de ordinaraj homoj.

Diocezo Limburg estas unu el la plej etaj en Germanio, sed kun Frankfurt/Main (plimulte protestanta) havas unu el la plej liberalaj urbegoj de la lando. Sendube ankaŭ tial la diocezo estas tiutempe (kaj ankaŭ poste) unu el la plej, se ne la plej progresema en Germanio. (Kempf plurajn jarojn poste estos denunciata pro tio kaj fine rezignacias, kiam postkoncilie regresemaj fortoj en Vatikano konstante akuzas lin.)

Tia etoso de progresemo kaj liberaleco kompreneble tre konvenis al freŝe diplomita teologo, kiun impetis novaj ideoj kaj impulsoj de 2-a Vatikana Koncilio. Krome la ĉefo lasis min labori tute libere – sed unue mi devis lerni la metion de ĵurnalista. Bröckers tute ne instruis aŭ preskribis ion, simple diris, ke mi mem eltrovos ĉion. Certe, verki artikolojn diversspecajn, redakti manuskriptojn, korekti presprovaĵojn kaj aranĝi tekstojn por enpaĝigo por mi estis jam rutinaj taskoj pro miaj spertoj pri Esperanto-periodaĵoj. Sed nun por unua fojo mi vidis kompostejon kaj presejon kun fascinaj teknikaj instalaĵoj – estis ja ankoraŭ epoko de skribmaŝinoj kaj plumba tekniko, komputiloj tute ne estas imageblaj. Necesis multaj manlaboroj por prepari kaj enpaĝigi gazeton, kio tre konvenis al mia inklinado fari ion per manoj.

Ekskurseto ĵurnalismika

En Germanio, malgraŭ longa tradicio gazetara (estis germano Gutenberg, kiu por Eŭropo inventis pres-arton), profesio de ĵurnalista

estas tute libera, sen iuj juraj aŭ aliaj restriktaj; kiu ajn rajtas nomi sin ĵurnalisto kaj neniu kontrolas koncernan kvalifikon. Redakcioj mem trejnas lernantojn. En universitatoj oni traktis amaskomunikilojn nur teorie, kiel mi tion spertis; nur multajn jarojn post mia studado oni komencis establi apartajn institutojn por trejni ĵurnalistojn. Kutime junaj homoj post abiturienta ekzameno strebis al ĵurnalismo; kompleta universitata eduko kiel mia estis escepto. Intertempe, en pluraj sekcioj de gazetoj, studintoj estas pli oftaj. Nun en ĵurnalejoj kaj redakcioj de elektronikaj komunikiloj oni trejnas estontajn ĵurnalistojn dum trijaraj kursoj kaj per multaj praktikaj ekzercoj.

Sed kiom ajn necesaj estas trejnado kaj lernado, se homo ne estas dotita per koncerna talento, tiu apenaŭ povos fariĝi bona ĵurnalisto. Teknikojn oni povas lerni sed ne senton pri temoj, ne la necesajn skeptikon kaj intereson pri aferoj kaj pri vero, kaj ne impeton, peradi al homoj mesaĝojn kun enhavoj interesaj kaj necesaj por ili. Ke oni devas havi bonan senton pri lingvo kaj verk-talenton, tio estas memevidenta sed ne ĉiam klara al junaj homoj, kiuj vidas nur reputacion de famaj (precipe televidaj) ĵurnalisto kaj mem volas fariĝi tiaj steluloj. Kiam ili rimarkas, ke oni devas ŝvite lukti por trovi plej taŭgan formuladon de ŝlosila frazo, tiuj vantuloj elreviĝas.

Naturdotita ĵurnalisto estis Walter Bröckers, kvankam li havis problemojn pri ortografio kaj gramatiko (mi, perfektema pri lingvo, devis korekti ĉiujn liajn manuskriptojn). Li aranĝis ĉiam la frontpaĝon kun granda foto kaj medita teksto. Ofte dum horoj li traserĉis staplojn da fotoj por trovi plej taŭgan. Liaj artikoloj preskaŭ ĉiam havis ĝustan etoson kaj trafan humanan mesaĝon. Krom tio li tamen verkis nur malmulte kaj ne redaktis aliajn manuskriptojn (li ne trovus erarojn ...), sed precipe organizis raportadon kaj verkadon, donis inspirojn al aŭtoroj, proponis temojn.

Ĉefo bonega

Li tuj rimarkis, ke ankaŭ mi estas naturtalenta ĵurnalisto, tiel ke dekomence ni bonege harmoniis. Li ne estis ĉefo sed precipe kolego, do sen iuj ajn konfliktoj ni kunlaboris, interŝanĝis ideojn kaj inspirojn. Mi memoras pri eĉ ne unu kvereleto; kaj kiam foje oni atakis min, li arde

defendis min (tio baldaŭ necesos, cetere).

La gazeto nomiĝis *Der Sonntag* (= La Dimanĉo) kaj aperis unu fojon semajne kiel oficiala organo de l' diocezo. Ĝi havis klaran strukturon kun multaj rubrikoj edifaj (religiaj), raportoj kaj informoj el dioceza vivo kaj germana katolika eklezio, anoncoj pri estontaj aranĝoj kaj novelo. Ĉion ĉi mi devis redakti; tute nova tasko por mi estis elekti novelon, por kio dum multaj horoj mi devis legi manuskriptojn, ĝis mi akiris la necesan rutinon por jam post kelkaj alineoj konstati, ke novelo ne taŭgas por nia legantaro.

Baldaŭ mi estis malkontenta pri la gazeto; laŭ mia opinio mankis precipe komentarioj kaj koncizaj informoj pri temoj ligitaj al eklezio kaj socio, temoj kiujn alfrontas homoj en ĉiutaga vivo. Do mi proponis enkonduki apartan rubrikon kun ĝeneralaj informoj kaj rubrikon kun mallongaj komentarioj kaj glosoj. Bröckers tuj konsentis same kiel la helpepiskopo. Tamen ni disponis pri materialo de nur unu inform-agentejo, katolika. Do mi ekspluatis ankaŭ grandajn ĵurnalojn por nutri tutpaĝan inform-rubrikon, en kiu sekve aperis ne nur eklezikonformaj novaĵoj sed ankaŭ kritikaj voĉoj trovis lokon. Komentariojn, precipe pri sociaj kaj socialaj problemoj, verkis preskaŭ nur mi. Tiuj vekis apenaŭ kritikojn de legantoj, sed ne malofte informetoj, kiel ajn objektivaj, kun enhavo nekonvencia provokis protestojn de konservativaj rondoj. Aliaj, sufiĉe da, laŭdis la novan rubrikon, kaj la ĉefo same kiel Kampe apogis min; la rubriko daŭre aperis.

Ĝenerale, tamen, la laboro ne estis ekscita. Ofte mi vojaĝis kun la ĉefo, precipe komence, kiam li volis prezenti min al gravuloj de l' diocezo. Krome mi raportis pri konferencoj kaj seminarioj en dioceza akademio, ankaŭ progresema. Inverse mi mem prelegis kadre de dioceza kleriga asocio, en diversaj paroĥejoj, kaj tiel gajnis iom da kroma mono. Ĝenerale, mi rapide spertiĝis en ĉiuj ĵurnalistaj taskoj, danke al mia „kapablo rapide percepti”, kiun dokumentis jam instruistoj en atesto de abiturienta ekzameno. Same mi rapide spertiĝis en tekniko de enpaĝigo, tiel ke baldaŭ la ĉefo lasis min sola plenumi tiun ĉi taskon en la kompostejo – por mi ĉiam plej ekscita tago de l' semajno.

Ene de mallonga tempo mi lernis kaj sciis ĉion, por esti sperta redaktoro kaj ĵurnalisto, laŭ ĉiuj gravaj facetoj; kaj mi gajnis reputacion. Ekzemple: kiam redaktoro de l' eklezia sekcio de radiofonio de Frankfurto legis miajn

komentariojn en *Der Sonntag*, li demandis min, ĉu mi emus verki tiajn komentariojn ankaŭ por radio. Tion mi akceptis volonte, nelaste ĉar radiofonio pagis altajn honorariojn.

Ankaŭ en Esperantujo kreskis mia renomo; profesiaj ĵurnalistoj ne estis multaj en tiu medio. Jam en aŭtuno de 1965 en mia loĝejo ni havis kunsidon de pluraj funkciuloj de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Organizaĵo (TEJO); ties prezidanto Humphrey Tonkin [hamfri] persvadis min, iĝi redaktoro de *Kontakto*, revuo por junularo, kiun li lanĉis kaj ĝis tiam mem redaktis.

Medio fremda

Tiel do kaj en mia oficiala profesia laboro kaj per taskoj en Esperantujo mi estis plene okupata, sed ja krome devis sole organizi ankaŭ mian privatan vivon, kun propra loĝejo prizorgenda. Lavi kaj gladi ĉemizojn kaj aliajn tolaĵojn mi ne povis, devis konfidi al koncernaj (kostaj) servoj aŭ al najbarino, kiu jen kaj jen helpis min. Kiom longe mi eltenos tian fraŭlan vivon? Bonŝance, tamen, kontraste al Munkeno, nun mi ne estis tute izolita, havante ja multajn kontaktojn en la redaktejo. Sed ekster tiu ĉi skipo mi ne facile trovis konatojn aŭ eĉ amikojn. Heslandanoj estis „tribo” tute fremda al mi, ne tiom familiara kiel bavaroj, inter kiuj mi vivis de infanaĝo. (Heslando estas federacia ŝtato apud la riveroj Rejno kaj Majno, kun financ- kaj komerc-metropolo Frankfurto; ĉefurbo tamen estas Wiesbaden [visbaden], vid-al-vide de Majenco. Riĉa Frankfurto vaste influas la tutan landon, kiu tiutempe tre prosperis.)

Sed – savis min, kompreneble, la lingvo internacia! Jam antaŭe mi konis samaĝulon Werner Hohl [verner hol] kaj sinjoron Heinrich Staudt [hajnrif ŝtaŭd], kiu estris la Esperanto-sekcion de Limburger Vereinsdruckerei kaj Esperanto-grupon de l' urbo kun pluraj membroj, parte jam maljunaj. Unu fojon semajne ni renkontiĝis en vintrinkejo, en agrabla kaj kutime amuza rondo. Sinjoron Staudt mi povis viziti laŭvole ĉiam, kiam mi venis al la presejo, kio okazis preskaŭ ĉiun tagon. Por li estis agrable, ke min kiel kompetentan esperantiston li povis konsulti, kiam temis pri eldonaj planoj; tion ŝatis ankaŭ la direktoro de l' eldonejo, tiel ke ankaŭ ĉe li mi akiris bonan reputacion.

Werner intertempe havis edzinon; Erika dekomence estis simpatia al mi,

kaj inverse, tiel ke ni vere amikiĝis kaj renkontiĝis ofte. Aliflanke mi enviis la geedzan paron kaj des pli sentis la mankon de propra edzino.

Kontakto brazila

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Verda fazo dua

Post la instaliĝo en la nova posteno en Limburgo mi ja nuligis eldonadon de *Kristana Ekumeno*, sed ne ĉesis verki en lingvo internacia por diversaj gazetoj. Krome, en aŭtuno 1965 mi iĝis redaktoro de *Kontakto*. Nun por la unua fojo mi redaktis gravan Esperanto-periodaĵon. La tasko, nelaste pro la teknikaj (kaj poŝtaj) kondiĉoj kun eldonado fare de Centra Oficejo de UEA, ne estis facila. Mia koncepto estis precipe, doni al la revuo soci-kritikan kaj politikan karakteron, sed montriĝis relative malfacile, trovi por tio taŭgajn aŭtorojn. La ĝenerala Esperanto-movado tiam estis nepolitika, UEA forte emfazis sian neŭtralecon. Krome, pro miaj multaj aliaj profesiaj kaj Esperanto-aktivaĵoj ofte mankis tempo. Interalie mi havis regulajn taskojn, verki komenton por Esperanto-redakcio de Radio Roma kaj satiran artikol-serion en *Germana Esperanto-Revuo*. Okaze mi verkis ankaŭ artikolojn por *Espero Katolika* (EK), organo de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). Kiam en 1966 oni serĉis novan redaktoron por EK, la estraro demandis min; al tiu peto mi ne povis rezisti, ĉar estis tre konvena tasko, por kiu mi bone povis uzi miajn profesiajn laborojn. Do subite mi estis eĉ duobla Esperanto-redaktoro, kio sufiĉe streĉis miajn fortojn. Probable estis la nura fojo, ke mi neglektis feran principon mian, nome akcepti nur tiujn taskojn, pri kiuj mi certas ke mi kapablas perfekte aŭ almenaŭ bone plenumi ilin.

Rilaton al IKUE mi ja havis dekomence. Kiel redaktoro de *Birdo* mi engaĝiĝis en preparoj por fondi oficialan junularan sekcion de IKUE; ekzemple mi ellaboris statuton por ĝi. Ni eĉ aranĝis konkurson por himno de la junulara sekcio ... Ankaŭ la nomo estis iom romantika: „La Alta Flugo” (LAF). Dum la IKUE-kongreso en Romo en 1962, kiun partoprenis 40 gejunuloj, okazis la solena fondo de LAF; prezidanto fariĝis Klaus Perko [klaŭs], Aŭstrio, sekretario Hub Weltens [veltens], Nederlando. Estraranoj fariĝis krom mi italo Antonio De Salvo kaj polino Doris Walenzyk [valenĉik]. Ni havis ambiciajn planojn, organizis korespondan kaj magnetofonan servojn, libro-servon kaj vendadon de poŝtmarkoj, volis kunlabori kun Skolta Ligo, intencis starigi informan fakon.

Satiro provoka

IKUE-estraro favore subtenis sian junular-sekcion, sed ne nur dankon rikoltis, kiel raportis Klaus Perko poste en „Mallonga historio” de LAF (1-a parto en *Espero Katolika* 1/78): „La Amuza Vespero de la kongreso estis aranĝita de la junularo; la tiam unue aperinta «bekanta birdo», kiu en kabaredo iom pike kritikis la tiaman estraron de IKUE, ankoraŭ poste sur la paĝoj de Birdo kaj interne de IKUE zorgis por konfliktoj.” Tion oni povas kompreni, se oni ekzemple legas jenan strofon de mok-kanto: „La estrar’ dum la jar’ en silent’ kaj sen pent’, sen labor’, sen fervor’, agas ne, dormas, ve! Diris ĝemante nia prezidanto: Malfacilega estas la prezid’!” La tekston verkis mi laŭ tiam furora kanto, kiu mokete priskribis vivon de indianoj kaj ilia ĉefo. Ĉagrenis min inerteco de IKUE-estraro kaj tion mi kritikis, parte provoke. Ankaŭ la kongreso en Romo estis fuŝa, kion kritikis „bekanta birdo” per atentigo pri ŝanĝoj de ŝanĝoj en la programo kaj miro, ke oni ne ŝanĝis ankaŭ la monaton ...

Pro la atakoj en *Birdo* ofendiĝis precipe IKUE-sekretariino Truus Durenkamp, kvankam ŝi tute ne estis celo de l’ kritiko. Sed „bekanta birdo” ekzemple denunciis, ke la estraro oficis kontraŭstatute, ĉar dum multaj jaroj ne okazis elektoj, neniu eĉ povis diri, kiam ĝi estis elektita! Fine, en *Birdo* de februaro 1963 aperis pardonpeto de LAF-estraro al IKUE, subskribita ankaŭ de mi. La posta numero, kvankam redaktita de mi, aperis sen mia adreso, kaj en la numero de aprilo 1963 LAF-sekretario Hub Weltens „oficiale” komunikis, ke mi ekŝiĝis kiel redaktoro kaj estrarano.

Sendube tre multaj supozis, ke tio estis konsekvenco de konfliktoj kun IKUE. Mia rezigno tamen estis rezulto de alia konflikto: en februaro 1963 oni – kiel priskribite antaŭe – forpelis min el la klerika seminario en Regensburg kaj mi devis nove ordigi mian vivon. Tial mi ne povis teni la ŝarĝon de redaktado de la revueto. Krome tiam naŭzis min ĉio, kio estis oficiale katolika ... LAF, cetere, suferas pro la perdo, ĉar apud Perko mi estis la ĉefa motoro de la junularsekcio, kiu baldaŭ eniras krizon; en oktobro 1963 aperas lasta numero de *Birdo*; en 1964 iu Reinhard Hauptenthal [rajnhard haŭpentah] fariĝas sekretario, sed ekŝiĝas en 1966. Tiun jaron, dum IKUE-kongreso en St. Gallen (Svislando) okazas lasta kunveno de LAF, kiu donas al si novan nomon „Internacia Katolika Esperanto-Junularo”; ĝi baldaŭ poste endormiĝas. Prave do Perko (kiu ekŝiĝas el la estraro en decembro 1967) skribis „Mallongan historion” – ĝi vere estis mallonga.

Nun mi do revenas al IKUE, sub komplete novaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj, ambaŭflanke. Mi estas profesia ĵurnalisto, redaktoro de renoma eklezia gazeto. IKUE-sekretario nun estas Walter Flammer [valter flamer], liberala svisa pastro; vicsekretario estas Corry van Kleef [kory fan klef], liberala nederlanda virino – ambaŭ tre aktivaj kaj kapablaj. Prezidanto daŭre estas Alfons Beckers, bonkora sed ne tre agema belga pastro, kiu estas kontenta, se aliaj laboras. Kvankam nelaste li estis celo de kritiko fare de „bekanta birdo”, kun li mi havas bonajn rilatojn. Sed precipe mi harmonias kun Flammer kaj Kleef, ĉar niaj ideoj postkonciliaj kongruas.

Nelaste pro mia influo, la kongreso en St. Gallen, organizita de Flammer, okupiĝas precipe pri ekumenaj temoj. Mi prelegas sub titolo: „Necesas ekumena teologio”. Alia liberala pastro, Ludwig Thalmaier [ludvig talmajer] el Germanio, prelegas pri „La eklezioj de la Oriento kaj la ekumenismo”. Krome okazas podiumo diskutado „Ekumenismo kaj ni esperantistoj”, en kiu partoprenas ankaŭ mi. Al St. Gallen mi venis kun konkreta imago kaj eĉ pli konkreta plano: aranĝi ekumenan Esperanto-kongreson, kiun mi pretas organizi en Limburg/Lahn. Verve mi varbas por tiu ĉi aŭdaca ideo, subtenate precipe de Flammer – kaj sukcesas: IKUE oficiale invitas Kristanan Esperantistan Ligon Internacian (KELI) al komuna kongreso en 1968 en Limburg. Krome dum tiu ĉi kongreso en Svisio pastro Beckers rezignas (kaj estas nomata honora prezidanto), lia posteulo fariĝas 33-jara laiko, nederlandano Jacques Tuinder [ĵak tujnder], fondinto de *Birdo*. (Ke tiun ĉi ŝanĝon efikis eble ankaŭ la antaŭa kritiko de „bekanta birdo” pri malaktiva estraro, mi nek povas nek volas aserti ...)

Progreso ekumena

Kompreneble jam antaŭkongrese mi sondis la terenon kaj trovis apogon ne nur ĉe pluraj IKUE-aktivuloj, sed precipe ankaŭ ĉe mia amiko Adolf Burkhardt, germana pastro kaj prezidanto de KELI. Kaj, kompreneble, kun la geamikoj en Esperanto-grupo de Limburgo mi interkonsiliĝis, por certigi ke ili pretos organizi kongreson. Baldaŭ poste ni havas konfirmon: KELI akceptas la proponon. Ni havos unikan kongreson!

Zorgeme ni preparis la kunvenon. Estis granda defio, ne nur por la eta grupo en Limburg, kiu devis organizi, sed precipe ankaŭ por la teamo el

ambaŭ estraroj, kiu devis plani programon. Tasko estis duobla: Necesis kombini diferencajn kongreskutimojn de du asocioj, kio signifis ke ni devis trovi multajn kompromisojn. Tamen tio ne estis tro malfacila, ĉar ja ĉiuj komprenis, ke temos pri tute alia kaj nova speco de kongreso. Pli malfacila estis la enhavo. Mia imago estis, ke ni havu altnivelan kunvenon, dum kiu ni vere laboru, do ne nur preĝu, kantu kaj promenu. Bonŝance preskaŭ ĉiuj en la prepar-teamo estis teologoj, ankaŭ Tuinder, kaj ĉiuj – ĉe KELI precipe Burkhardt kaj Johannes van Keulen [kojlen], redaktoro de *Dia Regno*, la organo de KELI, estis pretaj kaj entuziasmaj, krei ion tute novan kaj unikan. Ni gajnis renomajn prelegontojn por diversaj elektitaj temoj; ĉiu tago havos apartan kapvorton, kun koncerna prelego kaj posta diskutado.

Aliĝoj alfluis, spite al hezitoj kaj rezistoj kaj protestoj, precipe de IKUE-membroj en Italio kaj KELI-membroj de skandinavaj landoj. Fine estas iom pli ol 200 aliĝoj – pli ol kontentiga nombro, kvankam KELI-anoj estas konsiderinde pli multaj ol IKUE-anoj. Problemojn mi tamen havas ankaŭ pro hezitemo en katolika Limburgo mem, kie protestantaj kristanoj estas malplimulto. La dekano ja konsentas, ke ni aranĝu la kongreson en la protestanta centro de l' urbo, sed ne pretas mem partopreni; neniel mi sukcesas konvinki lin pri la graveco de Esperanto kaj de tia kongreso. En la kongreslibreto do aperas salutvortoj de katolika episkopo Wilhelm Kempf kaj de l' urbestro, sed ne de la protestanta dekano.

Kongreso unika

Dum sunbrila vendredo, la 28-an de julio 1968, okazas la solena malfermo de unika kongreso. Kiel unua ne parolas unu el la prezidantoj sed (katolika) vicepiskopo Walther Kampe, ĉar mallonge poste li devos forvojaĝi. Ke entute li venis por saluti la kongreson, tion ni kompreneble dankas al miaj bonaj kontaktoj al li. Lia parolado estas bonega kaj aktuala, la lastan frazon laŭ lia peto mi tradukis, tiel ke li povas diri en Esperanto: „Mi deziras, ke en frata dialogo kaj kristana spirito via kongreso estu fruktodona kaj benata de nia Sinjoro Jesu Kristo!” Longa aplaŭdo, kompreneble, dankas lin. En sia inaŭgura parolado Tuinder memorigas pri la parolado de Zamenhof dum la unua Esperanto-kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar, kaj epitetas la nunan kunvenon „historia”, sed emfazas ke kunvenas kristanoj kun kristanoj ne por „supraĵe babili” sed por „trovi gefratojn”. Same kiel li, ankaŭ Burkhardt en sia mallonga

salutparolado ne silentas pri hezitoj kaj rezistoj, sed esprimas sian konvinkon, ke „ni ne eniras en iun abismon”. La entuziasmaj aplaŭdoj post ambaŭ paroladoj montras, ke ankaŭ plimulto de la ĉeestantoj esperas tion.

La tiel nomitan festparoladon prezentas mi sub titolo „Fino de Milito”. Estas tre kritika prelego, en kiu mi plurfoje diras „Mi akuzas nin ...” kaj demandas, „por kio ni uzis nian lingvon?” Mi asertas: „Ni staras ĉe la fino de milito, en kiu ni ĉiuj estis malvenkintoj!” La celon de la kongreso tial mi skizas jene: Ni trovu komunan laborplanon de la du organizoj sub devizo „Tiom komune, kiom eble, tiom aparte, kiom ne eviteble.” Kaj mi finas: „Ni ne plu iru returnen, ni iru plenfide antaŭen kun Kristo!” La protokolo notas: „Forta kaj longa aplaŭdo.”

Post verva kaj entuziasmiga inaŭguro, la kongreso evoluas en bona etoso; montriĝas ke tiuj, kiuj venis, vere havas intereson pri progreso en rilatoj de la du grandaj kristanaj konfesioj kaj pretas aktive kunlabori. Ĉiuj prelegoj estas altnivelaj, same postaj diskutadoj. J. van Keulen demandas „Kie estas la eklezio de Kristo?”, profesoro W. J. Downes [doŭnz] prezentas la fundamentajn reformaciajn ideojn, Tuinder parolas pri „problemoj de la mondo”, Maria Hansen prelegas sub titolo „Kristo estas nia paco” kaj van Kleef prezentas kristanajn pacmovadojn. Okazas krome diversaj prelegetoj, fakkunsidoj, pluraj komunaj diservoj, amuza vespero kun kabaredo kaj folkloro vespero kun dancoj kaj muziko, kaj – ankaŭ por la ĝenerala publiko de l’ urbo – koncerto en la katedralo, kun diversaj kantistoj kaj precipe io ekskluziva: modern-muzika „Kantata Esperanto-Meso” de juna slovena komponisto Janko Jezovšek. La koncerto furoras kaj trovas tre pozitivan duonpaĝan recenzon en la dioceza gazeto. Amaskomunikiloj – ankaŭ danke al miaj bonaj kontaktoj – abunde kaj tre favore raportas. Eble ankaŭ pro tiu bona publika eĥo al la solena fermo la dekanon, kiu antaŭkongrese rifuzis saluti nin, sendas reprezentanton de l’ evangeliana komunumo de Limburgo por diri kelkajn laŭdajn vortojn ...

La kongreso, laŭ ĉiuj aspektoj, estis ne nur unika sed plene sukcesa. Nura misharmonio estiĝis pro la prelego de Dowens, kiu montriĝis malbone informita pri la aktuala situacio en katolika eklezio. Alian misharmonion kaŭzis itala pastro Longoni, kiu laŭte kaj forte protestis kontraŭ „interkomunio”.

Dum la solena fermo la du prezidantoj entuziasme skizis estontan komunan vojon. Oni ekzemple fondis „ekumenan komitaton” de ambaŭ organizaĵoj. Mi aranĝis enketon inter la kongresanoj. En la ferma kunveno Burkhardt povis jam komuniki unu rezulton: preskaŭ ĉiuj, kiuj plenigis enketilon, rekomendis ripeti tian komunan kongreson. La ferma kunveno krome spontane decidis, ke oni eldonu komunan numeron de *Dia Regno* kaj *Espero Katolika* pri la kongreso. Tiu ĉi 32paĝa numero de ambaŭ revuoj efektive aperis jam en septembro, kun ĉiuj dokumentoj kaj raportoj.

Kompreneble mi estis fiera, ĉar sen iu dubo tiu ĉi sukceso estis precipe mia merito. Energie kaj celkonscie mi estis preparinta la grundon por ĝi, konvinkis aliajn pri mia ideo, elane planis kaj organizis, aktive partoprenis la kongreson. Ke mi povis realigi mian ideon kaj ke preskaŭ ĉiuj estis preskaŭ komplete kontentaj pri la rezultoj – kion pli belan, pli bonan, pli entuziasmigan mi povus atendi? Retrorigarde, tiu ĉi kongreso probable estis mia plej granda sukceso en Esperantujo, tute kongrua kun tiel nomata interna ideo de Zamenhof. Mia estonta esperantista vojo devos esti brila, ĉu ne?

Fiasko kompleta

Kiel ofte, kiam iu estas en epogeo de sia kariero kaj preskaŭ tuj poste falegas, tiel okazis ankaŭ al mi. Transpreninte redaktadon de *Espero Katolika*, kompreneble mi transformis ĝin al profesinivela gazeto – nelaste tion oni ja atendis de mi. Tio signifis, ke mi plenumis mian taskon laŭ la modelo de l’ dioceza gazeto de Limburgo kaj do same kiel en ĝi ankaŭ en EK precipe aperigis informajn artikolojn, kiuj ne prisilentis problemojn kaj konfliktojn en la katolika eklezio. En komentarioj mi ne hezitis kritiki ankaŭ hierarkion, romian kurion kaj papon – same ja okazis en katolikaj komunikiloj de mezeŭropaj landoj, precipe de Nederlando kaj Germanio. Tio tamen provokis protestojn de, precipe, sudeŭropaj IKUE-anoj, kun Patro Giacinto Jacobitti [ĝjaĉinto jakobiti] en Romo ĉepinte, kiu estis prezidanto de l’ itala IKUE-sekcio. En ties organo *Katolika Sento* li daŭre atakis, akuzis kaj denunciis min pro „nekatolikeco”.

Ekskurseto historia

La komuna kongreso en Limburgo okazis ĝuste tri jarojn post la fino de l’

2-a Vatikana Koncilio, kiu alportis gravajn reformojn en multaj kampoj de katolikaj teologio kaj eklezia vivo. Ne malmultaj teologoj volis daŭrigi sur tiu ĉi vojo de reformado, tre multaj laikoj – kies rolon en la eklezio nove difinis kaj fortigis la koncilio – volis progresojn pli aŭdacajn. Estas tute nature, ke en tia situacio la pendolo svingis en la alian direkton: konservativaj fortoj, nelaste en roma kurio mem, volis returni la radon. Oni akuzis kaj denunciis „modernajn” teologojn kaj parte eloficigis ilin. La konfliktoj ofte estis tre akraj, polemikoj kaj disputoj malamaj kaj malamikaj. Papo Paŭlo 6-a, hezitema kaj necerta, trovis sin ofte en dilemo, sed pli kaj pli ofte cedis al konservativuloj. Kulmino de tia restaŭra fazo estis lia encikliko *Humanae vitae* (Homa vivo), kiu strikte malpermesis ĉiujn „nenaturajn” rimedojn kaj metodojn de naskoreguligo. Tiu ĉi encikliko embarasis progresemajn episkopojn kaj teologojn kaj vekis ŝtormon da protestoj ĉe laikoj en mezeŭropaj landoj. La encikliko aperis meze de la komuna kongreso en Limburgo ...

Tuinder, Flammer kaj mi insistis pri la linio de EK kaj defendis ĝin kontraŭ atakoj, sed estis malfacile, preskaŭ ne eble diskuti aŭ dialogi kun la kritikantoj. Ili ja ne skribis siajn kritikojn por kaj en EK, sed preferis (ofte false) prezenti siajn denuncojn en *Katolika Sento*; kiam mi sendis replikojn kaj reĝustigojn, oni simple ignoris kaj ne aperigis ilin. Do plurfoje en EK mi devis citi tekstojn el *Katolika Sento* por kontraŭargumenti kaj refuti – kurioza katolika sento! Tiu ĉi konflikto estis ankaŭ temo de la membrokunveno de IKUE en Limburgo. Oni finis la diskuton per rezolucio, kiu esprimis plenan fidon al mi, kun 37 voĉdonoj por kaj 7 kontraŭ. Sed mi eraris, ke per tio finiĝus la konflikto. Dum kunveno de la itala IKUE-sekcio oni voĉdonis pri la demando, ĉu forlasi la tegmentan asocion pro „nekatolikeco” de la redaktoro; rezulto estis 67 por kaj 62 kontraŭ IKUE!

Fendo profunda

La fendo profunda estis evidenta. Atakoj el Italio do ne ĉesis sed multiĝis, akriĝis. Miaflanke obstine mi daŭrigis mian ĵurnalistan devon, informadi pri ĉio en EK, por tiel speguli la veran vivon de mondeklezio. (Se hodiaŭ oni relegas tiutempajn artikolojn, raportojn kaj komentariojn en EK, oni facile rimarkas, ke multaj postuloj de mi kaj de aliaj intertempe estas

plenunitaj, sed tiam ili terure ekscitis kaj furiozigis konservativulojn.)

En decembro 1969 aperis dua komuna gazeto de KELI kaj IKUE kun la nomo *Kristana Esperanto-Revuo*, sed ĝi estis la lasta grandformata numero de EK. Komence de 1970 aperis kajereto en formato A5 kun 24 paĝoj, ne kompostita sed tajpita per simpla skribmaŝino. Post (aŭ pro) ideologia krizo IKUE eniris ankaŭ finanĉan krizon. Anstataŭ imponan gazeton nun mi redaktas modestan revueton – ĝuste dum la 60-jara jubileo de IKUE! Ĝin trafas kroma retropuŝo: pro disbato de tiel nomita „Praga Printempo” (ribelo kontraŭkomunista en Ĉeĥoslovakio) oni nuligas la tiulande planitan komunan kongreson kun KELI en Brno; lastmomente oni organizas ĝin en aŭstra Klagenfurt – sed partoprenas ĝin nur malmultaj membroj. Itala pastro Longoni akre atakas denove la redaktoron de EK. Estrarelektoj tamen pro nesufiĉa nombro de ĉeestantaj IKUE-anoj ne okazas en Klagenfurto; oni decidas, organizi ilin skribe inter ĉiuj membroj.

Seniluziigo plurobla

La rezulton de la skriba baloto mi aperigas sur la frontpaĝo de EK de februaro/marto 1971: prezidanto fariĝis pastro Ferdinando Longoni kun 92 voĉoj; Jacques Tuinder ricevis nur 43, eĉ ne akiris sufiĉe da voĉoj por estrarano. Karl Dürschmid [dirŝmid], estro de l' balota komisiono, skribas en sia raporto al sekretario Flammer (kiu poste rezignos pri sia posteno) i. a.: „Laŭ nia opinio la malsukceso de s-ro Tuinder ĉe la baloto ĉefe estas kaŭzita per la skribmaniero kaj atakemo de la redaktoro de nia ‚Espero Katolika’, s-ro Stefan Maul. Pri ĝi ne nur la slavoj, sed ankaŭ la italoj, francoj kaj hispanoj estas ŝokitaj. ... Kaj ĉefe la slavoj, kiuj devas vivi sub la forta premo de la ateista komunismo, estas forte ŝokitaj pri la atakoj al la papo kaj eklezio en EK.” Tuinder siaflanke en adiaŭaj vortoj aparte dankas al „nia senlaca redaktoro, s-ro Stefan Maul, kiu fordonis ĉiujn siajn talentojn kaj energion al la redaktado ...” Mi mem, en adiaŭa „Lasta P. S.” respondas al Dürschmid: „Kiel mi jam plurfoje atentigis, ĝis nun oni ŝuldas al mi precizajn respondojn al mia demando, kie, kiam kaj kiel mi atakis en EK la papon kaj la eklezion? Ĉiuj alportas nur ĝeneraligitajn riproĉojn sed ŝparas al si la detalojn, en kiuj – kiel konate – ja sidas la diablo.”

Kompreneble en tiu ĉi lasta nia numero ni ne povas ne moki kaj satiri.

Jacques, pro triumfo en *Katolika Sento* ke venkis la „sana parto de IKUE”, adiaŭas kiel „malsana prezidinto”. Corry van Kleef (kiu elektiĝis estrarano) proponas nomi Tuinder „malhonora prezidanto”, mi mem proponas 10 novajn nomojn por IKUE, ekz. „Internacia Klerikalisma Unuiĝo Esperantista”.

En letero al Longoni mi ne nur gratulas, ke „laŭ demokrata vojo” li atingis la postenon (kvankam aliloke mi atentigas, ke nur kvarono de IKUE-membroj entute partoprenis la voĉdonadon), sed kompreneble anoncas mian rezignon pri ofico de redaktoro, kiun mi plenumis dum kvin jaroj.

Plian fojon mi seniluziiĝis pri katolikismo, ĉi-foje malpli pri la eklezio mem sed pri adeptoj de religio, kiuj kateniĝis en onidire tradiciaj kaj pro tia severa tradicio nekontestablaj preskriboj „didonitaj”, kiel ajn malhumanaj kaj obskuraj ili estis. Aparte deprima por mi ĉi-okaze estis la fakto, ke oni kontraŭbatalis min precipe pro mia pledado por ekumenismo; oni kamufle kritikis tion kiel „nekatolikecon”. Sed ĉu ili ne ĉiuj estis esperantistoj, do devus – laŭ Zamenhofa impeto – kompreni, agnoski, toleri, akcepti homojn kun aliaj kredoj?

Estas mia plej grava fiasko en Esperantujo. Dolorige mi spertas, ke en tiu ĉi movado profesinivela agado ne nepre estas dezirata. Naŭzite mi kabeas.

Progreso profesia

Kaj mia privata kaj mia profesia vivo en Limburgo evoluis kontentige, plejparte bone, jen kaj jen eĉ bonege. Hilde montriĝis pli kaj pli perfekta edzino kaj patrino; bedaŭrinde nia unua filino Beate (kiu poste sin nomos Bea), naskita en 1967, kun duona jaro grave malsaniĝis kaj devis enhospitaliĝi por pluraj semajnoj, ĝuste kiam el Brazilo alvenis la familio de Hilde por ekloĝi en Limburgo. Kiam Hilde estis graveda la duan fojon, ni trovis pli grandan loĝejon centre de la urbo; en la sama domo mallonge poste povis ekloĝi ankaŭ ŝia familio. Nia dua filino Bettina (kiu poste nomos sin Betti) naskiĝis en 1969.

La laboro en la redakcio evoluis trankvile. Dufoje mi havis okazon por vojaĝi eksterlanden. La unua estis studvojaĝo al Israelo tuj post la tiel nomita „sestaga milito” en 1967, kun grupo da intelektuloj de dioceza akademio. Mi, kompreneble, eluzis Esperanton por havi kontaktojn ne nur al oficialaj instancoj kaj reprezentantoj laŭ la vojaĝprogramo, sed kun privatuloj. Interalie tiam mi amikiĝis kun d-ro Hendrik Maŝler en Tel Avivo. Poste mi aperigis artikol-serion pri Israelo, kiu mirigis kunvojaĝintojn; iuj diris: „Sed kie vi eksciis tiujn kaj tiujn detalojn? Pri tio *ni* aŭdis nenion!” Ne malfiere mi klarigis, ke tion mi dankas al miaj kontaktoj kun esperantistoj. Similan studvojaĝon mi entreprenis al Jugoslavio, por esplori la rilatojn inter la ŝtato de Tito kaj katolika eklezio. Tion mi devis fari relative kaŝe, ĉar la reĝimo tiutempe parte subpremis, parte eĉ persekutis katolikojn. Oficiale do mi kun mia edzino nur turismis tra Jugoslavio, nia naskiĝlando; ni vizitis niajn hejmvilaĝojn, renkontis parencojn, sed precipe esperantistojn, de kiuj ni eksciis la verajn problemojn. Ankaŭ pri tiu vojaĝo mi aperigis artikol-serion, en kiu tamen ofte mi ne povis malkaŝi fontojn kaj ne nomi informintojn por ne riski, ke ili suferu reprezaliojn.

Iniciato furora

Sed cetere en Limburgo mi apenaŭ povis multe verki, ĉar mia precipa tasko ja estis redaktadi. Tio por mi jam estis rutino, por ambicia juna ĵurnalisto ne sufiĉa defio. Bonŝance, je iniciato de vicepiskopo Kampe, mi krome ricevis la taskon, plani kaj poste redakti novan revuon por ekleziaj

aktivuloj; por la redakcia komitato mi sukcesis kolekti plurajn intelektulojn, tiel ke tiu ofico fariĝis tre interesa. Krome Kampe, post bonaj spertoj pri rekta kontakto kun ĵurnalistoj dum la 2-a Vatikana Koncilio, havis iom nebulan ideon: li volis instali iun oficejon por regule informi la publikon pere de ĵurnalistoj pri aferoj de l' diocezo. Kun mia ĉefo Bröckers kaj mi li diskutis la planon, kaj fine ni organizis por la unua fojo en Germanio tian inform-oficejon. Ni surprizis la publikon ne nur per instalo de dioceza proparolisto sed krome per unua komunik-ago: Ni publikigis la kompletan buĝeton de la diocezo, kun ĉiuj detaloj de enspezoj kaj elspezoj. Ekleziaj financoj ĝis tiam kutime estis tabua temo, do ne mirige ke nia iniciato furoris kaj ni povis fieri, ke denove nia diocezo estis en la unua vico de progresemo.

Iom post iom tamen ekleziaj gazetoj eniris krizon. Dum la postmilita mizero homoj plenigis preĝejojn, sed nun, ĉe la fino de l' tiel nomita „germana ekonomi-miraklo” la bonfarta socio eniris konsumismon – religiemo malkreskis, intereso pri ekleziaj periodaĵoj reduktiĝis. Eldonkvantoj de diocezaj gazetoj falis, kio estis problemo precipe por malgrandaj diocezoj, kia estis Limburgo. Bröckers provis solvi la problemojn per kunlaborado kun du najbaraj diocez-gazetoj; celo estis, havi iam centran redakcion de la tri periodaĵoj. Mi vidis ŝancon, eventuale fariĝi ĉefa kunordiganto – tasko, kiu kongruus kun miaj kapabloj kaj ambicioj. Sed hezitoj en kurioj de la tri diocezoj estis grandaj kaj oni tute ne sciis, kiam povus realiĝi tiu ĉi plano.

Plano nerealigebla

Nun mi fariĝis senpacienca, ne plu estis kontenta pri la ĉiutaga rutino en Limburgo, kaj komencis serĉi novan taskon. Certe, per *Kontakto* kaj poste *Espero Katolika* mi ja havis okazon, mem verki ĵurnalisme multe pli ol en *Der Sonntag*, sed tio ne sufiĉis al mi. Ĉu eble tial en 1969 mi kunvokis en mia hejma laborĉambro konferenceton de junaj talentuloj Ulrich Lins [ulriĥ], Michael Zeilinger [miĥael kajlinger] kaj ties frato Hans? Al ili mi prezentis la ideon, fondi politikan gazeton en Esperanto. Longe, kun junula entuziasmo, ni diskutis kaj planis kaj fine interkonsentis, ke mi esploru la aferon laŭ ĉiuj aspektoj, precipe teknikaj kaj financaj. Montriĝas, bedaŭrinde, ke tia aŭdaca plano apenaŭ estas realigebla, ĉiukaze ne sen granda start-kapitalo – kaj tiun ĉi, kompreneble, ni ne havas. (Preskaŭ samtempe, cetere, ekaperas politika gazeto *Lanterno* de

jugoslava esperantisto Ljubiša Jevtiĉ, kiu pro persekutoj devis fuĝi al Germanio kaj starigis en Munkeno eldonejon de jugoslaviaj disidentoj. Li invitas min kunlabori, kaj efektive dum kelka tempo mi verkas artikolojn en lia periodaĵo, ĝis kiam li devas ĉesi sian laboron, ĉar oni murdas kelkajn disidentojn en Germanio kaj li timas saman sorton.)

Serioze nun mi serĉas novan postenon. Ĉar kaj Hilde kaj mi dum kvin jaroj ne familiariĝis kun heslandanoj, ni strebas al suda Germanio; mi volas reiri al Bavario, kie mi vivis antaŭe. Tri ofertojn mi trovis, du en Munkeno – sed ho ve! Kiam mi revidis mian universitatan urbon, mi teruriĝis. En la bavara metropolo ĉie oni konstruis por prepari ĝin por Olimpikaj Ludoj en 1972. Ne, en tiun gigantomaniatan urbegon mi ne volis reveni. Alternativo estis posteno en Aŭgsburgo, urbo je 60kilometra distanco de Munkeno, kiun mi tute ne konis. Eldonisto d-ro Winfried Hall [vinfrid] jarmeze interkonsentis kun mi rendezuon en pitoreska urbeto de montaro proksime de Limburgo. Pri li mi ne havis tre bonan impreson; lia eta staturo kongruis kun – kiel ŝajnis al mi – eta intelekto (kaj poste montriĝis, ke mi ĝuste taksis tion). Sed la posteno, pri kiu temis, estis tre interesa por mi, kaj mi jesis mian seriozan intereson. Efektive, baldaŭ poste Hall konfirmis ankaŭ sian intereson kaj invitis min al rendezuo en la redakcio.

En decembro 1969 mi trajnis al Aŭgsburgo. La advente dekorita urbego, kun belega kristnaska foirejo antaŭ impona renesanca urbodomo, tuj impresis min: en tiu ĉi antikva kaj ĉarma ŝvaba-bavara urbo ni rapide sentos nin hejmaj. La interparoloj kun la ĉefredaktoro kaj liaj kolegoj de dusemajna magazino estis tre agrablaj. En la redakcio mi havos propran sekcion, en kiu mi povos okupiĝi pri socipolitikaj kaj socialaj temoj kaj aktivi memstare. Mi povos vojaĝi, esplori, enketi, reserĉadi, verkadi. Ĉefredaktoro estis renoma ĵurnalisto Willi Weiskirch [vili vajskirĥ], kiu (grave vundita kiel soldato ĉe la fronto) postmilite famiĝis per verketo *Nie wieder Krieg* (= Neniam plu milito), nobla persono, kiu lasis al siaj redaktoroj (kiel konfirmis la estontaj kolegoj) ĉian liberecon. Mi estis entuziasma, tuj subskribis la kontrakton kaj samtage komencis serĉi loĝejon – sed, ho ve! Tio ne estis tasko facile solvebla dum nur kelkaj tagoj. Fine mi trovis loĝejon en antaŭurbeto, kiun ni povos eniri ĝuste je jarkomenco; la 2-an de januaro 1970 mi devos ekdeĵori en la redakcio!

Posteno nova

Transiri de Limburgo al Aŭgsburgo estis loĝistika defio, des pli ke en tiu ĉi jaro mi suferis mian unuan manoperacion pro „dipitrena kuntiriĝo”. Ĉio tamen iris glate, kun kelkaj stumbloj. La 2-an de januaro 1970 mi eksidis ĉe mia skribtablo en ĉambro rekte apud tiu de l' ĉefredaktoro, kun sekretario vid-al-vide, kiu tamen laboris ne nur por mi sed por kelkaj redaktoroj.

Ekskurseto ĵurnalismika

La periodaĵo, por kiu mi precipe eklaboris, estis iom kurioza, kunfandita el du kontrastaj revuoj. Unu estis gazeto ĝuste por tiuj viroj organizitaj en societoj sub tegmento de tutgermana eklezia asocio, por kies funkciuloj mi redaktis supre nomitan internan organon. Tiu gazeto *Mann in der Zeit* (Viro en la Tempo = epoko) estis precipe politika, batalema por katolikaj ideoj en socio, ekonomio kaj kulturo. La alia periodaĵo estis *Feuerreiter* (Fajrorajdanto); spite al tia kripta nomo ĝi simple estis distra ilustrita revuo kun belaj fotoj apud raportoj ĉiuspecaj kaj edifaj artikoloj, destinitaj por katolika familio. Weiskirch antaŭe estis ĉefredaktoro de *Mann in der Zeit* – do estis klare, ke la ĉefa celo de l' ĝemela periodaĵo estos ne distra sed serioza kaj politika. Fakte ankaŭ mia sekcio „socipolitiko” konvenis al la tradicio de *Mann in der Zeit*. La ideo de la kunfandintoj estis, prezenti seriozajn temojn laŭ plaĉa maniero, do kun multaj ilustraĵoj, kaj – por teni la legantojn de *Feuerreiter* – aldoni distrajn raportaĵojn. Tial por la nova periodaĵo oni elektis la formon de magazino.

Laŭ ĵurnalismaj aspektoj estis interesa kaj riska eksperimento. Kiel kontentigi legantojn tiom diversajn de du diferencaj revuoj? Necesis multaj kompromisoj, sed se oni sukcesos, la nova magazino povos akiri (ĝis) unu milionon da abonantoj. Problemo estis aperoritmo dusemajna, kiu ne permesis veran aktualecon. Krome la elano postmilita de katolikaj viroj, kiuj pro teruraj spertoj dum nazia reĝimo kaj mondmilito aktivis en la eklezio, lamiĝis – estis la sama fenomeno, pro kiu suferis diocezaĵ gazetoj. Sed ĝuste tial ja oni kombinis tiujn du periodaĵojn, esperante ke la pli distraj elementoj de *Feuerreiter* igos virojn resti fidelaj; inverse oni esperis, vekti intereson pri politikaj temoj ĉe abonantoj de la ilustrita revuo. Per enketo oni serĉis novan nomon por la nova magazino, por tiel superi ties hibridecon ne nur en have; rezulto estis, ke plimulto de abonantoj pledis por *Weltbild* (= Mond-Bildo). Tamen tiu ĉi formalajĵo ne estis finpunkto de evoluo, sed ekiro al nova periodo de periodaĵo.

En tiu ĉi fazo de freŝa elano mi eklaboris en Aŭgsburgo. La redakcia trupeto konsistis el tre motivitaj gekolegoj, en etoso amika, konfida kaj defienda. Ni devis trovi novajn vojojn kaj metodojn, kiel plej bone realigi la donitan celon; multe ni diskutis, interkonsiliĝis kaj lernis unu de alia. Ekzemple la kolego, kiu gvidis la sekcion „eklezio” (kiu kompreneble gravis en revuo por katolika legantaro), estis „patro” (sacerdoto) de ordeno liberala. Li demandis min pri temoj socipolitikaj, kiuj eble devus ludi rolon en ekleziaj sferoj; inverse li povis sugesti al mi temojn de mia fako, pri kiuj oni diskutis en ekleziaj rondoj. Ofte dum horoj ni teologoj kunsidis, por komune trovi plej taŭgan aliron por malfacila temo. Kun tiu kolego, kvankam poste niaj vojoj disiris, ĝis hodiaŭ mi havas amikajn rilatojn.

Spertoj pliaj

Tute nova sperto por mi estis, ke ni devis intime kunlabori kun grafikistoj (kiujn hodiaŭ pli noble oni nomas „art-direktoroj”) por trovi konvenan ilustradon de artikolo; tion ni preparolis jam antaŭe, kiam ni sciis nur la temon, sed precipe poste, kiam artikolo estis verkita. En mia sekcio ofte ne estis facile, trovi manieron, prezenti ankaŭ per bildoj temon kaj tiel logi homojn al legado de serioza teksto. Jen konkreta ekzemplo: Multiĝis tiam grumbloj kaj protestoj de kamparanoj, kiuj suferis pro politiko, kiu favoris industrion kaj malfavoris – laŭ tiaj objetoj – agrikulturistojn kaj bienistojn. Mi studis la materialon, statistikojn pri amasa fuĝado de junaj kamparanoj al urboj, kiuj ne plu vidis bonan perspektivon en siaj vilaĝoj. Kio okazis? Ĉu Germanio perdos sian tradician agrikulturon? Kiu estonte nutros nin? Mi proponis la temon en la redakcia konferenco, kaj ĉiuj diris: bonega temo! Tuj poste la germana asocio de bienistoj anoncis gigantan protestan manifestacion en la ĉefurbo Bonn. Do vere aktuala temo!

Sed kiel illustri ĝin? Temas ja pri ciferoj kaj statistikoj, pri leĝoj kaj direktivoj. La grafikistoj diras: Foti oni ne povas tion, sed jes vivon de bienista familio. Krome, pri la manifestacio en Bonn raportos saman vesperon kaj postan tagon radiofonio, televido kaj ĵurnaloj – ni ja havos fotojn, sed kiun (malaktualan) raporton? Konkludo el la diskutoj: ni aperigos du artikolojn, unu pri bienista familio antaŭ la manifestacio kaj duan pri tiu protestado en Bonn, sed laŭ specifaj aspektoj. Nun mi serĉas

tipan bienistan familion kun tipaj problemoj. Kun fotisto mi vizitas la bienon; li fotas, mi esploras la konkretajn problemojn, kiuj turmentas homojn en kamparo kaj klarigas la situacion malantaŭ statistikoj. Poste, dum la manifestacio en Bonn, mi ne tiom atentis la polemikajn paroladojn de funkciuloj, sed pridemandas individuajn protestantojn. Tiel la unua artikolo per konkretaj kaj plastikaj eldiroj de homoj preparas legantojn por la temo, kiun en la dua artikolo kun pli politikaj aspektoj, klarigitaj ankaŭ per konkretaj asertoj de homoj, mi povas prezenti tiel, ke ĉiu povas kompreni. (La titolon de tiu dua artikolo, pro aliteracio, mi memoras ĝis hodiaŭ: Bauern gegen Bonn und Brüssel = Bienistoj kontraŭ Bonn kaj Bruselo).

La nova ĵurnalista sperto, helpe de grafikistoj, por mi estis ke oni povas multe pli bone ol per teoriaj kaj abstraktaj artikoloj prezenti temojn per homoj, kiujn oni montras per bildoj, kaj ke tiel aferoj fariĝas percepteblaj por leganto, ĉar li vidas personon, kiu diras ion pri si mem, per vortoj, kiujn oni komprenas.

Surprizo malagraba

La tria surprizo, kiu atendis min, estis vere malagraba kaj ĝena. Sen miaj scio kaj aprobo eldonisto Hall estis proponinta al la episkopo, ke mi instalu por li inform-oficejon, ĉar pri tio mi kompetentas pro miaj spertoj en Limburgo. Hall, kiu ne havis tre bonajn rilatojn al ekleziaj instancoj, evidente per tia komplezo volis gajni favoron de la diocezo, por pli bone negoci kun ĝi. Kiam mallonge post mia ekdeĵoro li informis min pri la afero, mi ege ĉagreniĝis, sed li simple klarigis, ke mi devas fari tion ĉar li firme promesis mian helpon. Furioze pro tia perforto, mi obĵetis ke tion ne enhavas mia kontrakto. Li replikis, ke mi ja ne devos senpage labori por la diocezo kaj ke krome ne por ĉiam; sufiĉos, ke mi instalos la servon kaj poste transdonos la postenon al alia homo.

Kion fari? Oni fiksas interparolon kun episkopo kaj ĝenerala vikario, kun kiu mi povos diskuti organizajn detalojn. Ambaŭ kun vera intereso aŭskultis miajn klarigojn kaj proponojn, post kiuj la episkopo esprimis sian firman volon, instali tian inform-oficejon, kaj komisii min por tiu ĉi tasko. Li ankaŭ konsentis, ke mi plenumos ĝin nur por komenca periodo kaj transdonu al alia persono, kiam la servo funkcios senprobleme. Do kun la simpatia ĝenerala vikario mi preparolis detalojn; li akceptis ĉion laŭ miaj

postuloj. Fine li demandis, kian salajron mi postulas. Mi vidis en tio mian lastan ŝancon, eventuale tamen eskapi – se mi postulas tre altan sumon ... Do mi diris, ke tio valoras monatan rekompenco de 600 markoj (kio estis minimume duobla sumo laŭ justaj kriterioj). Sed ho ve! Li tuj akceptis, notis mian bankkonton kaj diris, ke jam ekde januaro mi ricevos la salajron. Do mi estis kaptita! Ĉagrenis min nur, ke mi ne postulis mil markojn – supozeble la riĉa diocezo pagus eĉ tiun sumon.

Reveninte, mi informis la eldoniston pri la aranĝo. Sed nun estis la vico de Hall furioziĝi. Li imagis la aferon tute alia: La diocezo pagu al la eldonejo la servon de ties dungito kaj li donos (partan!) rekompenco al mi. Tro malfrue – mi havis klaran personan kontrakton kun la diocezo; Hall pro tio ne povus redukti mian redaktoran salajron, ĉar estis ne mia sed lia iniciato. Vi povas imagi mian malican ĝojon, ke tiel mi superruzis ruzan eldoniston ...

Tiel do okazis, ke unu el la plej konservativaj episkopoj de Germanio estis inter la unuaj, kiuj havis inform-oficejon kaj diocezan paroliston. La tasko por mi, pro la spertoj en Limburgo, estis simpla. Komence necesis kelkaj organizaj laboroj, ekzemple kolekti nomojn kaj adresojn de redakcioj kaj ĵurnalistoj en la diocezo – sed tion faris sekretariino en la oficejo, kiu situis nur kelkcent metrojn for de *Weltbild*. Mi vizitis la diversajn sekciojn de l' dioceza administracio kaj kolektis informojn, redaktis ilin kaj transdonis al sekretariino, kiu tajpis ĉiusemajnan informservon. Krome necesis prezenti min al ĵurnalistaj kolegoj kiel proparoliston de la episkopo; laŭ la modelo de Limburgo por tio mi planis gazetaran konferencon, dum kiu oni por la unua fojo publikigos la buĝeton de l' diocezo. Ties financ-direktoro estis entuziasma pri la ideo, sed mi nepre volis ke ankaŭ la episkopo mem ĉeestu la gazetaran konferencon. Montriĝis ege malfacile, trovi daton por tio, ĉar lia agendo plenis je konferencoj, vojaĝoj, devoj. Fine ni trovis konvenan daton.

Mi malfermis la gazetaran konferencon, al kiu amase venis ĵurnalistoj, per ĝema plendo pri la fakto, ke estis neeble organizi ĝin pli frue, ĉar la episkopo estas okupata „pli terure ol manaĝisto de industria kompanio”. Sole jam per tiu ĉi nekutima komparo mi gajnis simpation de la kolegoj, sed ankaŭ la leĝera kaj malkaŝa informado sub mia suverena gvidado bonege impresis, nelaste la ĉefredaktorojn de *Augsburger Allgemeine* (= Aŭgsburga Ĝenerala [Gazeto]), kio poste en mia vivo ludos gravan rolon.

Kiel en Limburgo, ankaŭ tie ĉi malkaŝado de ekleziaj financoj estis eta sensacio kaj trovis tre favoran eĥon en amaskomunikiloj.

Poste mia laboro kiel episkopa parolisto estis relative rutina – la 600 markojn monate mi gajnis sen streĉo. Okaze mi vojaĝis kun la episkopo tra la diocezo por raporti pri ĉiutaga vivo de la ĉefo kaj tiel prezenti al la publiko simpatian homon. Joseph Stimpfle [josef ŝtimfle] estis agrabla, bonkora kaj pia, sed ankaŭ tre naiva, kun intelekto ne elstara. Oni ne nur povis facile influi lin sed eĉ trompi; dum vojaĝoj mi ofte rimarkis, kiel pastroj kaj ekleziaj funkciuloj kaŝis antaŭ li verajn problemojn kaj konfliktojn, por ne balasti la bonan homon el Aŭgsburgo. Tiel li ĉiam tre kontenta kaj feliĉa reveturis hejmen, sciante ke lia diocezo estas tute perfekta ... Kompreneble, mi ne detruis lian iluzian imagon.

Sed mia plej bona ideo estis, inviti ĵurnalistojn al somera festeto en ĝardeno de l' episkopa palaco, kie ili povis frandi manĝaĵojn preparitajn de fratino de l' episkopo (la ideon mi ekhavis, kiam mi spertis, kiom lerta kuiristino ŝi estis – kaj kompreneble ŝi ege fieris pri mia propono!). Krome miajn kolegojn fascinis, ke kun bona glaso da biero aŭ vino ili povis babili tute private kun episkopo kaj gravaj liaj kunlaborantoj. Ĉiuj, inkluzive de la episkopo mem, estis tiom entuziasmaj pri tiu ĉi festeto, ke ĝi fariĝis tradicio ripetata ĝis hodiaŭ.

Skandalo evitebla

La afero do evoluis glate kaj rutine kaj mi estis certa, ke baldaŭ mi povos transdoni la malamatan oficon al alia – sed jen venis grava defio. Tiutempe oni multe diskutis pri celibato kaj multiĝis kazoj de pastroj, kiuj ne plu eltenis hipokritecon, konfesis havi amatinon (kaj infano(j)n eventuale) kaj forlasis siajn oficojn por edziĝi. Lun tagon ekscitite alvokis min la ĝenerala vikario kaj komunikis, ke la katastrofo atingis ankaŭ diocezon Aŭgsburgo kaj ke mi tuj venu al krizokonferenco. Eksciinte la faktojn – temis pri paroĥestro, kiu volis edzinigi amatinon kaj adopti komunan idon, kaj petis ke, rezigninte pri sacerdoteco, li rajtos estonte labori kiel instruisto pri religio – mi demandis, kiu ĝis nun scias pri la afero. Oni diris, ke neniu krom ili. Kaj kion oni proponos al la paroĥestro? Jes, oni volas akcepti lin kiel instruiston. Do mi proponis, ke en nia inform-servo ni aperigu simple la faktojn, sen iu morala komento. Tiel, mi pledis, ni evitos ke la afero fariĝos negativa sensacio, kiun ekspluatos

bulvarda gazetaro. Sed, obĵetis aliaj, ni nepre devas kaŝi tiun teruran aferon kaj devigi la paroĥestron kaj lian amatinon, silenti pri ĝi; tiel ni evitos hontindaĵon.

Vane mi klopodis konvinki la prelatojn, ke tiu ĉi vojo estas plej maltaŭga, ĉar mi estas certa, ke jam post mallonga tempo ĵurnalistoj ekscios pri la afero, kaj ke poste ni nur povos reagi, por iomete redukti damaĝojn kaŭzitajn per malicaj kaj mokaj raportoj. Escepte de la ĝenerala vikario, kiu estis realisma homo, ĉiuj aliaj persvadis la episkopon, sekrete trakti la aferon kaj nepre ne sekvi mian konsilon. Fine li decidis: ni silentos.

Kompreneble mi pravis. Jam la postan tagon telefonis al mi redaktoro de klaĝgazeto kaj demandis, ĉu estas vere ke ... Kion respondi? Mi povis nur diri, ke mi povas diri nenion al li. Semajnfine aperis la raporto kun sensacikonforma ĉeftitolo kaj la skandalo estis perfekta. Mi rifuzis, mem verki reagon, sed insistis pri oficiala komuniko de la ĝenerala vikario. Post tiu sperto estis klare, ke definitive mi eloficiĝos kiom eble rapide. Bonŝance jam en aŭtuno oni trovis posteulon kaj tiel finiĝis tiu ĉi epizodo. Sed en la memoro de Aŭgsburgo restis, ke mi estis pioniro ...

Periodo fruktodona

Dume Weiskirch forlasis la redakcion de *Weltbild* por fariĝi parolisto de l' kristan-demokrata partio, lian postenon transprenis vic-ĉefredaktoro Hans Siemons [simons], kun kiu mi bone harmoniis – parte eĉ tro bone. Li ofte konsultis min, kiam temis pri problemoj en redakcio kaj pri kolegoj, alte taksis miajn konsilojn kaj nepre volis, ke mi fariĝu lia viculo. Sed mi malakceptis, ĉar tio signifus ke mi devus okupiĝi pri multaj organizaj aferoj, krome ofte peradi en malagrablaj situacioj, ĉar li inklinis al koler-eksplodoj, precipe kiam li furiozis pro stulteco de eldonisto Hall. Sed mi volis verki, ne organizi kaj gvidi redakcion. Do mi proponis, ke li ĉiam ajn povos konsulti min, tamen la vicpostenon donu al alia kolego. Tiel okazis, tamen ne nepre je mia favoro, ĉar la nova viculo same estis kolerikulo, kiu ankaŭ serĉis miajn konsilojn; do denove mi estis viktimo de mia harmoniiga talento.

Cetere tiu periodo de mia ĵurnalista vivo sendube estis la plej agrabla kaj fruktedona. Grava celo mia estis, prezenti al konservativa katolika legantaro novajn ekkonojn de sociologio kaj soci-kritiko, por kio foje mi

devis esti ruza, ne nur pro abonantoj sed precipe ankaŭ pro eldonisto kaj posedantoj de la periodaĵo, kelkaj diocezoj. Ties reprezentantoj, prelatoj kiuj komprenis nenion pri ĵurnalismo, ne rekte ordonis ion sed provis influi per protestoj. Do kiel prezenti postulojn ekz. por pli humana karceroj kaj resociigado de malliberuloj anstataŭ venĝa punado? Mi vizitis malliberejojn kaj parolis ne nur kun kaptitoj kaj direktoroj, sed precipe kun tie deĵorantaj pastroj – se ili starigas postulojn, oni akceptas tion pli volonte ol se mi mem faras. Kiam temis pri samseksuloj, mi vojaĝis al Amsterdamo, kie mi trovis katolikan centron, en kiu pastroj helpis tiujn homojn, kiuj en okuloj de ordinaraj katolikoj estis pekuloj. Aŭ en politika sfero, kiel klarigi ke kapitalismo ne nepre estas beno por homoj sed havas multajn negativajn efikojn? Ne mi mem kritikis tiel, sed tion faris fama jezuita profesoro Oswald von Nell-Breuning [osvald fon nelbrojning], kiun mi intervjuis pri la temo.

Prostituado malfacila

Granda defio tiurilate estis la temo prostituado, tiam aktuala pro sensaciaj murdoj, kies viktimoj estis ĉiesulinoj. Sed kiel prezenti la problemon al katolikoj, kiuj rigore kondamnas tian malĉastadon? Longe mi cerbumis kaj serĉis, ĝis fine mi trovis monaĥinon, kiu en Nurenbergo helpis amoroistinojn, eskapi kaj komenci normalan vivon. Estis malfacile, konvinki kaj la monaĥinon kaj iun el la junulinoj, kiuj sukcesis forlasi la mizeran medion de prostituado, ĉar necesis kompreneble eviti ĉion, kio povus en posta artikolo konduki al identigo de rolantaj personoj – sukcesan eskapon sekvus fiasko pro malkaŝo. Fine unu savito konsentis kaj mi parolis, akompanate de l' monaĥino, kun ŝi. La virino estis rave bela kaj mi tuj komprenis, ke ŝi havis grandan sukceson en sia eksa „profesio” (bedaŭrinde ni ja ne rajtis foti ŝin ...), krome tute ne ĝenis sin, detale raporti pri sortoj sia kaj tiuj de eksaj koleginoj. Kun komentoj kaj klarigoj de la monaĥino mi do plastike povis prezenti la temon, montri kiel kaj kial junulinoj falas en kaptilojn de senskrupulaj prostituistoj kaj, krome, kiel katolika monaĥino kapablas helpi tiujn, kiuj volas eskapi. La artikolo do ne akuzis junulinojn, kiujn oni devas kompati, sed ekspluatantojn kaj socion, kiu ne nur ne malhelpas sed eĉ akcelas tian „malĉastadon”. (Nu ja, kelkaj legantoj tamen grumblis pro tiu ĉi artikolo, sed ne ekestis lavango da protestoj, kiel ni povus timi.)

Paralele al bonega evoluo profesia ankaŭ nia familio vivo – escepte de

loĝejo – estis tre kontentiga. Inter redakcianoj kaj aliaj urbanoj ni trovis bonajn konatojn, el kiuj kelkaj fariĝis amikoj tutvivaj, kontraste al tiurilataj problemoj en Heslando. La loĝejo estis konstruita tiel, ke oni devus ĉiutage punbati la arkitekton. Krome ĝi situis en antaŭurbo, tiel ke mi atingis la laborejon nur per aŭtomobilo; Hilde devis uzi tramon, sed la haltejo distancis je preskaŭ unu kilometro. Do mi aĉetis denove amatan Isetta, tiun kuriozan aŭteton de BMW, kiu estis mia unua propra motorveturilo. Kiam baldaŭ poste hazarde mi trovis malmultekostan sportan BMW 700, mi transiris de malkomforta Isetta al tiu aŭteto, en kiu niaj infanoj fiere sidis sur malantaŭa benko konstruita por nanoj. Kiel ajn, Hilde nun disponis pri la granda BMW-aŭto. Sed ni serĉis kaj feliĉe post ĉ. unu jaro trovis idealan kvarĉambran loĝejon en Aŭgsburgo mem, kiu situis tiom centre, ke mi povis piedmarŝi dum 20 minutoj al la redaktejo. La aŭton ni uzis nur por ekskursoj kaj vojaĝoj al foraj parencoj, ĉar tramhaltejo troviĝis preskaŭ rekte antaŭ la domo.

Inter la amikoj estis ankaŭ esperantistoj, precipe Gerald Tucker [ĝerald takr], kiun mi konis el Munkeno, kun lia amikino Stefani, kaj Margarethe Kammerer, kiun mi konis el Regensburg. Krome estis vigla Hermann Schmid [ŝmit], fondinto kaj motoro de Bavara Esperanto-Ligo. Stefanie kaj Ĝeraldo baldaŭ post nia alveno geedziĝis – ni spertis por unua fojo nuptoceremonion en Esperanto. Sed por aktivi en la loka klubo ni ne havis multan tempon, kaj kiam komence de 1971 mi kabeis post la fiasko pri *Espero Katolika*, kontaktoj al esperantistoj malmultiĝis. Nur amikon Ulrich Lins plurfoje dum profesiaj vojaĝoj ankoraŭ mi vizitis en Kolonjo, ĝis li ekhavis postenon en Japanio.

Paradizo porinfana

Estis oportuna tempo por paŭzi en Esperantujo, plene dediĉi min al profesio unuflanke kaj al familio aliflanke, ĉar nun konvenis pli intense ol antaŭe kuneduki infanojn kvar- kaj du-jarajn. Veninte hejmen, mi povis sufiĉe longe ludi kun ili, poste helpi ĉe lernejoj kaj tiel senŝarĝi patrinon. Tiam ni krome aĉetis dometon en vilaĝo Münster [minster] 30 kilometrojn sude de Aŭgsburgo, en idilia antaŭ-alpa regiono, kie la infanoj familiariĝis kun naturo kaj bestoj en vilaĝaj bienoj. Preskaŭ ĉiun semajnfinojn, kutime de vendreda vespero ĝis dimanĉa posttagmezo, kaj ofte kelkajn semajnojn dum lerneja libertempo ni pasigis en tiu domo, kiun poste ni pligrandigis kaj elkonstruis al (por ni) perfekta feria loĝejo,

kun helpo de bona amiko Gerwald [gervald]. Li estis edzo de ĉefsekretariino de *Weltbild*, fantaziriĉa arkitekto, kiu treege ĝojis ke foje li devis ne konstrui tedajn industri-halojn kaj banalajn loĝejarojn.

Komence por la infanoj estis aparta aventuro loĝi kaj dormi en domo sen luksaĵoj de urba loĝejo; ni havis elektron sed ne akvon interne, nur pumpilon ĉe puto en la ĝardeno, kaj la necesejo estis budeto en deponejo, kiu fetoris kaj estis atingebla nur de ekstere. Do unua investo estis pispoto por la infanoj, por ke dum nokto ili ne devu eliri la domon. Fascina por ili estis ankaŭ rivereto kun fiŝoj malantaŭ la domo; tie mi konstruis por ili arbokabanon, per grandaj kuvoj ili povis ŝipi en la rivereto kaj dum varmega somero refreŝiĝi en klara, pura (tiam ankoraŭ!) akvo. Dum promenadoj tra vastaj arbaroj ili por unua fojo vidis kapreolojn. Vintroj tiam ankoraŭ estis malvarmaj kun abunda neĝo, tiel ke ili povis sledi kaj skiadi (nuntempe, pro klimata ŝanĝiĝo, neĝo estas escepta fenomeno tie). Hejti per ligno en forno same estis nova sperto kiel semi kaj planti en propraj bedoj (ambaŭ eĉ sukcesis semi pomarbojn – tamen nur unu el ili disponigas bongustajn pomojn). Mi konstruis grandegan svingilon kaj baskulon, ĉevalon el ligno kaj multajn aliajn „malmodernajn” ludilojn el naturaj materialoj.

Pri najbaroj ni estis bonŝancaj. Unuflanke loĝis Kathi kaj Klaus [klaŭs] preskaŭ same aĝaj kiel ni, kun tri katoj kaj knabino kaj knabo samaĝaj kiel niaj infanoj, tiel ke ĉiam ili havis ludkamaradojn. Aliflanke loĝis maljunulo kun edzino kaj du fratinoj, kies dialekton ni komence preskaŭ ne komprenis. Li falĉis nian herbejon por nutri siajn leporojn, tiel ke ne mi mem devis falĉi (kion mi tamen lernis); krome ili havis kokinojn. Kaj ili kaj la juna familio dum nia foresto bone gardis nian domon, krome Klaus, laŭprofesie seruristo, multe helpis min en diversaj laboroj. Bea baldaŭ amikiĝis kun la sep infanoj de bienista familio kaj ofte pasigis tutan tagon tie, helpante en bieno kaj precipe stalo – pro kio Hilde regule grumblis, ĉar ŝi revenis malpura kaj fetoranta de sterko. Sed por la infanoj estis eta paradizo.

Malpli por Hilde, kiu devis mastrumi du loĝejojn; krome ofte vizitis nin amikoj kaj konatoj. Dimanĉe ni kutime tagmanĝis bonege en vilaĝa restoracio je mirinde malaltaj prezoj; alia avantaĝo estis, ke la vilaĝo havas du buĉistojn, kies varoj ne nur estas multe pli freŝaj kaj bongustaj ol en Aŭgsburgo sed ankaŭ multe malpli kostaj, tiel ke ŝi aĉetis provizon

por tuta semajno enurba. Ankaŭ niaj gastoj kompreneble tre ŝatis, ke ni regalis ilin per vilaĝtipaj frandaĵoj en idilia ĉirkaŭo. Dum varmaj someroj ofte ni sidis ĝis noktomezo ĉirkaŭ subĉiela fajro.

Iom post iom tamen ankaŭ por Hilde vivo kaj laboro en Münster iĝis pli facilaj, ĉar ade ni povis krei pli da komforto. Baldaŭ post aĉeto de l' dometo oni provizis la vilaĝon per akvotuboj, tiel ke ni povis instali elektran boligilon en la kuirejo, kiun mi rekonstruis tiel, ke ni facile povis varmigi ĝin ankaŭ dum vintro, starigi fridujon kaj taŭgajn meblojn. Sekvis konstruado de banĉambro kun duŝejo kaj necesejo kun fluanta akvo kaj fine ni konstruis rektangule alon, tiel ke ekestis granda ĉambro kun kameno kaj subtegmente dormejo, kiu sufiĉis por pli ol dek personoj. Por mi estis belege, ke mi povis dediĉi min al manlaboroj, kio ja konvenas al mia inklino de la tempo, kiam mi helpis en tio mian avon. Nun mi lernis miksi morteron, masoni fundamentojn kaj murojn, tegi plankojn kaj murojn per kaheloj kaj per bretoj, ĉarpenti meblojn kaj fine eĉ torni lignon (mia „majstroverko” estis granda ŝakludo el fagoligno). Meblojn parte mi trovis en rubodeponejoj, kiuj tiam ankoraŭ troviĝis en vilaĝoj; bienistoj ofte forĵetis malnovajn meblojn, kiam ili aĉetis „modernajn”, sed la forĵetitaj parte estis preskaŭ ne difektitaj, nur ne plu amataj. Facile mi povis ripari ilin kaj Hilde farbis kaj dekoris la solidajn meblojn per bildoj kamparanstilaj.

Tia monŝpara ekipado necesis, ĉar principo estis, ke ni elspezu laŭeble malmulte por tiu feria domo, ĉar nur tiel ni povos financi ĝin. Multe helpis nin amikoj kaj parencoj, inter kiuj estis farbisto, ilarfaristo kaj elektrikisto. Celo estis, krom konatigi infanojn kun naturo, for de brua urbego ripozadi en pura aero, amuziĝi dum privataj festoj (kiom da ni organizis tie!) ankaŭ financa: la nemoveblaĵo, tereno kaj domo, dum paso de l' jaroj iĝos pli kaj pli valora kaj povus, eventuale, en okazo de bezono, esti monrezervo dum kriza situacio. Kaj precipe ĝi estu nia dua, precipe somera loĝejo, kiam Hilde kaj mi estos maljunaj kaj povos ĝui kvieton de pensiula vivo. Ke tion parte malfaciligos la fakto, ke post pluraj manoperacioj mi ne plu kapablos senprobleme plenumi ĉiutagajn taskojn en Münster, tion, kompreneble, tiam ni ne imagis ...

En tiu dometo, cetere, gastis ankaŭ multaj Esperanto-amikoj, tamen nur post mia kabea fazo.

Tasko terura

Laborado ĉe *Weltbild* dume iĝis pli kaj pli rutina. Okaze tamen taskoj estis jen teruraj, jen amuzaj. Plej aflikta sperto por mi estis, kiam manke de alia kolego mi devis raporti pri grava trajn-akcidento, per kiu mortis pli ol 40 homoj. Neniam mi forgesos, kiel helpantoj tiris mortintojn el renversitaj vagonoj kaj kolektis kadavropartojn sur vasta tereno apudrela. Bonŝance, tamen, mi ĵus libertempis, kiam en 1972 okazis la tragedia masakro fare de palestinaj teroristoj dum la Olimpikoj en Munkeno kaj miaj kolegoj devis raporti pri tiu teruraĵo, kies viktimoj estis israelaj sportistoj.

Inter la pli amuzaj taskoj estis vojaĝo kun malsanaj soldatoj, kiujn oni transportis per avio por pilgrimado en Lourdes [lurd]. Flugado per malkomforta kaj terure laŭta arma transport-avio estis same aventuro kiel observado de jen pia jen komerca aktivadoj en la mondfama franca pilgrimejo.

Agrablaj estis ankaŭ invitoj de turismaj asocioj; tiel, ekzemple, mi povis vojaĝi tra bela itala insulo Sicilio. Kulmino de amuzo kaj kuriozo por mi estis tiel nomita film-balo. Jes, ĉu oni kredas aŭ ne, mi, serioza ĵurnalisto, vere partoprenis tian balon! Tio okazis jene:

Unu tagon alvokas min publik-rilata manaĝisto de germana aktoro al mi tute ne konata, Klaus Wilcke [klaŭs vilke] kaj invitas min (kun edzino) al film-balo en Hispanio. Kiam mi klarigas al li, ke mi ja estas estro de nia sekcio „socio”, sed ke tio ne – kiel en klaĉgazetoj – inkluzivas temojn de tiel nomata *high society* (kiel novgermane oni jam tiam nomis la medion de veraj kaj pseŭdaj eminentuloj kaj filmsteluloj), li replikas, ke la aktoro intencas ĝuste tion: li volas eniri ne nur klaĉgazetojn sed ankaŭ seriozajn periodaĵojn. Nu, mi pensas kial ne ekkoni tiun „altan societeton”? Sed mi avertas lin, ke mi ne devigas min verki raporton pri la grandioza evento. Li akceptas. Ĉar ĉio estas senpaga, ankaŭ mia ĉefo permesas.

Ni flugis al Barcelono, kie atendis nin taksio, en kiu jam sidis du personoj al ni tute ne konataj. Nur iom post iom survoje ni komprenis, ke estis uson-germana kanzonistino Peggy March [pegi maĉ] kaj ĉefredaktoro de unu el tiuj klaĉgazetoj. Dum plurhora veturado la stelulino arogante parolis preskaŭ tute ne, dum la ĵurnalisto ne ĉesis babilaci. Fine ni atingis

gigantan hotelaron apud Mediteraneo kaj ekloĝis en luksa ĉambro. La postan tagon mi rajtis de proksime observi la aktoron, kiam oni filmis kelkajn scenojn en boato surmare; teda afero por mi. Vespere okazis la balo. Ni sidis ĉe granda tablo kun i. a. kelkaj belulinoj, el kies stultetaj kaj parte vulgaraj konversacioj ni eksciis, ke ili kutimas pozi nude por turismaj artikoloj en pornografia revuo. Kompreneble oni servis luksegan manĝaĵon kun vinoj kaj ĉampano. Poste kantis tiu Peggy March kaj antaŭ malfermo de l' balo Klaus Wilcke salutis eminentajn gastojn persone, ankaŭ la ĵurnalistojn. Kiam li aŭdis, en kiu redakcio mi laboras, li estis aparte afabla kaj parolis longe kun mi; efektive mi akiris la impreson, ke li estas serioza aktoro kaj iel mi sentis, ke la tuta kuliso de tiu „alta societo” kaj li ne vere kongruis. Cetere la balo estis terura; ni ja iomete dancis, sed kiam baldaŭ poste la unuaj societanoj estis ebriaj kaj unu el ili komencis persekuti mian edzinon kun evidenta intenco, Hilde kaj mi fuĝis el tiu medio de banaleco kaj enlitiĝis.

Kelkajn tagojn post nia reveno telefonis la manaĝisto. Kiam mi diris al li, ke mi ne aperigos artikolon, ĉar mi ne volas primoki kaj eble ofendi tiujn homojn, li bone komprenis. La filmon tie produktitan mi neniam vidis, sed legis ke ĝi estis fiasketo. Ŝajnas, ke la aktoro mem ankaŭ fuĝis el la medio, ĉar kelkajn jarojn poste lia nomo malaperis el klaĉgazetoj.

Ĉefredaktoro portempa

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta eldono de la libro. Mendu ĝin de www.retbutiko.be

Fazo lasta

Kiel daŭrigi mian ĵurnalistan karieron? Unu premiso estis tute klara: mi eskapos el katolika medio, kiu tiom ĉagrenis, parte turmentis kaj mistraktis min. Do mi serĉos postenon ĉe „neŭtrala” komunikilo. Mi nun estis 38-jara, havis profesian sperton de 13 jaroj en diversaj redakcioj, do bonajn ŝancojn por akiri bonan postenon en ĉiu serioza komunikilo, precipe presata. Ne altiris min aŭd-vidaj komunikiloj, por kiuj mi ne taŭgas ĉar mi ne estas parolema. Aliflanke mankis al mi spertoj pri ĉiutaga periodaĵo. Do mi decidis, fariĝi redaktoro de ĵurnalo. Tamen mi ne akceptos iun ajn postenon, sed konforme al miaj precipaj spertoj kaj inklinoj en sekcioj politiko aŭ socipolitiko. Alia, privata premiso, tamen, estis ke ni ja volos teni nian ferian domon; do necesis trovi postenon en ne tro fora loko, en Aŭgsburgo mem, en Munkeno aŭ alia proksima urbo.

Per kolego mi eksciis, ke *Schwäbische Zeitung* [ŝvebiŝe caitung = Ŝvaba Gazeto] en Leutkirch [lojtkirĥ] en la regiono de l' Alpoj serĉas redaktoron, sed unue mi demandis ĉe *Augsburger Allgemeine* [aŭgsburger algemajne = Aŭgsburga Ĝenerala (Gazeto)]. Kontakton al unu el ties ĉefredaktoroj peris alia kolego de *Weltbild*; tiu, Gernot Römer [remer], akceptis min kaj iris kun mi al la ĉefredaktoro respondeca pri politiko, Georg Bartholy [bartoli]; krome oni alvokis trian ĉefredaktoron, kiu havis bonajn kontaktojn al la katolika eklezio kaj pro tio konis min el mia tempo, kiam mi estis proparolisto de l' episkopo. Oni ofertis al mi interesan postenon kaj bonegan salajron, sed ĝenis min, ke oni atendis ke mi – kiel oni diris – „kontraŭpezu la maldekstrulojn” en la politika sekcio. Mi, kiu ĉiam estas lojala al ĉiuj kolegoj, „dresu” iujn el ili? Ne, tio ne plaĉis al mi, des pli ke ŝajne ili opiniis ke mi estas konservativa, nur ĉar mi ĝis nun laboris en katolikaj komunikiloj. Ni interkonsentis, ke mi havu tempon por pripensi kaj poste informu, ĉu mi akceptos aŭ ne.

Nun do mi kontaktis la ĉefredaktoron de *Schwäbische Zeitung* (SZ), kiu tuj invitis min al interparolo. Mi devis konsulti la mapon por trovi la vojon al Leutkirch, urbeto en la regiono Algovio en suda Baden-Virtembergo, kiun mi tute ne konis. Estis historia kaprico, ke centralo de tiom renoma ĵurnalo troviĝas en provinca urbo; dum la milito oni tien translokis la

centralon kun presejo el Friedrichshafen [fridriĥshafen], havenurbo apud Konstanca Lago, ĉar ĝi havis avi-industrion (naskiĝis tie la fama zepelino) kaj do estis preferata celo de bomb-atakoj, kontraste al Leutkirch, kiu ne interesis malamikojn de nazia Germanio. Postmilite la provizora centralo iĝis definitiva.

Sian renomon la ĵurnalo dankis nelaste al ĉefredaktoro Chrysostomus Zodel [krisostomus codel] – lia nomo estis simile nekutima kiel la viro mem, bastarda infano de katolika pastro, etstatura (moknomo: „la kuranta metro”), sed bonega ĵurnalisto kaj sagaca analizanto. Mi estis tre scivolema ekkoni tiun homon. Kiam mi eniris lian modestan oficejon, mi estis embarasita pro lia naneco, sed ankaŭ pro alia eco karakteriza por li (kiel mi konstatis poste): li preskaŭ ne parolis. Zodel diris nur, ke laŭ mia materialo sendita mi konvenas por la posteno, ke mi krom politiko prilaboru temojn de l’ katolika eklezio (ĉar mi ja estas teologo). La salajro ofertata egalas al tiu en Aŭgsburgo. Ni interkonsentis, ke mi havu tempon por pripensi – post kvarona horo la interparolo estis finita ...

Mi okupis la hotelĉambron rezervitan por mi kaj havis sufiĉe da tempo por esplori la urbeton. Ĝi forte memorigis min pri Wunsiedel: ĉarma, pitoreska, trankvila, situanta en belega pejzaĝo ĉe la piedo de l’ Alpoj. Ideala loko por libertempi – sed ĉu ankaŭ por labori kaj daŭre vivi? La kontrasto al urbego Aŭgsburgo estis giganta – ĉu Hilde eltenos tie?

Reveninte hejmen, mi detale priskribis ĉion kaj ni longe diskutis ĉiujn aspektojn de la alternativoj Augsburg kaj Leutkirch. Laŭ profesiaj kriterioj mi preferis la postenon ĉe *Schwäbische Zeitung*, ĉar mi opiniis ke en redakcio malgranda (la politika skipo tie estis kvarpersona, tiu en Aŭgsburgo dekpersona) mi pli facile povos integriĝi kaj pli bone lerni en kampo nekonata por mi. Kun tie akiritaj spertoj mi facile povos poste transiri al pli granda ĵurnalo. Krome la strukturoj en Leutkirch estis pli klaraj, ne tiom komplikaj kiel en Aŭgsburgo kun tri ĉefredaktoroj kaj ĉefa ĉefredaktoro, mia tasko en Leutkirch estis precize difinita, ne tiom nebula kiel ĉe *Augsburger Allgemeine*. Kaj en Leutkirch mi ne devos „dresi” kolegojn ...

Problemoj privataj

Laŭ financa vidpunkto ambaŭ postenoj estis egalaj, kvankam certe en

Leutkirch vivkosto estos malpli alta. Aldoniĝis por mi psikologia avantaĝo: estus bone por mi forlasi, almenaŭ por kelka tempo, urbon kie mi spertis karierajn kulminojn sed ankaŭ plej grandan profesian fiaskon. La veraj problemoj troviĝis en privata sfero. La feria domo estos malpli proksima, estos drasta diferenco en viv-stilo, kvankam eta urbo sendube havas multajn avantaĝojn, precipe por infanoj. Aliflanke por la infanoj estos malfacile, forlasi geamikojn kaj la familieran lernejon. Por Betti estis pli facile, ĉar ŝi transiros en 1979 de elementa lernejo al gimnazio, sed por Bea la translokiĝo signifis, ke ŝi devis post la unua gimnazia klaso kun latina kiel unua lingvo transiri al dua klaso de gimnazio, kie la unua lingvo estas angla – ŝi devos private postlerni tiun ĉi lingvon. Krome, pro la lerneja jaro finiĝanta dum somero, ni povos translokiĝi nur meze de 1979, tiel ke mi sola devos loĝi dum duona jaro en Leutkirch. Ĉar por ĵurnalo mi devos labori foje ankaŭ dimanĉe, eĉ ne eblos ke mi vizitu la familion ĉiun semajnfino.

Fine tamen ni decidis: ni iros al Leutkirch. Do mi telefonis al Zodel kaj tuj, kiam mi havis la kontrakton, telefonis al Bartholy. Li sendis al mi afablan leteron, per kiu li bedaŭris mian decidon sed skribis, ke mi ne hezitu telefoni al li, „se pro iu ajn kialo via vojo rekondukos vin al Aŭgsburgo” – tiu ĉi frazo estis tre valora „revenbileto” por mi, kiel montriĝos post kelkaj jaroj.

Adiaŭ al Augsburg

La adiaŭo en la redakcio de *Weltbild* estis kora kaj emocia. Ĉefredaktoro Siemons kaj ĉiuj kolegoj ege bedaŭris mian foriron; ili donacis al mi valoran pipon kiel memoraĵon. Multe pli malfacile estis adiaŭi mian familion por duona jaro. Estis severa vintro. Sur neĝoplenaj stratoj, kun peza koro mi veturis renkonte al eble riska nova periodo de mia vivo. Sed ni ja interkonsentis pri kvaronjara provtempo, do se ne plaĉos al mi, post tri monatoj mi povos adiaŭi.

Mi establiĝis en hotelo kaj en ties restoracio vespermanĝis, poste serĉis konsolon en multaj glasoj da biero. La postan tagon je la deka horo mi prezentiĝis en la redakcio, kie tre afable akceptis min Werner Schwab [verner ŝvab], ĉefo de la sekcio „politika informado”. Dekomence ni estis tre simpatiaj unu al alia (ne daŭris longe, ĝis li deklaris min lia amiko). Li estis kurioza homo laŭ pluraj aspektoj: komunisto (en konservativa

redakcio kun ĉefredaktoro kristan-demokrata), sed absolute objektiva ĵurnalisto kaj bonega redaktoro pri informado, rapidega redaktanto kaj rutinisto, grandioza instruanto por mi en tiu ĉi fako. Tolerema kaj absolute lojala ĉefo kaj kolego, persone aminda. Li fumegis, postlabore drinkis, foje ĝis ebrio, bonege kuiris (post divorco li vivis sola) kaj estis unu el la plej spritaj homoj, kiujn mi renkontis. Krome li estis ege inteligenta kaj pro tio kaj pro la profesia perfekteco tre respektata de Zodel. Kiel ajn, mi ne povis trovi pli bonan majstron por lerni la metion de ĉiutaga, rapida informado en ĵurnala redakcio! Al Schwab mi dankas, ke tiu ĉi fazo de mia ĵurnalista kariero estis la lasta – kion tiutempe mi tute ne imagis. (Mi finos mian profesion vivon en la sama pozicio: dum lastaj 15 jaroj ĝis mia pensiigo mi estos ĉefo de politika informado en ĵurnalo.)

Tekniko nova

Nova por mi estis ne nur la fako sed ankaŭ la tekniko, ĉar SZ estis inter la unuaj ĵurnaloj en Germanio, kiuj enkondukis tiel nomitan „lumkompostadon”; tio signifis, ke ni ricevis tekstojn de inform-agentejoj kaj korespondantoj per telekso, redaktis surpapere, transdonis al kompostistoj, sed poste mem per komputilo elredaktis la artikolojn tiel, ke ili havis ĝustan amplekson. Proprajn artikolojn ni tajpis per skribmaŝino. Komputilo por mi estis tute nova, sed la sistemo tiama estis relative simpla, tiel ke rapide mi ellernis manipuladojn.

Ni estis kvar kolegoj en eta ĉambro (sed oni jam planis konstrui novan parton, kie ni havos pli grandan oficejon). La du aliaj estis arme-fakulo, tre konservativa viro samaĝa kiel mi, kaj iom pli juna medicin-fakulo, kiu ne estis trovinta postenon adekvatan al siaj studoj. Kun li mi ankaŭ amikiĝis baldaŭ, sed ne kun la arme-fakulo, kvankam li bone rilatis kun mi. Krome estis du kolegoj de sekcio „paĝo 3”, unu por internlandaj, alia por eksterlandaj aferoj, kun kiuj ni konstante kunlaboris; unu estis al mi tre malsimpatia, la alia, kiu kompetentis pri eksterlando, estis agrabla aŭstro, kun kiu mi bone harmoniis.

En la informa sekcio ni havis tri diversajn labortempojn. Unu kolego deĵoris de 10 ĝis 18 h; li akceptis, ordigis kaj distribuis la materialon (tekstojn kaj fotojn), komunikis kun aliaj sekcioj pro eventualaj temoj gravaj por la frontpaĝo kaj kun korespondantoj. Li decidis, kiuj temoj aperu sur kiuj paĝoj, kaj planis paĝon 2. Du kolegoj deĵoris de 14 ĝis 20

h; ili ricevis taskojn de l' direktanta kolego kaj post ties foriro elpretigis paĝon 2. La kvara kolego eklaboris nur je 16 h kaj deĵoris ĝis noktomezo; li transprenis la ordigitan materialon kaj sole pretigis la frontpaĝon, sed nokte devis aktualigi la paĝon, kiam okazis io grava post ekspresado. Kiam unu kolego libertempis aŭ malsanis, dum posttagmezo je dispono estis nur unu helpanto. La tri deĵor-periodoj alternis ĉiun semajnon laŭ rotacia sistemo, tiel ke minimume ĉiun kvaran semajnon mi devis deĵori nokte, kio sufiĉe perturbis mian vivoritmon (kaj tiun de l' familio). Dimanĉe ni laboris nur duope; tiu deĵoro trafis ĉiun el ni minimume ĉiun trian semajnon.

Ekskurseto ĵurnalismika

SZ estas regiona ĵurnalo kun strukturo tre ofta en Germanio. Historie tiaj ĵurnaloj estiĝis per kunigo de lokaj (urbaj) ĵurnaloj, precipe post la 2-a mondmilito, kiam pro ekonomiaj kialoj memstaraj etaj gazetoj havis malfacilaĵojn. Kutime tamen tiuj urbaj ĵurnaloj konservis siajn historiajn nomojn kaj havis siajn proprajn lokajn sekciojn (kun lokaj redaktoroj); SZ havas entute 22 diversajn eldonojn. Tial konstante oni devas interrompi presadon por ŝanĝi la kapon sur frontpaĝo; por egaligi tiun ĉi tempoperdon la gazeto estas presata en tri diversaj urboj. Avantaĝo estas, ke pro tio oni devas ekspresi nur tre malfrue, se necese nur je la 22 h, kaj tiel kapti ankaŭ eventojn vesperajn.

Konsekvenco de tia strukturo estas manko de konkurenco; do ankaŭ SZ havas monopolon en preskaŭ la tuta regiono. Tio kondiĉas ke la ĵurnalo devas esti sendependa, neŭtrala kaj plejeble objektiva, precipe en partipolitika kampo, ĉar la redakcio devas respekti opiniojn kaj ideologiojn de ĉiuj gravaj sociaj grupoj kaj tavoloj, de religioj, sindikatoj, partioj. Tio, kompreneble, aparte validas por politika informado, kiu devas esti rigore objektiva, ĉu plaĉas al redaktoro koncerna mesaĝo de ekzemple politikisto aŭ ne.

La nova laboro tre plaĉis al mi, parte fascinis min. Estis tre interese spertiĝi ne nur pri ĉiuj politikaj kampoj kaj mondsferoj sed ankaŭ pri aliaj ĝis nun por mi ne tiom familiaraj, ĉar sur la frontpaĝo aperis ofte ja ankaŭ temoj nepolitikaj. Precipe dum nokta deĵoro, kiam ĉeestis nur mi kiel sola

redaktoro, mi devis prijuĝi kaj eventuale prilabori novajn eventojn en ĉiuj „klasikaj” sekcioj, tertremon en Turkio same kiel morton de fama aktoro en Holivudo aŭ sport-skandalon.

Tiel por la unua fojo mi fariĝis iom post iom „komplet-ĵurnalisto”, kiel oni karakterizas tian redaktoron. Tamen kompreneble, kiel menciite, ĉiu el ni havis siajn specialajn kampojn; Schwab estis fakulo pri sindikatoj kaj komunismo kaj aparte (tiam ankoraŭ ekzistanta) socialisma Germanio, nia arme-fakulo krome kompetentis aparte pri germana parti-politiko, mi mem laŭkontrakte kiel specialan kampon havis katolikan eklezion kaj religion. Krome mi prenis por mi kiel preferatan kampon eksterlandajn aferojn, al kio mi ja inklinis kiel esperantisto; por plispertiĝi en tiu kampo multe helpis min kolego Riener de l’ sekcio „paĝo 3”. Ne tiom plaĉis al mi, ke Zodel komisiis min apud aliaj taskoj ankaŭ redakti paĝon kun recenzoj pri politikaj libroj, sed mi ne havis konvinkan kialon rifuzi.

Konforme al miaj taskoj, unuaj mem verkitaj artikoloj kaj komentarioj en SZ temis pri katolikaj aferoj; jam fine de januaro aperis tre ampleksa artikolo sur paĝo 3 pri baldaŭa unua vojaĝo eksterlanden de papo Johano Paŭlo 2-a, al Meksiko, kun klarigoj pri celoj kaj intencoj de tiu vojaĝo. Sekvis pluraj tiukampaj tekstoj, ĝis en aprilo por la unua fojo mi komentariis pri nekatolika temo. Dum somero oni sendis min al katolika kongreso en Berlino, pri kiu mi raportis plurfoje. En aŭtuno aperis unua komentario mia pri eksterlandaj aferoj.

Spertoj novaj

Ĉiel ajn mi ne nur rapide lernis kaj spertiĝis en la nova metia kampo de informado, sed ankaŭ bone integriĝis en la redaktora teamo; oni respektis min pro miaj fakaj scioj kaj kompetenta laboro, multaj gekolegoj agnoskis kaj ŝatis mian lojalan kaj por ili agrablan konduton. Iom post iom mi amikiĝis kun multaj el ili. Ankaŭ la etoso en nia kvarpersona grupo estis bona. Kiam antaŭ fino de l’ provtempo Zodel enketis inter la kolegoj, ĉiuj forte pledis por mi, kaj ankaŭ li mem estis tre kontenta – same kiel mi. Do estis klare, ke mi restos en Leutkirch, des pli ke la afero *Semajno* ne evoluis bone sed nur vegetis.

Malpli bone, tamen, evoluis mia privata vivo. Por la unua duonjaro mi luis etan, preskaŭ mizeran ĉambron en la domo de iom skurila artisto, kiun mi

uzis nur por dormi. Mian ceteran liberan tempon mi pasigis aŭ babilante kun kolegoj en la redaktejo aŭ en restoracioj. Neniel mi estus imaginta, ke vivo de izolulo, sen mia amata familio, estus tiom malfacila, ja turmenta por mi, multe pli ol tiutempe en Munkeno, kie mi ankaŭ estis sola. Certe, laŭeble ĉiun semajnfinojn mi veturis hejmen al Aŭgsburgo, sed dum severa vintro ankaŭ tio estis streĉa kaj malagrabla. Sur neĝaj, glataj stratoj dum vendreda nokto veturi (laca post tuttaga deĵorado) ĉ. 80 kilometrojn per eta aŭto estis eĉ danĝere; tial mi aĉetis pli grandan aŭtomobilon, solidan Mercedes dizelan. Bonŝance, tuj poste finiĝis vintro.

Sed nun, kiam pasis la provtempo, montriĝis ege malfacile trovi adekvatan loĝejon por la familio en tiu ĉi eta urbo. Fine mi devis lui kvarĉambran loĝejon en aĉa domo deketaga, rande de l' urbo sur monteto. Por atingi la redaktejon, por aĉeti en la urbo ni devos uzi aŭtomobilon, transporti per ĝi la infanojn al kaj el la lernejo. Ni decidis, tuj daŭrigi serĉadon de alia loĝejo kaj kiam en somero ni transloĝiĝis de Aŭgsburgo, ni elpakis nur tion, kion ni nepre bezonas – ni eĉ ne sternis tapiŝon en la salono ... Sola avantaĝo por la infanoj estis, ke tuj apude estis granda arbaro por ludi. Jam dum la ferioj Bea havis privatajn lecionojn por lerni anglan lingvon, kaj ni miris pri ŝiaj energio kaj fervoro (efektive ŝi brile sukcesis dum enira ekzameno por la 2-a klaso de l' gimnazio). Sed ni ĉiuj estis malfeliĉaj pri la situacio en malamata loĝejo, longe for de pitoreska kaj agrabla urbocentro. Aliflanke, kompreneble, ni ĉiuj estis feliĉaj ke fine la familio denove estis kuna, kvankam ni tre bedaŭris disiĝi de geamikoj en Aŭgsburgo – kiu scias, ĉu en Leutkirch ni trovos novajn?

Gazeto unika

La projekto *Semajno* evidente ne estis realigebla; tio estis klara plej malfrue dum printempo 1979. Nur kelkcent abonemulojn ni sukcesis kolekti, la nepre necesa nombro de 10 000 estis utopia. Konsekvence mi ja definitive akceptis la postenon en SZ en Leutkirch kaj do eĉ ne plu povus realigi projekton, por kiu mi devus labori plentempe. Se mi ne volas perdi konsiderindan sumon da mono, mi devis ĝustatempe haltigi la aferon, precipe ne plu elspezi por varbkampanjo. Laŭ miaj kalkuloj el vendoj de nul-numeroj ni enspezis preskaŭ tiom da mono kiom ni elspezis por presado kaj reklamoj – do, se nun mi ĉesos, financa perdo estos eltenebla.

Eksperimento fiaskinta

Kun peza koro mi deklaris la eksperimenton fiaska kaj „fermis la butikon”. Montriĝis, ke efektive la merkato por tia revuo ne estis sufiĉe granda aŭ ne facile konkerebla. *Semajno* restos unika epizodo en Esperantujo. Multaj kompreneble bedaŭris tion, aliaj triumfe mokis „ĉu ni ne tuj avertis vin, ke estas utopio?” Ili ne komprenis, ke simple temis pri laŭeble malmultekosta, praktike sola ebla metodo, testi la merkaton. Dekomence mi kalkulis ne nur pri eventuala sukceso sed same pri fiasko.

Tute alia, neatendita reago venis kelkajn monatojn poste. Alvokis min eldonisto Torben Kehlet [kelet] el Belgio, proponante eldoni samtipan revuon monatan. Mia reago estis rigora „ne”, ĉar la koncepto estis ellaborita por semajna revuo kaj ne taŭgis por monata aper-ritmo, kiu ne ebligus aktualecon. Sed Torben insistis kaj nepre volis viziti min por trankvile diskuti la ideon. Bone, se li volas perdi tempon kaj vojaĝelspezon ...

Torben post transpreno de fama marko „Stafeto” fondis eldonejon TK/Stafeto, posedis propran presmaŝinon kaj sufiĉe da kapitalo por investi. Eldoni krom libroj ankaŭ revuon, konvenus al liaj programo kaj teknikaj kondiĉoj. Laŭ li la intereso pri *Semajno* montris, ke sendube oni ŝatus havi tian gazeton, sed ne kapablas elspezi relative altan sumon por semajn-gazeto. Laŭ liaj kalkuloj oni povus produkti monatan gazeton

bonkvalitan por modera prezo, tiel ke sufiĉe da homoj povus pagi abonkotizon; sufiĉus iom pli ol mil abonantoj por vivteni la revuon. Komposti oni povus je moderaj kostoj en Grafika Centro de UEA en Antverpeno kaj en Brazilo. Mi mem havus nenian finanĉan riskon, ĉar li pretis kompletajn portojn ĝin.

„Bastardo ĵurnalisma”

Bone, rigardante la objekton per okuloj de eldonisto, oni povis trovi alian planon alloga; de mia flanko, redakti monatan revuon eblus dum libertempo. Sed laŭ ĉiuj ĵurnalismaj kriterioj ne eblis simple transpreni la koncepton por monata gazeto, kiun mi nomis „ĵurnalisma bastardo”. Precipa kaj gravega obstaklo estas, ke monata revuo neniel povas esti vere aktuala. Torben opiniis, ke oni certe povos adapti mian koncepton por monata ritmo, kaj per sia ĉarmo li pli-malpli persvadis min, almenaŭ pripensi kaj eventuale ellabori konvenan koncepton.

Certe, multajn elementojn mi povos transpreni por monata gazeto, sed inter verkado kaj legado en la gazeto pasos meze ses semajnoj. Leganto tenas en memoro facile eventon dum du semajnoj, tiel ke skribante pri ĝi aŭtoro povas supozi ke oni konas la aferon. Sed por monata gazeto verkanto devas unue resumi, rememorigi eventon, pri kiu li volas skribi. Aŭ oni elektas temon, pri kiu la „granda” mondo (publiko) preskaŭ ne scias, ĉar pri ĝi ne informas internaciaj agentejoj. Alia ebleco trakti temon en monata revuo estas verki analizojn pri evoluoj, tendencoj kaj fasko da similaj eventoj – kio donas al artikolo certan aspekton de aktualeco. En semajna gazeto (ankaŭ pro la por ĝi uzata pli rapida tekniko) eblas enŝovi artikolon kvazaŭ lastminute, tiel ke en plej bonŝanca okazo abonanto povas legi pri ĝi post nur kelkaj tagoj. Tio absolute ne eblas en monata revuo.

Eksperimento dua

Miaj hezitoj kaj skeptiko pro ĵurnalismaj konsideroj do estis grandaj; aliflanke la tento, tamen realigi la projekton, ankaŭ estis granda: ĉu ne estis pli bone havi monatan gazeton tiutipajn ol neniun? Kaj eble ja tiuvoje iam ni tamen atingus la veran celon ... Do mi ellaboris adaptitan koncepton kun multaj kompromisoj. Torben estis feliĉa kaj kun granda elano aliris la novan taskon. Tiel do en januaro 1980 aperis la unua

numero de *Monato* – neniu el ni tiam imagis, ke tiu ĉi dua eksperimento estos tiom sukcesa, ke iam la gazeto atingos sian 25-an vivojaron!

Jam supraĵa komparo kun *Semajno* montras multajn diferencojn. Precipe nun distraĵaj elementoj estis pli multaj kaj oni rimarkas la intencon, aperigi magazinon por vere la tuta familio. Certe, la unua numero ne jam povis esti tipa, ĉar mi devis enmeti tiujn artikolojn, pri kiuj komence mi disponis, ne povis – kiel poste – ĉerpi kaj selekti el abundo. Rapide montriĝis ke ne estis problemo akiri sufiĉe multajn bonajn aŭtorojn (multe pli malfacile estis, kapti abonantojn). En la unua numero, ekzemple, skribis i. a. Eŭgeno de Zilah, Trevor Steele, Gerald Tucker kaj Bernard Golden (kiu iĝos la aŭtoro de *Monato*). Aparte interesa estis la ĉefartikolo pri „Religio kun aŭ kontraŭ politiko”, ĉar ĝin mi kompilis el kontribuoj de jenaj aŭtoroj: Earl Bills, Renato Corsetti, Philippe Cousson, Roberto Giuliani, Tomasz Jan Kudrewicz, Eléus Leonardo de Sá, Henrik Maŝler kaj Claude Piron. Tiu ĉi maniero de verkado plene ekspluatas kapacitojn de Esperantujo, prezentante temon per diversaj aspektoj kaj facetoj el diversaj mondpartoj kaj laŭ diversaj vidpunktoj. Bedaŭrinde, ĉar organizado kaj kompilado laŭ tia maniero estas temporaba afero, malofte poste ni ripetis ĝin. Krome ekde tiu ĉi numero aperis artikol-serio (de Edward Symoens pri Belga Kongo, kie li laboris dum longa tempo); tiaj serioj ligu abonantojn al la revuo.

En la dua numero ĉefartikolon pri infanoj verkis Margret Brandenburg, kiu ankaŭ redaktis la rubrikon por infanoj. Kromaj redaktoroj estis William Auld, kiu elektis novelojn, kaj Maria Becker-Meisberger, kiu kolektis kuir-receptojn de legantoj (el kio poste estiĝos furora libro „Internacie Kuir”). Aliaj aŭtoroj estis Eŭgeno de Zilah, Giorgi Silfer, Irene Courtenay, Daniel Luez, Henrique Knoedt, Elnar Langkilde, Rob Vetter, Michel Schwartz, Karl Nell, Hans Bakker k. a. Marjorie Boulton, cetere debutis en *Monato* nur en n-ro 6/80, per amuza artikoleto (temis, kompreneble, pri kato). Nu, oni vidas ke rapide kreskis la rondo de aŭtoroj kaj iĝis pli kaj pli internacia (en la tria numero aperis unua japana aŭtoro, Izumi Yukio). Sed same rapide mi devis alfronti diversajn problemojn pri verkantoj, kiujn parte mi ne havus pri semajna gazeto.

Eraroj tipaj

Tipa eraro de aŭtoroj ekzemple estis verki kvazaŭ por ĵurnalo pri ĵus

okazinta evento; en semajna gazeto oni povus kutime toleri tion, sed ne en monata. Alia tipa eraro (ofta ĉe amatoraj ĵurnalistoj) estis „miismo”; oni skribas ekzemple „Mi legis en gazeto ...” anstataŭ vortumi: „Hispana gazeto *Tempo* aperigis artikolon, en kiu ...” Ankaŭ la principon de „indiĝeneco” multaj aŭtoroj ignoris aŭ ne komprenis; simile estis pri tradukoj, sed mi tre facile jam post unuaj linioj rimarkis, se temis ne pri originale verkita sed tradukita teksto. Alia ofta eraro estis, ke aŭtoroj verkis longegajn artikolojn; iujn mi povis mem koncizigi, aliajn devis resendi kun peto redukti la amplekson.

Sed kion mi ne atendis tiomgrade, estis lingvaj eraroj. Vere mi miris, ke ankaŭ bonaj sciantoj de la lingvo uzis naciismojn, do vortojn kaj esprimojn el nacia lingvo simple kaj senpripense transprenis en Esperanton. Majstroj tiukampe estas francoj, kiuj ofte pensas, ke sufiĉas aldoni al franca vorto finaĵon -o kaj tute ne rimarkas, ke estas falsa amiko. Do mi aĉetis E-vortarojn diverslingvajn por per ili pli rapide (ol per korespondado kun aŭtoro) eltrovi, kiun vorton eventuale volis uzi skribanto. Dua lingva problemo estis neologismoj. Aŭtoroj ja tre ofte por la unua fojo verkis pri temoj nekutimaj por ili, ĉar en Esperantujo oni ne multe parolis kaj skribis ĝis tiam pri politiko kaj ekonomio, pri sporto kaj hobiaj ktp. Do ili devis serĉi taŭgajn vortojn por nocioj, organizaĵoj aŭ politikaj konceptoj. Ne ĉiuj estis sufiĉe spertaj kaj lertaj por trovi trafajn ekvivalentojn.

Trejnado necesa

Kiu volis iĝi konstanta kunlaboranto, ricevis kontrakton kaj instrukciojn kiel verki (inkluzive de lingvaj konvencioj). Sed montriĝis, ke konstante mi devis trejni amatorajn ĵurnalistojn; por tio ni uzis internan bultenon de *Stafeto*, poste (ekde 1984) kvaronjaran bultenon *Inter-Monato*. Tiel regule mi povis doni konsilojn kaj instrukciojn, kunlaborantoj povis fari demandojn kaj ni diskutis lingvajn problemojn. Ofte mi povis ankaŭ amuzi la legantojn per kuriozaj vortumoj. Hungara aŭtoro ekzemple foje skribis pri „stara milito, armigado en la kosmo”; li simple paŭsis la usonan terminon „stars war” (stelomilito). Japano skribis „pagi atenton” (laŭ angla „pay attention”), germano verkis pri „tempolimo” (laŭ germana „Tempolimit”) anstataŭ „rapid-limigo” ktp. (El spertoj pri germanaj aŭtoroj, cetere, kelkajn jarojn poste mi ĉerpis por verki broŝuron pri falsaj amikoj de germanlingvaj esperantistoj.) Plurajn temojn mi devis trakti ĉiam

denove en *Inter-Monato*, ĉar novaj kunlaborantoj ne konis avertojn de antaŭaj jaroj. Entute tiu ĉi interna bulteno estis tre utila.

Alia provo, helpi en trovado de bonaj terminoj, fiaskis. Mi havis la ideon, kunigi redaktorojn kiuj regule aŭ sporade traktas politikajn kaj ekonomiajn temojn, ekzemple radiostaciojn, per aparta cirkulero kun la bela nomo KERNO (Komisiono de Esperanto-Redakcioj pri Neologismoj), kiun gvidis nia tiama revizianto Audrey Childs-Mee (konata kiel verkinto de bonega lernolibro *Saluton!*). Sed kunlaboremo de aliaj redaktoroj estis malgranda, do baldaŭ ni devis ĉesigi eldonadon – KERNO ne ĝermis. Alia grava problemo estis landnomoj, kiuj ja ludas grandan rolon en magazino raportanta el la tuta mondo. Regis konfuzo pri multaj el ili. Kunlabore kun tiama prezidanto de Akademio de Esperanto, André Albault, kiu okupiĝis pri la problemo, mi kompilis liston (ankaŭ por la poŝkalendaro *La Jaro* – pri ĝi poste), sed nur kiam fine la Akademio decidis pri listo de normaj nomoj, mi vere estis kontenta.

Libro utila

Laŭ konata ŝerco ĉiu freŝbakita esperantisto verkas poemon, ĉiu dua reformas la lingvon (precipe ortografion por forigi supersignojn) kaj ĉiu tria eldonas gazeton. Kerno de vero enestas laŭ miaj spertoj, ĉar la Esperanto-gazetaro parte estis kaj estas (hodiaŭ simile en inter-reto!) ege diletanteca. Kaj por aŭtoroj de *Monato* kaj por aliaj esperantistoj tial instrulibro pri ĵurnalismo estus tre utila; sed por verki ĝin mi ne havis tempon. Bonŝance dum vizito en Centra Oficejo de UEA mi renkontiĝis kun Anna Loewenstein, kiu klarigis ke „Virina Agado” volas instigi virinojn i. a. pli multe verki; ĉeestis Judith Junger, studentino de komunikado. El niaj diskutoj estiĝis plano, eldoni manlibron por verkemuloj. Ni interkonsentis, ke Junger skribu la teorion kaj mi la praktikan parton. Efektive en 1982 aperis *Manlibro pri Ĵurnalismo*, kiun ekde tiam ricevis ĉiu kunlaboranto de *Monato*. Ankaŭ ekstere la libro trovis tiel bonan eĥon, ke en 1989 aperis dua eldono.

Kalendaro praktika

Alian ideon mi realigis mem, tamen kun helpo de kunlaborantoj de *Monato*. Defiante la mokon, ke el *Semajno* fariĝis *Monato* kaj eble baldaŭ *Jaro*, mi nomis la „praktikan poŝkalendaron” *La Jaro*. Por la unua fojo ĝi

aperis en 1981. Grandparte mi mem ne nur kompilis sed temporabe tajpis la tekstojn per skribmaŝino, por ŝpari koston. En la kalendaro aperis festotagoj de ĉiuj nacioj kaj grandaj religioj; grava parto estis listo de ĉiuj landoj kun bazaj indikoj. Krome ĝi enhavis multajn praktike utilajn informojn, de trafikplakoj ĝis listo de spicoj, matematikajn tabelojn ktp. Poste aldoniĝis kvarlingva rudimenta vortareto por turistoj, kiun kompilis Albault.

Libro politika

Ideon pri alia libro mi havis ankaŭ baldaŭ post unuaj spertoj pri *Monato*, sed realigi ĝin estis multe malpli facile. Mi konstatis, ke nocioj kaj terminoj politikaj havis diferencajn signifojn en diversaj politikaj sferoj kaj regionoj; krome regis konfuzo pri ĝustaj nomoj de internaciaj organizaĵoj. Necesus havi, por helpi al aŭtoroj kaj redaktoroj, iuspecan kompendion aŭ enciklopedieton pri politiko. En ĝi devus aperi ne nur klaraj difinoj sed precipe ekzemploj de praktika aplikado sur diversaj kampoj. Diskutante la ideon kun koncernaj aŭtoroj de *Monato*, mi trafis al granda intereso kaj rapide trovis kunlaborantojn kvalifikitajn por tia libro. Tamen daŭris pli ol 8 jarojn, ĝis fine en 1994 povis aperi „Deklingva Manlibro pri Politiko”.

Kursestro kontraŭvola

Intertempe mi tre bone integriĝis en la redakcejo de SZ. Plej fascina kaj streĉa tasko estis, en aŭtuno 1980 akompani la papon dum ties unua vizito en Germanio. Tamen mi ne instaliĝis en la oficiala ĵurnalistara trupo, sed mem organizis mian vojaĝon per trajnoj. Mi volis sperti la viziton per okuloj kaj oreloj de l' popolo, ne en privilegia unua vico. Rezulte aperis nekutimaj kaj nerutinaj raportoj. Per tiu vojaĝo la papo akiris mian simpation. Des pli terura tasko estis por mi, verki ĉefkommentaron post la atenco kontraŭ li la 13-an de majo 1981 (ĉefredaktoro Zodel insistis, ke ne li – kiel estus normale ĉe tiel grava evento – skribu sed ke mi faru). Mi petis plurajn horojn por verki, kion oni koncedis. Tamen estis turmento, plurfoje mi devis plori. La titolo, konforme al mia propra sento, estis: „Die Seele der Welt ist getroffen” (La animo de l' mondo estas trafita; en *Monato* 6/81 mi skribis sub titolo „Pafo en la animon de l' mondo”).

Kvankam mia precipa tasko en la redakcejo de SZ estis redakti informojn,

kolegoj ĉiam petis min verki artikolojn. Tiel kolego Riener persvadis min en somero 1981, leginte pri la Universala Kongreso en Braziljo, skribi sur paĝo 3 pri Esperanto. Tiel aperis du tre detalaj kaj longaj artikoloj – kaj tio montriĝis grava eraro, kvankam – kompreneble – mi skribis objektivaj kaj do ne prisilentis, ke Esperanto estas longe for de „fina venko”. Unue mi ne supozis, ke en urbeto Leutkirch loĝas esperantistoj, due mi ne supozis, ke intereso pri la lingvo en tiu ĉi provinca regiono povus esti pli ol bagatela.

Unua surprizo estis, ke nian filinon Betti dum leciono en la gimnazio alparolis d-ro Guido Holz [gido holc], instruisto de germana lingvo, en Esperanto. Montriĝis, ke li estis perfekta parolanto de la lingvo internacia, tamen praktikis ĝin nur private, precipe poezie. Li sciis pri dua esperantisto en la urbeto, fervojisto, kiu tamen ne volis havi kontakton kun aliaj adeptoj de Esperanto. Dua surprizo estis, ke anoncis sin multaj homoj, kiuj aŭ jam sciis pri Esperanto kaj nun fine vidis ŝancon lerni ĝin, aŭ leginte unuan fojon pri la lingvo estis tiel entuziasmaj, ke ili urĝe petis pri kurso. Kion fari? Mi estis en dilemo: unuflanke mi kompreneble volis ekspluati tian entuziasmon favore al la Esperanto-movado, aliflanke havis nek tempon nek okazon gvidi kurson, ĉar vespere, kiam aliaj havas tempon, mi ankoraŭ deĵoris en la redakto. Krome mi ne emis ŝarĝi min per plia tasko apud laborego por *Monato*, por kiu mi ja devis uzi grandan parton de mia libera tempo. Holz, kiu povus gvidi kurson, ne havis koncernan diplomon kaj krome (ne nur laŭ Betti) estis kara homo sed ne tre bona pedagogo.

Eblas nur, ke mi ofertu intensan kurson dum semajnfino; sed por tio ne ekzistis taŭga libro. Krome la sola institucio, kiu povus organizi kurson, popol-altlernejo, ne havis konvenan strukturon por tiuspeca kurso. Tamen mi kontaktis ties estron, kaj li estis tiel entuziasma oferti ion specialan, ke li trovis solvon: oni disponigos ne lernejan ĉambron sed salonon kutime uzatan por pli solenaj celoj, en modernigita antikva urboturo. Sub tiom da bonvolemo ĉiufanka mi devis cedi kaj do ni ofertis semajnfinan intens-kurson – kun surprize bona eĥo: partoprenis ĝin pli ol 30 personoj el plej diversaj sociaj tavoloj kaj profesioj, eĉ du bienistinoj estis inter ili. Efektive ni sukcesis komplete tralabori la lernolibron, kaj tre multaj kursanoj volis daŭrigi.

Lernolibro renovigita

Unu lernanto, kiu nur parte povis ĉeesti la intensan kurson, demandis min, ĉu mi ne povas disponigi al li alian lernolibron, per kiu li mem – kaj rapide – povas lerni la lingvon. Mi donis al li „Schnell-Kurs” (Rapid-Kurso) de Hans Koch [koĥ] kaj rakontis, ke per ĝi mi mem lernis dum 10 tagoj. Kiam li redonis ĝin, tute entuziasme li diris, ke ĝi estas ideala libro por intensaj kursoj kaj por aŭtodidaktoj, kaj demandis, kial oni ne reeldonas ĝin. Bona ideo, mi pensis, kaj komencis esplori; kaj la aŭtoro kaj la eldoninto Oskar Ziegler [cigler] estis mortintaj – do kiu havas kopirajton? Fine mi eltrovis ke la vidvino de Ziegler ankoraŭ vivas kaj kontaktis ŝin; la maljunulino rezignis pri ĉiuj rajtoj kaj sen io ajn permesis al mi reeldoni la libron. Por redukti koston, mi tajpis ĉiujn tekstojn per IBM-skribmaŝino. Nur iomete mi devis modifi pro eksmodiĝo; ekzemple „fiakro” fariĝis „taksio”. Krome mi aldonis la liston de mil plej oftaj radikoj. Torben volonte eldonis la libreton, ĉar pro la mirinde malalta prezo por kompleta kurso oni povis atendi bonan vendadon, des pli ke ni krome ofertis malmultekostan sonkaseton kun la tekstoj, kiun Hilde kaj mi mem registris. Ni pravis: la libreto preskaŭ furore vendiĝis.

La progresigan kurson ni organizis laŭ metodo de Josef Schiffer [ŝifer] en memlerngrupoj, ĉar tian instruadon povis gvidi Holz kaj aliaj instruistoj, kiuj partoprenis la unuan kurson; mi mem venis nur, kiam mi povis. Evoluis vigla aktivado tiel ke konsekvence ni fondis klubon. Jam en la unua jaro ni havis riĉan programon; i. a. ni ofertis publikan prelegon de profesoro Tyburcjusz Tyblewski [tiburĉjus tiblevski] pri tiam kriza situacio en Pollando kaj prezentaĵon de magiisto Triksini. Kulmino de l’ klubo vivo estis la 13-a Amikeco-Kongreso en 1983, kiun sub gvido de Pierre Delaire [pier deler] partoprenis 80 homoj el 7 landoj, kaj dum kiu d-ro Hendryk Maschler [hendrik maŝler] el Israelo prezentis publikan prelegon pri Proksima Oriento. La kongreso finiĝis per vespera ĝarden-festo, dum kiu krome adiaŭis la klubestro Stefan Maul.

Decido rapida

Kio okazis, ke post nur kvar kaj duona jaroj ni forlasis Leutkirch? Ĉu mi ne estis kontenta pri mia posteno en SZ, ĉu ne ĝuis agnoskon kaj de kolegoj kaj de l’ ĉefredaktoro? Jes, sed mi ege embarasis lin, neintence. Kiam okazis la atenco kontraŭ usona prezidanto Ronald Reagan [rejgen], mi havis noktan deĵoron kaj estis tute sola, ĉar – nekutime – jam ĉiuj kolegoj estis for. Kiam alvenis unua fulmkomuniko de informagentejo, mi

tuj telefonis al nia korespondanto en Vaŝingtono kaj demandis, ĉu li sukcesos ene de duona horo liveri aktualan raporton por la frontpaĝo. Li jesis, kaj do mi haltigis la presmaŝinojn, komplete ŝanĝis la frontpaĝon kaj atendis la aktualan tekston, kiu efektive alvenis ĝustatempe por ne prokrasti aperon de la ĵurnalo. Mi estis fiera, ĉar SZ estis unu el malmultaj germanaj ĵurnaloj, kiuj detale informis tiun matenon pri la atenco. Kontenta do mi iris hejmen, tute laca. Sed morgaŭ mi ja certe rikoltos laŭdon ...

Sed kiam postan vesperon mi venis en la redaktojn, la kolegoj jam avertis: Zodel tuj volas paroli kun vi, sed li estas tre malbonhumora! Efektive atendis min ne laŭdo sed fulmotondro. Li riproĉis al mi, ke mi ne tuj informis lin kaj ke mankas foto. Mi provis defendi min, dirante ke mi devis rapidege labori kaj povis pensi nek pri telefonado al li nek pri foto. Sed li ne akceptis tion kaj asertis: Vi neniam fariĝos bona inform-redaktoro! Furioze mi forlasis lian ĉambron, kaj ankaŭ la kolegoj ne sukcesis konsoli min, kvankam ili konsentis pri la maljusteco de Zodel; sed ankaŭ ili diris, ke estis eraro ne alvoki lin. Absurde estis, ke baldaŭ poste mi eksciis, ke mi tute ne povus alvoki lin, ĉar tiun vesperon li pasigis aliloke (divenu, ĉe kiu...). Lia edzino, kiu probable kredis ke la vesperon li laboris en la redakto, dum la matenmanĝo – vidinte la ĵurnalon – demandis, kial li ne rakontis al ŝi pri la atenco, kiam nokte li venis hejmen. Certe, lia embaraso devis esti suferiga. Sed, se mi telefonus al lia hejmo kaj la edzino mirus, ke li ne estis en sia oficejo – ĉu posta embaraso por li estus malpli granda?

Ekde tiam Zodel serĉis okazon revenĝi sin, sed ne trovis; maldungi li ne povis min, des pli ke post foriro de kolego jam dum kelkaj monatoj ni devis triope labori por kvar redaktoroj, kio pli kaj pli elĉerpis min fizike – ni sentis nin kiel laborskavoj. Do mi pensis pri foriro, kion tamen ne favoris la familio, precipe ne la infanoj, kiuj ne denove volis perdi amikojn. Sed en printempo 1983 mi devis konkludi el aludoj, ke Zodel volis forŝovi min el la politika sekcio en teamon de nove fondita dimanĉa gazeto, kies estron mi tute ne ŝatis. Nun do necesis agi rapide.

Mi skribis al Bartholy, ĉefredaktoro de *Augsburger Allgemeine* (AZ), memorigante pri lia tiama propono kontakti lin, se iam mi emus reveni al Aŭgsburgo. Li tuj telefonis, informante ke ĝuste nun ili serĉas redaktoron por politika sekcio, kaj jam kelkajn tagojn poste mi veturis tien

– post duona horo ĉio estis perfekta. Estis nur eta obstaklo: oni bezonus min laŭeble rapide, sed mia kontrakto en Leutkirch ne permesis tujan foriron. Reveninte hejmen, mi tuj iris ne al Zodel sed al la eldonisto, klarigis la situacion kaj petis pri pli frua nuligo de la kontrakto; li, sciante pri la krizo inter Zodel kaj mi, akceptis. Zodel mem ja estis tre surprizita, supozeble ankaŭ ĉagrenita ĉar mi tiel superruzis lin, sed ne povis renversi la decidon. (Dum la adiaŭa vespero en la redakcejo, kie mi regalis la gekolegojn per bonaj manĝo kaj trinkaĵoj, li eĉ diris dankojn; kiam kelkajn jarojn poste Zodel vizitis AZ por informiĝi pri la tiea komputila sistemo, li varme salutis min.)

Nun necesis rapide organizi transloĝiĝon kaj novan vivon en Aŭgsburgo. Sufiĉe grandan (kvinĉambran) loĝejon meze en la urbo ni trovis rapide, sed devis parte mem renovigi ĝin, kun helpo de l' gepatroj de Hilde. Konvena gimnazio por Betti ankaŭ ne estis problemo, sed kio estos pri filino Bea, kiu nepre volis resti en Leutkirch, kie post fino de dua gimnazia fazo ŝi jam trovis postenon en infan-vartejo kaj lokon en faklernejo por fariĝi edukistino? Strikte ŝi rifuzis kuniri al Aŭgsburgo, kie ŝi ĉion devus nove aranĝi, perdinte siajn bonajn kontaktojn, amikan klikon kaj ŝatatan urban orkestron (kie ŝi ludis bastubjon) – sed ŝi estis nur 16-jara! Ni ja admiris kaj agnoskis ŝiajn energion kaj organizan talenton, ŝian memstarecon, sed ne povis lasi junulinon tiuaĝan sola, longe for de la gepatroj. Fine ŝi konsentis loĝi en la sino de familio Stypa [stipa]; trankviligis nin, ke Peter Stypa, la patro, estis ne nur unu el la plej fervoraj esperantistoj de Leutkirch, sed ankaŭ instruisto en la faklernejo de Bea. Ni povis fidi do, ke ŝi estos en bonaj manoj. Tamen Hilde, kiam ni transloĝiĝis, dum la tuta veturo de Leutkirch al Augsburg ploris.

Posteno simila

En AZ, kie mi eklaboris la 1-an de oktobro 1983, mi ne havis problemojn, post spertiĝo en SZ, rapide adaptiĝi kaj integriĝi. Mia posteno estis simila, preskaŭ sama kiel tiu en Leutkirch, kun grava diferenco tamen: en politika sekcio de AZ deĵoris duoble tiom da gekolegoj kiom ĉe SZ. Do oni povis multe pli zorgeme kaj sen tempopremo laboradi. Mankis al mi tamen iomete la intimeco de Leutkirch, en nun ege granda oficejo. Avantaĝo por mi estis, ke ĉe SZ mi jam laboris per komputilo, kiun en Aŭgsburgo oni nur ĵus estis instalinta; rapide mi lernis manipuli ĝin. Alia avantaĝo estis, ke la sekciestro estis ne nur tre agrabla homo sed

devenis el vilaĝo proksime de – Leutkirch. Rapide ni amikiĝis. Iom ĝene por mi estis, ke AZ (kiu antaŭe troviĝis centre de la urbo) devis starigi tute novan „modernan” (t. e. malbelegan) konstruaĵon ĉe periferio de Aŭgsburgo kaj sekve mi devis uzi aŭton por la ses kilometroj inter nia loĝejo kaj redakto; krome mi devis tagmanĝi tie en kantino. Kaj ties manĝaĵojn kaj la aŭtoveturadon mi eltenis nur kelkan tempon; poste mi uzis biciklon kaj kunportis propran manĝaĵon.

Cetere ni estis tre kontentaj, denove loĝi en Aŭgsburgo kaj retrovi multajn antaŭajn geamikojn, nelaste esperantistajn. Tiujn ni ne estis informintaj pri nia reveno, sed simple vizitis klub-vesperon; oni ĝojis pri la gastoj el Leutkirch – surprizo kaj ĝojo estis grandaj, kiam ni diris, ke ni denove loĝas tie ĉi. Tiam la esperantistoj troviĝis jam meze de preparoj por Universala Kongreso, kiu okazos 1985 en Aŭgsburgo, kaj tuj volis kapti min por posteno en Loka Kongresa Komitato (LKK). Sed mi akceptis nur komision, redakti kongresan kurieron kaj helpi en gazetara servo; tamen mi ĉeestis laŭeble ĉiujn kunsidojn de LKK.

Krizo grava

Monato evoluis laŭ enhavo kaj kvalito bone, sed ne vere prosperis laŭ nombro de abonantoj. Torben havis la ideon, varbi persone en gravaj merkatoj. Tial li vojaĝis tra Usono kaj mi preleg-vojaĝis en januaro 1981 tra Japanio. Kompreneble mi ne volis postuli de japanaj esperantistoj, organizi por mi nur varbadon por nia revuo; tial mi proponis prelegi pri diversaj politikaj kaj ekonomiaj temoj, kun interpretado al japana lingvo, tiel ke oni povos inviti ankaŭ neesperantistan publikon. La japanaj movadanoj estis entuziasmaj kaj perfekte organizis mian vojaĝon. La ideo, inviti ĝeneralan publikon, montriĝis sukcesa, eĉ tro: al prelego pri ekonomia temo venis pli multaj neesperantistaj fakuloj ol esperantistoj, kaj tiuj fakuloj starigis tiom da demandoj al mi, ke la tempo poste ne sufiĉis por diskuti pri Esperanto – pri kio grumblis la esperantistoj. Pro la sukceso poste Nagoya Esperanto-Centro eldonis miajn prelegojn en libreto sub titolo „Germana Ĵurnalisto komentas”, kun traduko japana – jen, mia unua libro, eĉ en japana lingvo! (Kiam mi rakontis al neesperantistaj konatoj, ke mi skribis libron en la japana, ili gape miris ...)

Sed spite al ĉiaj niaj varbado kaj reklamado, la magazino ne furoris, nombro de abonantoj ne kreskis trans la minimume necesaj 2000. Dum

mi kiel sola redaktoro pro miaj sperto kaj rutino sukcesis majstri la taskon, des pli ke post reveno al Aŭgsburgo mi disponis eĉ pri pli multa libera tempo por la revuo, por Torben iom post iom estis tro streĉe enpaŝigi, eldoni, presi kaj administri; sed helpantojn li ne povis dungigi pro financaj kialoj. Do en printempo 1984 iom kaprica Torben, sen averti min, deklaris ĉesigi eldonadon. Sekve en duobla, antaŭlasta numero 3/4 ni devis anonci la morton de *Monato*, en ties kvina jaro. En mia komuniko pri tio mi avertis, cetere, ke pri tio kulpas ankaŭ neglektado flanke de l' oficiala Esperanto-movado, kiu simple ne volis kompreni, ke tia prestiĝa revuo estas ankaŭ bona propagandilo por la lingvo internacia.

Eble tiu mia plendo efektive vekis kelkajn dormantajn funkciulojn, kiuj troviĝis meze en preparoj por la 100-jariĝo de Esperanto, kaj komprenis kia perdo estus, se ĝuste mallonge antaŭ tiu jubileo mortus la magazino. Estis precipe tiama UEA-prezidanto Gregoire Maertens, kiu streĉis ĉiujn siajn fortojn por savi la gazeton – kun sukceso, ĉar la posta numero ne estis, kiel anoncite, la lasta, kiel mi povis informi la legantojn. La solvo estis, ke Torben restos jure respondeca eldonisto kaj presisto (kaj tiel havos enspezon), sed administradon transprenos Grafika Centro Antverpeno (kiu kompostadis la revuon); kvankam la Centro estis kvazaŭ filio de UEA, oni garantiis sendependecon de la magazino (sen kio mi ne daŭrigus).

Posteno gvida

Kiel menciite, pro la ne tro streĉa laboro en AZ mi povis dediĉi pli multan tempon al *Monato* ol en Leutkirch, sed tio ŝanĝiĝis, kiam kolego transiris al televid-stacio nove fondita de AZ. La politika sekcio de tiu ĉi ĵurnalo havis iom alian strukturon ol tiu de SZ, kie ni havis rotacian sistemon, tiel ke ĉiu el ni dum unu semajno organizis la politikajn paĝojn, la postan semajnon alia kolego ktp. En Aŭgsburgo estis nur du, kiuj alterne dum unu semajno organizis ne nur la laboron de la politika sekcio sed ankaŭ decidis, kiujn temojn traktu aliaj sekcioj kaj – precipe – kiuj temoj aperu frontpaĝe. Praktike do tiuj kolegoj gvidis kaj decidis, respondecis pri preskaŭ la tuta produktado de l' aktuala numero – ĉefredaktoroj decidis pri aliaj aferoj, ekzemple komentarioj. Kiam ĉio estis planita, en malfrua posttagmezo, mallonga konferenco de ĉiuj sekcioj inkluzive de ĉefredaktoro decidis definitive, sed kutime aprobis la planojn.

Laŭ brita redakcia modelo oni parolis pri „desk” (skribotablo) kaj analoge nomis tiujn kolegojn „Desker” (tablisto). Mi ne enviis ilin, ĉar ilia laboro vere estis malfacila kaj streĉa: ili devis dum la tuta tago teni kontakton kun kolegoj en ĉefurbo Bonn, kun eksterlandaj korespondantoj, kun aliaj sekcioj, diskuti (ofte disputi) kun ili, havis du telefonojn kiuj preskaŭ neniam silentis. Ili devis deĵori minimume dek (anstataŭ la kutimajn ok) horojn, ofte pli multajn, kiam vespere okazis io, kio necesigis rearanĝi la gazeton.

Sed plej malagrabla estis, ke la postan tagon dum la „granda” tagmeza redakcia konferenco ili devis defendi sin kontraŭ kritiko precipe de ĉefredaktoroj. Alia malavantaĝo estis, ke dimanĉe ĉiam devis deĵori unu tablisto; nur ĉar tiun taskon jen kaj jen plenumis ankaŭ la sekciestro, ili devis labori ne ĉiun duan, tamen minimume ĉiun trian dimanĉon (ni aliaj devis suferi tion kutime nur unu fojon monate). Kompare al tiuj kompatindaj tablistoj ni „simplaj” redaktoroj havis trankvilan vivon. Niaj taskoj variis de tago al tago: unu kolektis materialon pri internaj (germanaj) aferoj, alia pri eksterlando (ofte mi), alia prilaboris paĝon kun fonartikoloj kaj analizoj, unu venis nur vespere por nokta deĵoro. Dum sekcia konferenceto posttagmeze ni decidis provizore pri temoj kaj lokado de artikoloj. Poste ni trankvile plenumis niajn taskojn.

Nun do unu tablisto forlasos nin, kaj tuj ĉiuj gekolegoj diris, ke nepre mi transprenu tiun ĉi postenon, ĉar mi estas – laŭ iliaj asertoj – ne nur kompetenta sed ankaŭ havas la necesan „elefanto-haŭton” pro mia trankvila karaktero. Tio kontrastis precipe al la restonta tablisto Uwe Wilke [uve vilke], kiu ne nur terure ekscitiĝis kaj perturbiĝis, kiam okazis io eksterordinara, sed ankaŭ furioze koleriĝis pri stultaj reagoj de ĉefredaktoroj. Tiuokaze li dum horoj kriis pro ĉiu bagatelo „merde”; ni eltenis lin nur, ĉar fake li estis ege kompetenta, precipe pri multaj eksterlandaj aferoj. Mi estis, cetere, unu el la malmultaj, kiuj relative facile sukcesis trankviligi lin post tiaj erupcioj – jen do, sendube, unu el la motivoj, pro kiuj la kolegoj, inkluzive de la sekciestro, provis persvadi min fariĝi tablisto. Unu el la argumentoj estis, ke oni facile trovas ordinaran redaktoron, kiu povos anstataŭi min, sed ne tiel facile vere taŭgan tabliston. Sed mi strikte rifuzis; mi precipe ne volis transpreni tiun ĉi taskon, ĉar pro ĝi suferus *Monato* – tamen tion mi ja ne povis diri oficiale, kaj tial argumentis ke post simila streĉa periodo en Leutkirch fizike mi ne eltenus tian ripeton.

Do oni serĉis novan tabliston, sed dum multaj semajnoj ne trovis – jam proksimiĝis la dato, kiam la posteno vakos. Denove oni provis persvadi min, kaj fine mi cedis pro solidareco kun la kolegoj, sed insistis pri provperiodo: se mi konstatos, ke miaj fortoj ne sufiĉos, mi rajtos retiriĝi. Tion mi sukcesis elmarĉandi ankaŭ tial, ke mi diris al la ĉefredaktoroj, ke ili ja inverse povos nuligi la decidon, kiam ili ne estos kontentaj pri mia laboro. Sed je mia granda miro, ne nur ĉiuj aliaj estis kontentaj pri mi sed ankaŭ al mi mem iom post iom plaĉis la nova tasko. Estis ja fascine, ke mi povis relative libere kaj memstare decidi, kia estos la posttaga ĵurnalo. Kun Wilke mi rapide harmoniis tre bone. Kroma pluso estis, ke kompreneble por tiu ĉi gvida posteno mi ricevis bonegan salajron. Kaj mi ne hezitis, dum netablistaj semajnoj iom redukti miajn laborhorojn, tiel ke tamen por *Monato* restis tempo.

Engaĝiĝo movada

Jam en Leutkirch, kontraŭvole, mi denove enplektiĝis en la Esperanto-movado, sed tie nur loke. Nun en Aŭgsburgo, mi ne povis rifuzi plian kaj pli vastan engaĝiĝon, prepare al Universala Kongreso en 1985, des pli ke la movado helpis savi „mian” revuon. Kiel redaktoro en centralo de la regiona ĵurnalo kompreneble mi povis multe utili, ne nur verkante regule raportojn pri LKK-kunsidoj kaj aliaj prepar-laboroj, sed ankaŭ per speciala varbagado: mi proponis aperigi Esperanto-kurson en la ĵurnalo, kion oni tuj akceptis. Por tio ni uzis la menciitan rapid-kurson reeldonitan de mi, ĉar mi povis oferti ĝin senpage al la ĵurnalo sub la kondiĉo, ke poste la kompostajon mi rajtos senpage uzi por nova eldono de la libreto. Ĉiun semajnon aperis unu leciono, krome ni ofertis la libreton je favora prezo (tiel ni preskaŭ elvendis la restintan stokon) kaj enkondukan vesperon en Aŭgsburgo kaj Kempten, granda urbo en suda Bavario (proksime de Leutkirch). La eĥo estis tre bona, multaj lernis la lingvon, la ĝenerala varbefiko estis granda.

En 1985 Aŭgsburgo festos sian 2000-jaran jubileon (ankaŭ tial la urbo invitis Universalan Kongreson por tiu jaro). Ĝi estis fondita de romia imperiestro Aŭgusto, do por la jubileo oni planis diversmaniere rememorigi pri tio. Kiam mi legis, ke aŭsgburganoj marŝados je tiu okazo en kirasoj de romiaj legianoj de Romo al Aŭgsburgo, sciante ke alia grupo jam de kelka tempo prezentiĝas dum karnavalo en vestoj de tiamaj ĝermanoj, mi havis ideon por kabaredo, en kiu rolos romia oficiro kaj

ĝermana tribestro. Jomo Ipfelkofer, kiu en LKK respondecis pri kultur-programo, estis entuziasma kiam mi prezentis la ideon, kaj deklaris sin preta, transpreni la rolon de l' ĝermano; por la rolo de romia oficiro mi gajnis Peter Styppa el Leutkirch, por tiu de diskut-gvidanto Paul Vierke [firke], kiu lernis la lingvon en kurso de nia klubo. La kabaredo satiris sub titolo „La Pinto” pri tiamaj traktadoj de Sovetio kaj Usono pri malarmado kaj prezentiĝis en formo de televida diskuto; tio havis la avantaĝon, ke la rolantoj ne devis parkerigi siajn tekstojn sed povis legi, starante malantaŭ pupitroj. La kostumojn senpage disponigis la menciitaj grupoj de „romiaj legianoj” kaj de „ĝermanoj”.

Krome mi preparis precipe eldonadon de kongresa kuriero sub aŭspicio de *Monato*. Mi nomis ĝin *La Strobilo* laŭ la simbolo de Aŭgsburgo kaj ricevis subtenon de fotistoj de AZ, kiuj pretis senpage disponigi bildojn. Kiel redaktejon ni povis uzi ĉambreton apud la budo de *Monato* en la kongresejo, najbare de l' gazetara servo, kiun mi ankaŭ helpis prepari (gvidos ĝin Elsbeth Bormann el Hamburgo). Krome mi kompilis dosieron pri Esperanto por ĵurnalistoj en germana lingvo (kiun poste transprenis Germana Esperanto-Asocio). Por la kongresa kuriero ni trovis etan presejon, kiu pretis frumatene presi kaj liveri la ekzemplerojn je la horo, kiam malfermiĝos la kongresejo. Tiel ni povis aktuale raporti eĉ pri plej malfruaj vesperaj programeroj.

La kongreso ĝenerale estis tute bona, al kio kontribuis ankaŭ bonega vetero. AZ salutis la kongresanojn sur frontpaĝo per teksto en Esperanto kaj abunde raportis dum la tuta semajno. Por mi (kaj Hilde), kompreneble, estis streĉa laboro, kvankam en redaktado de l' kuriero iomete helpis Thomas Bormann kaj en la budo de *Monato* deĵoris ne nur mi sed precipe ankaŭ Paul Peeraerts, direktoro de Grafika Centro. Mia kabaredaĵo trovis bonan akcepton; la salono estis plenŝtopita kaj multaj protestis, ĉar ili ne trovis lokon; pluraj postulis duan prezenton, sed tio ne eblis. *La Strobilo* ricevis multajn laŭdojn pro profesia nivelo; i. a. ĝi havis ankaŭ rubrikon kun informoj pri gravaj eventoj de l' (ekstera) mondo. Ne nur AZ sed ankaŭ aliaj amaskomunikiloj raportis multe kaj favore, kvankam la gazetara servo havis plurajn problemojn; mi estis tre ĉagrenita, ĉar la kolegoj dum fina gazetara konferenco devis atendi pli ol duonan horon, ĝis alvenis estrarano. Pri mankoj kaj strangaĵoj de l' kongreso ni eldonis neoficialan postkongresan numeron kun la titolo LAST-ROBILO, kiun ni disdonis dum vespermanĝo, al kiu UEA ne invitis

la helpantojn de la kongreso, kio tre ĉagrenis ilin – ankaŭ pro tio ni kompilis tiun satiran eldonon.

Krizoj pliaj

La kongresoj – krom UK okazis ankaŭ blindula kaj ekumena kongresoj en Aŭgsburgo – donis novajn impulsojn ankaŭ al la loka Esperanto-klubo, kun novaj parte junaj kursanoj. Krome ni nun eldonis kluban informilon, kiun mi redaktis dum multaj jaroj, kaj okaze de l' okdekjariĝo de la klubo kaj centjariĝo de Esperanto ni eldonis jubilean broŝuron pri la movado en Aŭgsburgo. Tamen, kompreneble, mian plej multan liberan tempon mi dediĉis al *Monato*, kiu daŭre evoluis bone – ĝis en 1988 trafis ĝin dua krizo. UEA tiam fermis plurajn siajn oficejojn; ankaŭ tiun en Antverpeno ĝi volis fermi, kio signifus fortan baton kaj por la loka Esperanto-movado kaj por *Monato*. Flandra Esperanto-Ligo (FEL) intertraktadis kun UEA kaj fine oni decidis, ke FEL aĉetos ĉiujn havaĵojn de Grafika Centro kaj transprenos dungadon de ĉiuj oficistoj. *Monato* do povis pluvivi. Tiu krizo estis des pli ĉagrena por mi, ĉar samjare mi suferis mian duan manoperacion, pro kiu dum pluraj semajnoj mi ne povis labori.

Fino de tiu jardeko ĝenerale estis tre ekscita kaj por ni ĵurnalistoj tre streĉa pro la drastaj ŝanĝiĝoj en orienta Eŭropo kun fina kaj definitiva kolapso de l' sovetia imperio, kun kulmino de malfermo de la Berlina Muro. Aldoniĝis unua golfa milito kaj terura militado en tiama Jugoslavio. Kiel redaktoro pri eksterlandaj aferoj kaj tablisto mi devis deĵori eĉ pli multajn horojn ol antaŭe, kaj sekvis en 1990 tria manoperacio. La streĉo kreskis konsiderinde, tiel ke vole nevole en 1991 post 12 jaroj en tiu posteno mi devis rezigni pri ĉefredaktoreco de *Monato*, ĉar prioritaton kompreneble havis la ĵurnaleja laboro. Per mia decido mi estigis trian krizon de *Monato*, ĉar montriĝis tre malfacile trovi novan ĉefredaktoron. Fine oni solvis la problemon tiel, ke Paul Peeraerts havos funkcion de redakcia sekretario, do organize kaj teknike kunordigos laborojn; pri la diversaj sekcioj respondecos fakredaktoroj. Mi mem estos nur „fondinto”, sed – por iomete garantii kontinuecon de la gazeto – estos konstanta kolumnisto de rubriko „El mia vidpunkto”.

TEĴA refondita

Samjare tamen atingis min nova defio: oni petis min iĝi prezidanto de

Tutmonda Ĵurnalista Esperantista Asocio (TEĴA), kiu antaŭe agadis sub egido de precipe bulgaraj esperantistoj (kun subvencioj de komunista partio), sed sekve de disfalo de l' socialisma bloko disfalis mem. Mi hezitis, sed unuflanke mi opiniis, ke estas grave havi tian fakasocion, due sen la ŝarĝo de *Monato* mi povus transpreni tian taskon. Do mi akceptis, kondiĉe ke oni akceptos *Monato*-redaktoron Paul Gubbins kiel vicprezidanton. Dum UK en Bergeno, kiun mi ne povis ĉeesti, oni elektis novan estraron kun mi kaj Gubbins ĉepinte.

Kun elano ni preparis refondon de TEĴA; mi donis personan krediton al ĝi por tiel financi eldonadon de ĝia organo *Internacia Ĵurnalisto*, kiun mi mem redaktis (kaj kompostis). Baldaŭ ĝi estis unu el la plej bonaj fakrevuoj de Esperantujo. Dum la UK en Vieno en 1992 ni refondis la asocion kun novaj statuto, laborplano kaj estraro. Gubbins iniciatis korespondan trejnkurson por ĵurnalistoj, ni organizis seminariojn, ellaboris dosierojn pri kongresa kuriero kaj gazetara servo dum UK, eldonis Esperanto-version de dosiero pri Esperanto por ĵurnalistoj, lanĉis premion „Edmond Privat” kaj fine en 1994 mi eĉ gvidis kurson pri komunikadscienco en Akademio Internacia de San Marino (AIS). TEĴA evidente estis sukcesa fakasocio, nelaste pro la trejnkurso, kiu furoris – ni havis tre, fakte tro multajn kursanojn.

Tasko honoriga

Kvazaŭ ne sufiĉus miaj aktivadoj en Esperantujo, en decembro 1992 aperis plia defio. Alvokis min Alois Meiners, maljunulo kiu kiel pensiulo investis plej grandan parton de sia gajno el vendo de firmao en fondaĵo por subteni progresigon de l' Esperanto-movado. Li lernis la lingvon nur kelkajn jarojn antaŭe kaj opiniis, ke li – ĉar li ne, kiel aliaj, povis oferi sian vivon por Esperanto – kompanse povus oferi sian monon. Dum kelkaj jaroj sub lia gvido tiu ĉi fondaĵo kun la nomo FAME (mallongigo de „**F**ondaĵo **A**lois **M**einers) subvenciis multajn projektojn kaj honorigis homojn per kultur-premio. Sed nun, maljuna kaj malsana, li serĉis posteulon, kiu estu same sendependa homo kiel li mem; li volis ke mi estu tiu homo. Mi konis lin nur supraĵe kaj ankaŭ ne multe sciis pri FAME, sed ĉar ĵus estis mia resaniĝa periodo post manoperacio kaj do mi havis multan liberan tempon, mi konsentis ke li vizitu min, sen iu promeso miaflanka, tamen. Nia renkontiĝo estis tre agrabla kaj pli kaj pli mi admiris lian iniciaton kaj ne malinklinis plenumi lian peton. Ni disiris

interkonsentinte, ke ambaŭ ni pripensos la aferon antaŭ ol decidi. Kvaronan jaron poste li mortis; por mi do la afero estis finita.

Sed mi ne sciis, ke pri tiu ĉi afero li parolis al sia edzino kaj la aliaj FAME-estraranoj. Ili, post reordigo de la fondaĵo, en 1994 demandis min, ĉu nun mi pretus iĝi posteulo de Meiners. Fidante al lia tiama aserto, ke tiu posteno ne alportos tre multan laboron, mi jesis. Oni elektis min – sed, ho ve! Baldaŭ mi devis konstati, ke tamen estas tre temporaba tasko, se oni bone kaj honeste volas plenumi ĝin. Sed estis ankaŭ tre agrabla tasko, helpi al engaĝitaj esperantistoj realigi siajn projektojn kaj honorigi homojn per la „Esperanto-Kulturpremio de Aalen”; la premio havis tiun ĉi nomon, ĉar sudgermana urbo Aalen, en kies biblioteko troviĝas libraro de l' Germana Esperanto-Instituto, danke al vigla loka klubo kaj organize kaj finance subtenas tiun premion. Dum mia oficperiodo ni premiis *Heroldon de Esperanto*, Spomenka Ŝtimec, Gersi Alfredo Bays kaj Marjorie Boulton.

Sendube, por mi kiel esperantisto, tiu tempo de la lasta jardeko de l' pasinta jarmilo estis fruktedona, kontentiga kaj kvazaŭ kulmina periodo. Tiam (en 1991) Hilde kaj mi dum kvin semajnoj vojaĝis tra Brazilo, ne nur por viziti lokojn de ŝia junaĝo, parencojn kaj amikojn, sed ankaŭ por ekkoni la vigan Esperanto-movadon. Grandparte Gilbert Ledon kaj lia edzino Symilde organizis la vojaĝon; ili gvidis nin tra la suda parto de Brazilo, kaj tiam profundiĝis nia amikeco. Ni renkontis korifeojn de brazila Esperanto-kulturo, inter ili Geraldo Mattos, Gersi Alfredo Bays kaj Leopoldo Knoedt. En tiu periodo plurfoje mi prelegis dum UK, gvidis kurson en Somerlernejo Barlastono (kaj je tiu okazo vizitis Marjorie Boulton hejme). Aliflanke tiam ofte ni akceptis gastojn en Aŭgsburgo. Krome mi rekomencis verki satiraĵojn kaj kreis figuron de profesoro Ruĝnazul, kiu per „sciencaj” prelegoj amuzas sian publikon (la prelegoj poste aperis en *La KancerKliniko*).

Fazo degenera

Meze de la lasta jardeko de l' pasinta jarcento el mia iama familio restis nur nevino Maria, ĉar en 1992 mortis, 59-jara, mia frato Jozefo, mallonge poste memmortigis sin onklo Hans en Aŭstrio. Panjo mortis jam en 1982, 70-jara. Nevino Maria intertempe havis du infanojn, la du fratoj de Hilde same po du. Kaj jam venis la vico de niaj filinoj edziniĝi. Bea elektis azilpetanton el Bangladeŝo, Betti serban esperantiston. Dume akriĝis miaj problemoj pri la dekstra mano: en 1995 mi suferis jam la trian operacion. Fariĝis pli kaj pli malfacile, manipuli la dekstran manon, ĝi doloris, kiam mi notis multe, kaj mia skribado degeneris tiom, ke poste ofte eĉ mi mem ne plu povis legi mian manskribon. Pri paperfolioj mi devis tre atenti, ĉar pro detruitaj sensoroj facile mi povis tranĉi la manon per la akraj eĝoj de papero. Tamen senprobleme mi povis tajpi. Sed por laboro de tablisto tiuj ĝenoj estis sufiĉe gravaj, ĉar daŭre mi devis noti ion kaj manipuli multajn foliojn kaj fotojn (kun eĉ pli akraj eĝoj). Krome post ĉiu operacio suferis mia memorkapablo pro anestezo – malbone por redaktoro, kiu devas memori multajn nomojn, datojn, aferojn, eventojn. Fine oni malkovris glaŭkomon kaj konsilis, ne tro multe labori antaŭ komputila ekrano – ne eble por tablisto, kiu dum la tuta tago devas uzi ĝin.

Paralele al tiu mia persona degenero ankaŭ degeneris germanaj ĵurnaloj. Kolapso de sovetia imperio, barbaraj militoj en balkanaj landoj, unuiĝo de Germanio, la golfa milito – la unuaj jaroj de tiu lasta jardeko de l' pasinta jarcento estis tre ekscitaj kaj ni redaktoroj pri eksterlanda politiko, Wilke kaj mi, havis prioritatojn en la ĵurnalo. Sed kiam situacioj en multaj partoj de Eŭropo trankviliĝis, la homoj, saturitaj de politikaj problemoj, pli kaj pli volis eskapi al amuzo kaj distro, al banalaĵoj kaj klaĉoj. Bonŝance por tiuj homoj en Germanio intertempe multnombre establitaj privataj, komercaj televid-stacioj furoris per pli kaj pli primitivaj programoj pure distraj kaj (memdifine) amuzaj. Ili sukcesis eĉ banaligi politikajn informojn kaj por tio inventis la absurdan karakterizon *info-distro* (angle infotainment) – ne nur absurda sed parte perversa afero, ĉar kiel oni volas informi *distre* pri milito aŭ terorismo? Fatale por ni seriozaj ĵurnalistoj tamen estis, ke malkreskis intereso pri seriozaj aferoj kaj do ankaŭ pri seriozaj ĵurnaloj;

eldonistoj timis perdi abonantojn kaj gajnojn.

Reage al tiu evoluo eldonistoj kaj ĉefredaktoroj ne – kiel estus normale kaj prudente – fidis pri alternativo de serioza informado de ĵurnaloj kontraste al komerca televido, sed volis kopii ĝin: ankaŭ ili estu distraj. Kiam politika ĉefredaktoro Bartholy pensiiĝis, ni ĉiuj atendis ke posteulo fariĝos nia tre kompetenta sekciestro Gerd Deckel – sed oni instalas tie simpatian sed tute senpolitikan homon el loka redakcio; konsole por li Deckel iĝis ĉefkorespondanto kun la tasko, modernigi la gazeton. Gvida ĉefredaktoro fariĝis Gernot Römer, kiu tuj komencis peli nin en tiun tendencon de distrado. Wilke, mi kaj la tuta skipo de politika sekcio rezistadis laŭ ĉiuj niaj fortoj, sed Wilke, kiu estus la ĝusta kandidato, eĉ ne fariĝis estro de la politika sekcio. Por tiu posteno oni prenis de ekstere (kurioze por mi, redaktoron de *Weltbild* – do tiu periodaĵo, por kiu mi laboris dum ĉ. dek jaroj) Detlef Drewes [detlef dreves], relative junan homon tre supraĵan kaj devotan. Lia reago „Neniu problemoj!”, kiam la ĉefredaktoro postulis ion, fariĝis flugila vorto inter ni.

Römer pli kaj pli reduktis politikon favore al distraj temoj, la unua paĝo, kiu tradicie informis precipe pri plej gravaj politikaj aferoj, nun fariĝis „montrofenestro” de la gazeto kaj devis speguli temojn el ĉiuj sekcioj. Deckel kun speciala gazeto-desegnisto (kiu lernis en Usono) ellaboris komplete novan strukturon kaj grafikan aspekton – plej gravis ekde tiam bildoj, laŭeble koloraj. Kvankam AZ estas preskaŭ nura abon-ĵurnalo, ni devis unuapaĝe loki precipe sensaciojn ĉiuspecajn, kvazaŭ estus bulvarda gazeto.

Ekskurseto ĵurnalismika

„Bulvard-gazeto” estas ĵurnalismika faktermino por karakterizi tiujn periodaĵojn, kiuj – kontraste al seriozaj abon-gazetoj – estas vendataj surstrate (sur bulvaroj) kaj tial devas vekti intereson de aĉetantoj per laŭeble kriaĵ sensacioj kaj aliaj rimedoj (ekzemple pornografiaj fotoj) por allogi kaj kontentigi primitivajn instinktojn. La ĉefa allogaĵo krome estu laŭeble ekskluziva temo, pri kiu ne raportas konkurencaj periodaĵoj. Ĉar veraj sensacioj ne okazas ĉiutage, bulvardaj ĵurnaloj devas tre ofte pufigi simplajn faktojn (aŭ eĉ inventi sensacion). Tiel el ordinara afero, per lerta vortumado, ĵurnalistoj kreas ion nekutiman; ofte tial la grandlitera titolo enhavas aserton, kiun ne vere kovras koncerna artikolo. Krome, ĉar

sensacioj en politiko maloftas, kompreneble oni serĉas precipe en aliaj sekcioj – nekutimaj akcidentoj, murdoj, medicinaj „mirakloj”, problemoj de stelul(in)oj estas bonaj kandidatoj por tia bulvardismo.

Römer, iuspeca moralisto, ne aŭdacis igi nian ĵurnalon vere bulvarda, sed postulis ekzemple sensaciajn titolojn kaj ekskluzivajn temojn. Tiel el ĉiu simpla politika diskuto kaj debato fariĝis „disputo” aŭ „kverelo”, lia dorlotato Drewes zorgis pri pufigitaj temoj; en tio li estis tre lerta: li simple telefonis kun iu specialisto por „eltikli” iun provokan frazon aŭ fortan kritikon, kaj per tio konstruis ekskluzivan artikolon kun bulvardeca titolo. Pli kaj pli ni tablistoj, Wilke kaj mi, havis problemojn defendi nian planadon de paĝo 1 kaj elstarigi gravajn politikajn temojn. Precipe eksterlandaj aferoj fariĝis pli kaj pli malgravaj; tipa reago de Römer al tiaj proponoj estis: „Kiom da legantoj ni havas tie?” (ekzemple, se temis pri milito en iu afrika lando). Kion diri kontraŭ tia idiota argumento?

Por kompletigi niajn suferojn, Römer establis pli kaj multajn konformulojn en gvidaj postenoj. Ŝajnas ke li elektis ilin laŭ kriterioj „diletanteco” kaj „aroganteco”, gravis nur ke ili kapablu kompreni kaj plenumi dezirojn de la ĉefo kaj per obstina retoriko persvadi aliajn, realigi tion, kion oni postulas. Unu el tiuj „utilaj idiotoj” ricevis taskon, komplete restrukturi laboradon de la redakcioj. Ekde nun svarmis tra la koridoroj modernaj usonaj esprimoj, ekzemple „work flow” (laborfluo), kiun oni povas plibonigi nur per tute alia organizado de kunlaboro de la sekcioj. Rezulto estis, ke oni per centmiloj da germanaj markoj forigis murojn kaj ĉambrojn kaj kreis gigantan komunan redaktejon – refalante tiel al pekoj de pasintaj jardekoj (kun malbonegaj spertoj, pro kiuj prudentaj entreprenoj jam delonge revenis al malgrandaj laborunuoj kun nur kelkaj personoj). En tiu granda halo oni povis nek trankvile kaj koncentrite labori, nek bone telefoni (konfidence tute ne!). Konstantaj ĝenoj de bruoj, ridoj, vokoj kaj klaĉoj de kolegoj, sonorado de telefonoj tre multaj – ĉio ĉi kreis etoson preskaŭ ne elteneblan (por mi kaj la manpleno de restintaj seriozaj redaktoroj). Tiam mi kreis sarkasman sloganon „Ĉio fariĝas pli bona!” Ĝin adoptis la kunsuferantaj kolegoj; baldaŭ ni ne plu salutis nin per „Bonan tagon!” sed per tiu slogano, kiun poste mi ampleksigis ĝis la ekstremo „Ĉio ĉiam fariĝas ankoraŭ eĉ pli bona!”

Revolucio (ne nur) teknika

Paralele al drastaj ŝanĝoj ĵurnalismaj okazis plia teknika revolucio en produktado de gazetoj. Pli kaj pli potencaj komputilaj programoj ebligis, forigi tutajn teknikajn sekciojn de kompostado, grafikaj kaj tipografia metioj, fine ankaŭ de enpaĝigado. Centoj da postenoj forfalis – per iliaj taskoj oni ŝarĝis nin redaktorojn. Ĉion ni nun povis – kaj devis – fari per komputiloj; sarkasme ni prognozis, post kiom da jaroj ni ankaŭ presos kaj distribuos la ĵurnalon. Okupis nin tiom da teknikaj taskoj, ke por enhavoj ni preskaŭ ne plu havis tempon. Redaktado parte reduktiĝis al musoklako: ni tranĉis tekstojn de inform-agentejoj tiel, ke ili okupis tiun spacon, kiu estis je dispono por koncerna artikolo. Kun serioza ĵurnalismo tio vere ne plu kongruis.

Sed kulmino de tiu ĉi (por mi persone) katastrofa evoluo estis, kiam Römer pensiigis kaj ni ricevis novan ĉefredaktoron eĉ pli teruran. Li estis vera bulvardisto; sperta kolego trafe karakterizis lin, dirante ke „lia principo estas arbitreco.” Mi kompletigis: „Severa arbitreco.” Konferencoj sub lia gvido estis hororaj, absurdaj spektakloj. Nun la degenero de AZ, en miaj okuloj, estis kompleta. Min agacis la etoso tiom, ke post kelkaj monatoj sub la nova ĉefdiletanto mi cerbumis pri eskapo. Sed kion fari en aĝo proksima al pensiigo? Novan postenon neniel mi trovus.

Bonŝance (!) tiam atendis min la kvina manoperacio. Kial ne eluzi tiun ĉi ŝancon? Do mi proponis al la ĉefoj, je tiu okazo retiriĝi el la posteno de tablisto, tamen resti redaktoro en politika sekcio. Mi sciis, ke per argumento pri miaj sanproblemoj mi riskis nenion, ili ne povis rifuzi kaj ankaŭ ne maldungi min aŭ redukti la salajron de multjara kompetenta redaktoro. Miaj kolegoj konsternite provis persvadi min, elteni – por ili estos eĉ pli terure, se mi malaperos de tiu gvida pozicio, ili ja perdos gravan kunbatalanton por serioza ĵurnalismo. Aliflanke ili bone komprenis, parte enviis min pro tia elturniĝo. La ĉefoj akceptis mian decidon, mi nur devis koncedi, ke ankaŭ estonte dum dimanĉaj deĵoroj mi funkcios kiel tablisto (kion, tamen, post kelka tempo mi ankaŭ povis rifuzi per preteksto pri sanproblemoj).

Revenĝo kapitalisma

Nu, mi ne estis feliĉa pri tiu decido, tamen de mia koro falis la granda

proverba ŝtono. Kaj mi komencis revenĝi. Elkalkulinte, kiom da horoj dum la pasintaj jaroj de tablisto mi kromlaboris sen rekompenco, mi decidis redukti mian labortempon konsekvence. Mi venis malpli frue al la redaktejo kaj iris hejmen pli frue. Pro sperto kaj rutino ne estis problemo por mi, tamen plenumi miajn taskojn. Tiel mi ekspluatis la kapitalisman sistemon simile kiel antaŭe kapitalistoj ekspluatis min. La lojalaj kolegoj ne nur toleris tion sed ankaŭ protektis min, kiam okaze iu ĉefo serĉis min. Probable tiamaniere proksimume mi povis egaligi mian laborbilancon. Precipe mi ĝojis, ke nun mi ne plu devis ĉeesti tiujn temporabajn kaj plejparte stultajn du konferencojn ĉiutagajn, kiuj tiom ofte furiozigis kaj turmentis min.

Dum tiuj jaroj alikampe mi akiris novajn spertojn, kiuj kulminis en fiasko. Pro nia bengala bofilo ni ekhavis kontaktojn kun multaj bangladeŝanoj, kies kulturo parte fascinis nin. Kelkaj el ili planis fondi societon kaj petis mian helpon. Tion volonte mi faris kaj miaj proponoj plaĉis al ili, sed al mi ne plaĉis ke ili volis persvadi min fariĝi prezidanto; fine tamen mi akceptis postenon de vicprezidanto. Estis ja bona ideo, helpe de german-bengala societo proksimigi la du kulturojn. Kion mi tamen neglektis, estis kvereloj inter minimume du bengalaj grupoj, kiuj akriĝis tiom, ke oni telefone murdminacis la (bengalan) prezidanton, tiel ke fondkunveno devis okazi sub polica protekto. Fidante al asertoj de „niaj” bengaloj, en la fondkunveno publike mi diris la nomon de la ĉefkontraŭulo, denuncante lin pro murdminaco. Tio estis fatala eraro, fatala por mi.

Sed unue la laboro de la nova societo evoluis bone; mi redaktis inform-bultenon, kiu kompreneble estis profesie farita. Ni komencis nian programon per granda publika prezentaĵo kun bengalaj muziko, dancoj kaj manĝaĵoj, kiun ĉeestis eĉ reprezentanto de l' ambasadejo de Bangladeŝo. Sekvis multaj islamaj festoj, al kiuj ni invitis la germanan publikon, kun relative bona eĥo. Sed baldaŭ montriĝis, ke dialogo inter la du kulturoj estis ege malfacila, ne nur ĉar tre malmultaj bengaloj sciis germanan lingvon (spite al multjara restado en Aŭgsburgo) sed precipe ĉar ili havis absolute nenian intereson pri germana kulturo, ne volis, ne kapablis adaptiĝi. Kiam mi eksciis, ke eĉ la sufiĉe inteligenta prezidanto batas sian edzinon, mi perceptis ke ili estis komplete fiksitaj en siaj bangladeŝaj tradicioj, kvankam ili asertis respekti demokration.

Puno tribunala

Kiam la bengalo denunciita kiel murdminacinto akuzis min pro kalumnio kaj pelis min en proceson, mi kolektis atestojn de tiuj, kiuj aŭdis la minacojn. Sed, ho ve! Montriĝis, ke la faktoj raportitaj de ili ne nepre kongruis kun realaj faktoj laŭ eŭropa juro, do mia fido pri la vero laŭ bengala skribmaniero estis iom naiva. Mia advokato do konsilis, proponi kompromison. La juĝistino en la proceso admonis, ke mi „ne rajtas aserti ion, kion mi ne povas pruvi” kaj adoptis nian kompromis-proponon, kion kun hezito akceptis ankaŭ la akuzinto. Mi devis en nia inform-bulteno dementi, ke li murdminacis, kaj pagi relative altan punmonon kaj plej grandan parton de la tribunalspezoj. Entute tiu ĉi justic-afero kostis al mi kelkmil markojn, kvankam la advokato – edzo de brazila amikino de Hilde – rezignis pri granda parto de sia honorario. Sekve mi petis, ke miaj bengalaj „amikoj” repagu al mi almenaŭ grandan parton de la perdita mono, ĉar ja ili estis la veraj kulpuloj kaj mi nur propeka kapro. Efektive ili, konsternite pri la germana justico (!), kolektis iom da mono por mi, sed neniel montriĝis pretaj pagi la postulitan sumon. Kiam krome la prezidanto manipulis estrar-elektojn tiel, ke li denove estros la societeton kontraŭ rezisto de kelkaj membroj, kiuj malkovris iujn liajn financajn ekspluatadojn, mi definitive rezignaciis, demisiis de mia posteno kaj rompis ĉiujn kontaktojn.

Dialogo malfacila

Tiu ĉi malagrabra aventuro estis plia pruvo por mi, ke vera dialogo inter kulturoj ne facilas sen komuna bazo, kiun provizas Esperanto kaj la ideoj ligitaj al ĝi. Mi ja kutimis interparoli kun anoj de la Esperanto-komunumo kaj interkompreniĝi kun ili per neŭtrala komunikilo, kies vortoj por ĉiuj el ni havas almenaŭ grandparte samajn signifojn – kaj se ne, ni facile povas eltrovi eventualajn nuancojn de nocioj. Krome esperantistoj kiel tiaj ja havas intereson pri aliaj homoj, aliaj socioj, aliaj kulturoj kaj tradicioj, do renkontas ilin ne firme fiksitaj en propra ideologio, sed apertaj por ĉio „fremda”, toleremaj, akceptemaj, komprenemaj. Ili ne volas „defendi” siajn proprajn konvinkojn, sed klarigi ilin al aliaj.

Kontraste al tiuj kondutoj de esperantistoj, kaj bengaloj kaj germanoj en la societo parolis siajn proprajn lingvojn, kaj eĉ se oni tradukis, samaj vortoj havis diversajn signifojn por unuj kaj aliaj. Certe, germanoj havis pli da intereso pri la alia kulturo, tamen manke de bone funkcia komunikilo (Esperanto) multon ne povis scii kaj kompreni kaj do foje

moketis pri iuj bengalaj vivmanieroj kaj kondutoj, anstataŭ esplori, kial ekzemple ili manĝas per manoj kaj ne per forko kaj kulero aŭ kial iliaj beboj ne (kiel germanaj) ludas sur planko sed ĉiam estas tenataj sur sino aŭ brako. Pro manko de komuna lingvo, germanoj arogante juĝis pri bengaloj laŭ siaj kriterioj, ĉar estis tro malfacile, parte neeble (ankaŭ ne per tradukado), ekkoni kriteriojn de la aliaj. (Cetere, dialogo estis malfacila eĉ kun la malmultaj bengaloj, kiuj relative bone lernis la germanan.)

Dume *Monato* daŭrigis sian vojon, ĝis tamen en 1998 aperis kelkaj artikoloj kun kalumnioj kaj ofendoj, kiuj ĉagrenis plurajn homojn; unu el ili, William Auld, eĉ furiozigite forlasis sian postenon de redaktoro. Alia skandaleto estis teksto de Tyburcjusz Tyblewski, kiu flaris je antisemitismo, kvankam – kiel mi eksciis per interparolo kun li – pri tio li tute ne konsciis nek intencis tian tendencon; tamen lia artikoleto estis minimume miskomprenbla kaj ne devus aperi en tia formo. Tiuj misaĵoj alarmis min, kaj ŝajnis al mi, ke sub fakta ĉefredaktoro tiaj skandaletoj, kiuj difektis renomon de la magazino, ne okazus. Ĉar tiam mi retiriĝis en mia profesia laboro de tablisto al pli trankvila pozicio, mi povus reveni al posteno de ĉefredaktoro de *Monato* kun reduktita tasko, precipe kontrolo. Paul Peeraerts kaj la eldonejo akceptis tiun ĉi proponon majstri la krizon, kaj do ekde 1999 mi denove plenumas tiun ĉi funkcion kaj povis en 2004 kunfesti la 25-jaran jubileon de la revuo en sama posteno, kiun mi havis kiel kunfondinto.

Fiasko neatendita

Alian krizon mi ne majstris tiel bone. Laŭ la statuto mi devis rezigni, post du oficperiodoj, en 1999 pri la posteno de FAME-prezidanto. Ni do serĉis posteulon kaj trovis esperantiston, kiu (laŭ kompreno de ni estraranoj) deklaris sin preta kandidati. Sed ho ve! En la kunveno dum la UK en Berlino tiu homo deklaris, ke neniel li diris ke li kandidatos kiel prezidanto sed nur kiel estrarano. Sekvis granda embaraso, ĉar ni ne havis alian kandidaton. Mi jam timis, ke provizore – kvankam kontraŭstatute – mi devos daŭrigi, ĝis aperis demando, ĉu (ĉeestanta) Werner Bormann eble pretas elektiĝi. Post iom da hezito li akceptis, kaj do ni evitis kompletan fiaskon. (Amuze estis, ke – reveninte hejmen – mi relegis la statuton kaj trovis, ke mi eraris: mi jes rajtus elektiĝi por tria periodo.)

Tamen sekvis fiasko pri FAME. Dum la membrokunveno oni konstatis neklaraĵojn en la buĝeto, kiujn la kasisto ne sukcesis klarigi kontentige. Oni do komisiis la novan estraron, detale esplori la aferon helpe de fakuloj. El tiu esploro rezultis, ke efektive okazis manipuloj kaj ke mankis konsiderinda mono pro bankrotiĝo de kreditoro, pri kiu sciis la kasisto sed informis nek la aliajn estraranojn nek la revizorojn. Kial li agis tiel, ĝis hodiaŭ mi ne komprenas. Sed ĉar mi – kun la kasisto – posedis la bankorajtojn, vole-nevole mi devis eksigi la kasiston kaj forpreni lian bankorajton, por eviti plian finanĉan damaĝon por la fondaĵo. Tio kompreneble vundis lian reputacion; pro tio nun oni riproĉis al mi mallojalecon kontraŭ amiko, ne komprenante ke mi ne havis alian eblecon. Do, kiam la afero fine estis reordigita helpe de ekstera kontrolisto, kun naŭzeto mi povis fermi la ĉapitron FAME, por kiu mi kun elano kaj ĝojo agadis tiom multe, sed kiu finiĝis por mi kiel plia persona fiasko.

Tamen ne sufiĉis, atendis min aliaj degenero kaj fiasko: en 2003 mi devis proponi mortigi alian de mi dorlotitan organizaĵon, fakasocion TEĴA. Kvankam ĝi post refondo en 1992 evoluis bonege, jam en 1996 nombro de membroj falis de antaŭe 130 al nur 80, tiel ke mankis mono por konstante eldoni la fakorganon *Internacia Ĵurnalisto*. Krome kontinue malkreskis intereso de membroj: neniu aktive kontribuis ion, nur dum kunvenoj kadre de UK aperis relative multaj interesitaj homoj. Fine estis nur ĉ. 30 pagantaj membroj – lokaj Esperanto-kluboĵ kutime havas pli da. Do mi argumentis, ke tio ne pravigas ekziston de organizaĵeto kun bombasta nomo „Tutmonda Asocio”, kaj proponis malfondon. Ĝin akceptis granda plimulto de voĉdonintoj, kaj tiel do la 31-an de decembro 2003 tradicia fakasocio mortis pro malintereso kaj malatento. Ŝajnas, ke krom mi preskaŭ neniu ploretis.

Kontraste al tiuj fiaskoj, almenaŭ unu sukceseton en Esperantujo mi tamen havis. Instigite de amiko Aldo d’Giorgi, mi kandidatis por Akademio de Esperanto (AdE), kaj oni elektis min en 1998 kiel membron. Tuj mi proponis starigi ene de AdE konsultejon; tion oni akceptis kaj komisiis min, gvidi la konsultan komisionon. Efektive tiu ĉi servo estis bone akceptita, kvankam ne tre ofte alvenas vere gravaj kaj komplikaj demandoj.

Pensiiĝo antaŭtempa

Dume la situacio en AZ por mi fariĝis pli kaj pli deprima; nur kun abomeno mi iris tien kaj tuj fuĝis hejmen, kiam mi povis. Neniel plu kongruis kun mia koncepto pri bona kaj serioza ĵurnalismo, kiel oni gvidis kaj organizis tiun gazeton. Do mi kaptis ŝancon ofertitan de l' eldonejo por antaŭtempa pensiĝo. Kvankam preskriboj kaj leĝaj postuloj estis tre komplikaj, la principo estis relative simpla: du jarojn oni laboris je duona salajro dum duona tempo ol normale kaj poste povis iĝi pensiulo, ankaŭ se oni ne atingis la leĝan limon de 65 jaroj. Eĉ pli avantaĝe, oni povis aranĝi la aferon tiel, ke dum unu el tiuj du jaroj oni laboras komplete kiel antaŭe (tamen kun duona salajro) kaj dum la dua jaro tute ne plu (tamen daŭre ricevas salajron duonan). Mi petis, elkalkuli por mi tian planon, por vidi ĉu finance ni eltenos – kaj je mia kontento montriĝis, ke nete mi disponos pri preskaŭ sama sumo kiel antaŭe (ĉar, kun reduktita salajro, mi pagos ankaŭ reduktitan imposton). Do mi elektis la duan alternativon kaj kun sopiro atendis mian lastan labortagon en septembro 2001!

Intenco de tiu leĝo flanke de l' politikaj instancoj estis, en periodo de altgrada senlaboreco liberigi laborlokojn de maljunuloj por junaj homoj; kondiĉo por entreprenoj do estis, anstataŭ eliranta pensiulo dungi junan homon, tamen ne nepre sur sama posteno (do por mi oni povis dungi ankaŭ iun, kiu nur staplas prospektojn...) – kaj efektive oni, kompreneble, ne dungis novan politikan redaktoron post mia foriro. Ĉar la granda avantaĝo por eldonejo estis, ke oni liberigis sin de bonege salajrita homo kaj per dungo de malpli kosta laboranto gajnis konsiderinde – oni ŝparis kompletajn tri jarojn de mia salajro! (Cetere, ĉar entreprenoj ekspluatis ĝuste tiun ŝparefikon, oni intertempe nuligis la leĝon.)

Sperto plej terura

Kiel ajn, komence de septembro 2001 mi jam komencis ordigi miajn aferojn en la redakcejo, ĉar fine de la monato mi povos ĝui ankoraŭ kelkajn liberajn tagojn. Sed ho ve! En tiu vere lasta fazo de mia profesia vivo atendis min unu el miaj plej teruraj teroraĵoj, kiujn povas sperti redaktoro de ĵurnalo: la katastrofa atenco de 11-a de septembro en Usono. Kiam alvenis la unuaj fulminformoj, mi ankoraŭ kredis je akcidento, sed mallonge poste estis klare, ke temis pri plej kruela kaj barbara kaj brutala terorismo. Ne ofte dum mia profesia vivo mi devis plori, kiam atingis min katastrofinformo, ĉar por redaktoro tio estas rutinaĵo, sed ĉi-okaze mi estis vere paralizita. Estis nur unu konsoleta

punkto por mi: ne kiel dum antaŭaj jaroj mi troviĝis en la centro de ĵurnalisma tasko por plej bone informi legantojn pri tia evento. Sed mi ne imagis, ke tiel finiĝos mia profesia kariero.

Kiam alvenis la lasta tago de deĵoro, la karaj kolegoj kun sincera bedaŭro adiaŭis min. Sed je mia granda miro aperis eĉ la ĉefredaktoro por persona interparolo kaj esprimis sian respekton, dirante i. a. ke sendube mankos en la gazeto miaj bonegaj kaj inspiraj komentarioj. Ĉu vere tiu ĉi banalulo posedis ankoraŭ kernon de ĵurnalista etiko? Mi respondis nur per kelkaj ĝentilaj frazoj. Kutime en tiaj okazoj oni adiaŭis per granda festo, al kiu oni invitis ĉiujn ĉefojn kaj kolegojn. Mi havis bonan pretekston, ne fari tion, ĉar mi devas prepariĝi por manoperacio tuj komence de oktobro. Iuj subkomprenis, ke tia festo do okazos pli poste, ĉar ja ankoraŭ dum unu jaro mi restos dungito. Al tiuj mi ne diris, ke ili eraras. Fakte mi invitis nur la plej bonajn kaj ŝatatajn kolegojn al adiaŭa vespermanĝo en bona restoracio. Ili donacis al mi valor-bileton por librovendejo kun alta sumo; per tiu mono mi povis aĉeti plurajn aktualajn leksikonojn (inter ili anglan vortaron, ĉar sen ĝi mi ne plu kapablas legi germanajn gazetojn, en kiuj abundas usonanglaj esprimoj). Cetere, ekde mia demisio mi strikte rifuzis legi la ĵurnalon – nun mi ne plu bezonis scii, kion ĝi publikigas...

La manoperacio pasis kontentige, sed kompreneble post la sesa fojo la mano bezonis tre longan tempon por komplete rekuraciĝi. Niajn financojn ni povis aranĝi tiel, ke kompare al multaj aliaj germanoj, ni vivas komforte kaj povas ĝui trankvilan vivon post streĉoj kaj premoj de profesia vivo. Ni havas nun pli multan tempon por la familio, precipe la kvin genepoj, el kiuj tri parolas Esperanton, kaj tiuj aferoj, kiujn ni ŝatas. Eĉ mi komencis denove pentri – tiun hobion dum multaj jardekoj mi ne povis praktiki. Se ne aperas pli gravaj sanproblemoj ol ni havas ĝis nun, eble ni povos vivi kontentige ankoraŭ multajn jarojn. Firme mi asertas, ke tion ni meritas.

Postparolo

Ne estis mia intenco verki membiografion, sed mi volis montri kiel kaj kial du precipaj linioj de mia vivo, ĵurnalismo kaj esperantisteco, interplektiĝis kaj influis sin reciproke. Neeviteble en tia priskribo mia biografio jen kaj jen ludas foje gravan, foje akcesoran rolon. Sendube estis esencaj por ambaŭ kampoj spertoj kaj travivaĵoj dum kaj post la dua mondmilito en mia infanaĝo, el kiuj rezultis mia akra sentemo pri ĉiaj maljustaĵoj. Batalo kontraŭ maljustaĵoj karakterizis mian ĵurnalistan impeton same kiel mian engaĝiĝon por la lingvo internacia, ĉar ekzemple mi sentas kiel fortan maljustaĵon, ke homoj naskitaj kun la uson-angla kiel gepatra lingvo en nia mondo havas gigantajn avantaĝojn spite al ĉiuj konvencioj kaj traktatoj, kiuj postulas samajn rajtojn por ĉiuj homoj. Simile en ĉiuj miaj ĵurnalistaj laboroj mi provis defendi kaj protekti homojn suferantajn maljustaĵojn. En mia profesia agado do ĉiam enestis tiu interna ideo de humana kaj demokrata lingvo internacia, kiun Zamenhof mem karakterizis kiel homaranismon.

Certe, origine mi venis al Esperanto per la provo, eskapi el vivo kiun mi sentis mallibera (do maljusta), kaj tiam ne jam havis ideon pri ĵurnalismo. Sed tre baldaŭ kaj rapide en la societo de esperantistoj mi eksentis tiun belan etoson de libereco kaj klopodo pri justeco, akirante amikecon de multaj „samideanoj”, homoj kiuj pensas same kiel mi pri la mondo, kaj kiuj akceptas min tia, kia mi estas, sen antaŭjuĝoj kaj rezervoj. Aldoniĝis mia natura talento de ĵurnalisto, doto kaj graco, pri kiu mi ne konsciis komence, sed kiun vivofine mi perceptas tute klare. Se vi atente legis la libron, vi memoras, ke mi neniam kaj neniel lernis ĵurnalismen – simple mi havis la por tio necesajn kvalifikojn, kio kompreneble ne estis mia merito sed donaco de la naturo.

Aliflanke estis precipe mia profesio de („verda”) ĵurnalisto, pro kiu mi akiris multajn gravajn kaj karajn amikojn en Esperantujo. Dum vojaĝoj tra ekzemple Jugoslavio, Israelo, Japanio aŭ Brazilo mi aperis al esperantistoj kiel ĵurnalisto, kiu pro ties konfido eksciis multe pli ol neesperantista germana ĵurnalisto povus sperti, ĉar tiu ne povus eniri privatajn sferojn kiel mi. Sed precipe kiel redaktoro de *Monato* mi povis

gajni agnoskon kaj amikecon de multegaj homoj en la esperant-kultura societo. Tiu ĉi sendube plej grava el ĉiuj miaj iniciatoj en Esperantujo naskiĝis ĝuste ankaŭ pro mia batalo kontraŭ maljustaĵoj, kiujn mi spertis en mia ĉiutaga (neesperantista) profesia laboro.

Al ĉiuj tiuj amikoj, el kiuj pluraj bedaŭrinde jam ne plu vivas, kiam mi verkas tiujn ĉi liniojn, mi ŝuldas grandan dankon; al tiuj, kiujn mi ĉagrenis pro mia foje akra maniero defendi miajn principojn, mi petas pardonon. En la bilanco de tiu mia ĵurnalista kaj esperantista vivo jen estas sukcesetoj, jen fiaskoj, el kiuj preskaŭ ĉiuj tre dolorigis min.

Ĝenerale mi volas resumi, surbaze de miaj spertoj, ke en la nuna situacio, kiam tiu fama „fina venko” de Esperanto ne estas videbla, homo fariĝas adepto de la lingvo internacia kaj la noblaj ideoj ligitaj al ĝi precipe pro tio, ke en ties karaktero kaj vivosperto viglas ĝuste tiuj ideoj kaj idealoj, unualinie la forta sento pri justeco kaj maljustaĵoj. Se mi kapablis per mia libro iom montri kaj klarigi tion al legantoj, ĉu ili konas min persone aŭ ne, mi estos tre kontenta.

Kion mi konkludas el miaj spertoj de 40-jara ĵurnalista laboro? Ĝenerale el tio mi akiris la konvinkon, ke la homaro kiel homaro estas stulta. Por tion pruvi, sufiĉas tri simplaj faktoj, kiujn ĉiu povas mem kontroli. Se la homaro ne estus stulta, ni ne havus militojn, ne mortus ĉiutage miloj da homoj per ordinara trafiko kaj se ĝi ne estus stulta, la homaro parolus Esperanton. Juĝu mem, ĉu mi estas pesimisto aŭ realisto!

Fino

Libroj de Stefan Maul

Stefan Maul, *Germana ĵurnalisto komentas* – Kvar Prelegoj de Stefan Maul en Japanujo (kun japana traduko). Eldona Societo de Nagoya Esperanto-Centro, 1981; 35 p., 15 / 21 cm.

La Jaro 1981 – praktika poŝkalendaro de MONATO. Unua eldono de kalendaro, kiu poste aperis seninterrompe ĝis hodiaŭ. Kalendaro kun festotagoj de ŝtatoj kaj grandaj religioj, listo de la landoj de l' mondo kaj multaj aliaj utilaj informoj. 128 p., 10,5 / 14,5 cm. TK/Stafeto, Brasschaat, 1981 (nun Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen).

Judith Junger / Stefan Maul, *Manlibro pri Ĵurnalismo*. Teorio de ĵurnalismo kaj praktikaj konsiloj por verkado, redaktado, eldonado kaj publika rilatoj; kun fakterminareto. 1-a eldono TK/Stafeto 1982; 2-a eldono kun kontribuoj de Claude Piron kaj István Nagy. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1989. 94 p., 14,5 / 20,5 cm; ISBN 90-71205-25-8.

Esperanto-Schnell-Kurs von Hans Koch – Neuauflage besorgt von Stefan Maul. 1-a eldono TK/Stafeto, Brasschaat, 1983; 2-a eldono Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1989. Kompakta kaj kompleta germanlingva kurso kun interna ŝlosilo kaj ampleksa vortaro, taŭga precipe por intensaj kursoj kaj aŭtodidaktoj. 85 p., 10 / 14,5 cm, ISBN 90-71205-28-2.

Stefan Maul, *Pri kelkaj gravaj problemoj de l' Esperanto-movado*. Represo de artikol-serio aperinta en MONATO 1986 (okaze de la centjara jubileo de Esperanto). 31 p., 14,5 / 21 cm. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1987. ISBN 90-71205-17-7.

William Auld / Stefan Maul (red.), *Sub la signo de socia muzo* – Antologio – Poemoj kaj eseoj. Kun ilustraĵoj de Georgo Kamaĉo. Verkoj el la unuaj cent jaroj de Esperanto, kiuj traktas sociajn, socialajn kaj politikajn temojn. 120 p., 15 / 21 cm. Serio „Stafeto”, n-ro 2. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1987. ISBN 90-71205-16-9.

Stefan Maul, *Vortaj (A)ludoj*. Ŝercoj, satiraĵoj, vortludoj. 111 p., 14,3 /

20,4 cm. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1987. ISBN 3,14159265.

Stefan Maul, *Falsaj amikoj – Schwierigkeiten im Wortschatz Esperanto-Deutsch*. Ĉ. 600 vortoj. Pro Esperanto, Vieno, 1992. Serio Instruo. 26 p., 14,5 / 21 cm

Stefan Maul (editoro), *Deklingva Manlibro pri Politiko*. Enciklopedieto kun ekzemploj de uzado kaj gravaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj; 1150 kapvortoj en Esperanto kaj la lingvoj angla, ĉina, franca, germana, hispana, japana, nederlanda, portugala kaj rusa. Verkita de 22 kunlaborantoj el 14 landoj. 230 p., 14,5 / 20,2 cm. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1994. ISBN 90-71205-50-9.

Monografioj

Stefan Maul, *Ĉu eblas revoluciigi la internacian inform-sistemon helpe de la internacia lingvo Esperanto? Konkludoj el la spertoj pri Monato, magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo*. Depreso el Serta Gratvatoria in Honorem Juan Régulo / II Esperantismo, Universidad de La Laguna, La Laguna 1987, p. 407 – 433 (26 p.), 16,5 / 24,5 cm.

Stefan Maul, *Enkonduko en la arton skribi*. Sciencaj Aktoj Volumo 3/6.2 – Acta Sanmariensia Academiae Scientiarum Internationalis, academia libroservo „Libro” de Akademio Internacia de Sanmarino (AIS), Jelenia Góra, 1993. 14,5 / 20 cm , 17 p. ISBN 83-85033-07-3.

Sonkaseto

Revolucio en Informado per Esperanto – spertoj kaj proponoj. Prelego de Stefan Maul okaze de la Kultura Kunveno de la Pariza SAT-rondo en Pompidou-Centro la 12-an de februaro 1989. Magnetofona Servo de SAT-Amikaro, Paris.

Esperanto-gazetoj redaktitaj de Stefan Maul

Birdo / La Alta Flugo, organo de la junulara sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 1960–1963.

Kristana Ekumeno – interkonfesia cirkulero, 1963–1965.

Kontakto, revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, 1966–1967.

Espero Katolika, organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 1966–1971.

Monato, sendependa magazino internacia por politiko, ekonomio kaj kulturo, 1980–1991/1999 -

La Strobilo, kongresa kuriero de la 70-a UK 1985 en Augsburg.

Internacia Ĵurnalisto, organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, 1991–2004.

Kolofono

Titolo El verva vivo ĵurnalista

Aŭtoro Stefan Maul

Kovrilo Hugo Fontyn

Tekstaranĝo Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN 978 77066 18 7

UDK 82.3.892

NUR 680

Leĝa depono D/2005/2924/4

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2004 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekranlibro estas nur parto de la originala libro. Ĝi povas esti libere kopiata.